

Seleco



Pres-organo de:
Astura Esperanta Asocio



Numero 91

Junio 2015



La revolucio kiu (ne) ŝanĝis la mondon



Seleco



Pres-organo de:
Astura Esperanta Asocio



Numero 91

Junio 2015

Astura Esperanta-Asocio

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: <http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/>

Retadresoj: asturias@telecable.es
<mailto:esperanto@uica.info>

Astura Esperanto-Asocio estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

<u>Enhavo</u>	<u>Paĝo</u>
Esperanto 2015	3
74-a hispana KONGRESOJ DE ESPERANTO	4
Aŭstralia-Novzelanda Kongreso/Somerkursaro	5
67-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio	6
Hispanio 2015	7-8
Nia ĉi-jara ĉef-temo	9
La antaŭ-revolucia situacio	10-12
Krizas la Malnova Reĝimo	13-15
Intervenlas la popolaj amasoj	16-18
Interklasaj kontraŭdiroj	19-21
Konstitucio kaj eraroj en 1791	22-24
1792: milito kaj revolucia radikaliĝo	25-28
Revolucio ene de la Revolucio	29-32
Totala milito kaj revolucia teroro	33-35
Simboloj de la Revolucio	36-37
La etapo plej freneza de la Revolucio	38-41
Malfluso de la revolucia procezo	42-44
Direktoraro kaj la Konspiro de la Egaluloj	45-48
Protagonistoj de la Revolucio	49-54
Legante pri la Franca Revolucio	55-57
Kronologio de la Franca Revolucio	58-59
Terore Humore (humura paĝo)	60

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



Esperanto

2015

Kiam meas la jaro 2015, kaj ni publikigas ĉi tiun numeron de **Heleco**, kia estas la situacio de nia E-movado? Ni scias ke je loka, urba kaj regiona vidpunkto, la situacio de Esperanto tute ne bonas, kaj pri tio eble kulpas nia ne-kapablo, sed por sondi la aferon je tutmonda skalo ni devas nin turni al **Interreto**. Por ekscii pri la publika agado de la esperantistaj organizaĵoj ni konsultis la ret-paĝon de la t. n. **Internacia Kalendaro de Esperanto-aranĝoj, 2015**, ret-adreso: <http://www.eventoj.hu/2015.htm>

Nu, plejparto el la kongresoj, kursoj, renkontiĝoj k. s. tie anoncitaj jam okazis aŭ devis okazi. El ili ni elektis tri por iomete raporti pri ili en la sekvaj paĝoj. Pli malpli, la situacio de la E-Movado kiun ili respiegulas ne estas tre brila. La specimenoj de E-aranĝoj kiuj ni elektis por raportado apartenas al diversaj mondpartoj: la **74-a Hispana Kongreso de Esperanto**, la **Aŭstralia-Novzelanda Kongreso/Somerkursaro** kaj la **67-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio**. Ilia aspekto ne multe malsimilas el ties de plejparto el la okazintaj esperantistaj eventoj pri kiuj oni povas eltiri informon el **Interreto**. Iuj el tiuj anoncitaj aranĝoj eĉ ne fakte okazis aŭ ties okazado ne sufiĉe gravis por meriti interretan raporton. Kaj kion ni vidas en la fakte okazintaj kaj raportitaj kongresoj? Malmult-deko da ĉeestantoj, kvazaŭ-ritaj aktoj... Jes, la raportoj ellaboritaj de la koncernaj organizintoj esprimas ian sinflatismon aŭ trooptimismon per kiu oni penas kaŝi la realan situacion de la Movado. La plej grava el tiuj kazoj estas tiu de la Bulgara E-Kongreso. Ties organizintoj bilancis ĝian rezulton kiel “rimarkinde sukcesa”. Sed ni volis inkludi, pri tiu Kongreso, la raporton faritan de esperantistino de alia lando kiu komprenis nenion el tio traktita en tiu Kongreso de Esperanto tial ke en ĝi oni ne parolis esperant-lingve.

Oni ne vidu en nia pritrakto de la afero malamikecan atakon al la gesamideanoj kiuj multloke en la mondo penas sukcesigi la disvastiĝon de la internacia lingvo. Ilia fiasko estas ankaŭ nia fiasko; ni konscias ke ekzistas nuntempe grandaj baroj kaj cirkonstancoj kiuj malfaciligas la laboron de la geesperantistoj, kaj ni ne pretendas posedi la solvon al tiel komplika situacio. Kaj nun ni prikonsideru la duan duonon de la jaro. Per la menciita kalendaro de Esperanto-aranĝoj ni scias ke estas programitaj multaj aliaj esperantaj renkontiĝoj, kongresoj k. a., inter ili la **100-a Universala Kongreso de Esperanto**. Ĝi okazos en la franca urbo Lillo, de la 25-a de julio al la 1-a de aŭgusto. Ni esperas kaj deziras ke ĝi estu sukcesa, pli sukcesa ol tiuj de la antaŭaj jaroj, kaj se eble ankaŭ pli sukcesa ol la 1-a E-Kongreso okazinta antaŭ 110 jarojn. Ĉu tiu periodo de pli ol unu jarcento estis vere profita kaj decida por la venko de Esperanto kaj ties Interna Ideo? La okazo estus konvena por trastudi tiun aferon kaj fari la koncernan bilancon. La rutino kaj la inercio kiu karakterigas la agadon de la grandaj organizaĵoj kaj la amasmovadoj igas timi ke la Universala Kongreso kaj aliaj esperantistaj forumoj de la nuna jaro konsistos el la plenumado de ia speco je kongresa liturgio kiu estas aŭ fariĝis celo per si mem anstataŭ ilo por atingi la veran celon.

Inter multaj aliaj esperantistaj eventoj okazontaj ĉi-jare estas la **88-a SAT-Kongreso. Sennacieca Asocio Tutmonda**, krom esti porEsperanta organizaĵo pro la fakto mem pledi por la akcepto de Esperanto, estas ankaŭ per-Esperanta tial ke ĝi, pere de la internacia lingvo aktivadas favore al gravaj kaj indaj celoj en la linio de avancado al pli justa socio. Ĉu estas necese memori ke la kompleta venko de Esperanto povos okazi nur kadre de tia pli justa socio?. **SAT** meritas sukcesi en siaj ambaŭtipaj celoj.

Kelkaj el la programitaj aktoj kaj renkontiĝoj portas en sia nomo la titolo “junularo/a”. Ne estas necese emfazi la gravecon de la junularaj E-asocioj laŭmezure ke ili, ilia forto kaj agado, esprimas la perspektivon de nia afero por la estonteco. Ni devas speciale atenti pri la faktoroj kaŭzantaj la indiferecon aŭ senintereson de la gejunuloj pri nia Esperanta afero... samkiel pli aliaj gravaj aferoj. Nuntempe nia afero ne progresas “per flugiloj de facila vento”, kaj tio ne estas hazarda okazaĵo, sed rezulto de la volo, la intereso kaj la plano de potencaj ekonomiaj fortoj. Nia E-movado devas alpreni la defion identigi tiujn fortojn por efike kontraŭbatali ilin. Ni devas agnoski ke, ĝis nun, nia Esperanta movado ne akreditis kapablon alfronti tiun defion. Ni esperu ke en tiu estonteco kiu komenciĝas ĝuste hodiaŭ la situacio ŝanĝiĝos, kaj la ŝanĝado okazos se ni mem estos kapablaj ŝanĝiĝi kaj evolui laŭ la signoj de la tempoj.

Cullera (Valencio)



74-a Hispana Kongreso de Esperanto

De la 1-a ĝis la 3-a de majo de 2015

Dum la semajnfino de la 1-a al la 3-a de majo de 2015 okazis en la urbo Kujero (Cullera), de la Valencia Regiono, la 74-a **Hispana Kongreso de Esperanto**. Partoprenis en ĝi proksimume 90 personoj, plejparto hispanaj, sed estis ankaŭ geesperantistoj el aliaj landoj: Germanio, Francio, Finnlando, Ukrainio, Polujo, Vjetnamio, Koreujo kaj Usono.

Kiel kutime en tiutipaj aranĝoj, la programo de la renkontiĝo inkludis tre diversajn aktojn: kulturaj, distraj, artaj, turismaj... Interalie, estis en ĝi muzik-konzerto, Esperanto-kurso, ekspozicio de esperantaĵoj (antikvaj leteroj interŝanĝitaj de geesperantistoj). La devizo de la Kongreso estis: **NOVAJ PERSPEKTIVOJ**, per kiu oni volis esprimi la celon pripensi kaj esplori novajn eblojn por la denuna laborado favore al la disvastigo de nia internacia lingvo dank al la t. n. “novaj teknologioj” de (inter)komunikado kaj al la kreskiĝanta deziro de la homoj de la novaj generacioj transsalti la lingvajn kaj kulturajn barojn.

Inaŭguris la kongreson la urb-konsilantino pri kulturo de la urbestro, Maria Carmen Tormos, kiu kun la respondeculo de la Loka Kongresa Komitato, Enric Baltasar, kaj la prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**, José Antonio del Barrio, bonvenigis la kongresanojn. Ankaŭ salutis vizitantoj devenantaj el landoj ekster Hispanio, kaj membroj reprezentantoj de grupoj kaj landaj asocioj. Krome oni donacis por la urba biblioteko kelkajn E-librojn.

La 2-an de majo, matene, okazis piedira ekskurso tra belega monta promenejo al monto el kiu oni povas ĝui la panoramon super la urbo Kujero, la valo de la rivero Júcar, la maron Mediteraneon kaj la marbordon ĝis la Kabo La Nao en la provinco Alikanto. Sur tiu monto oni vizitis la kastelon de Kujero kaj oni partoprenis en prelego pri astronomio. Alia ekskurso okazis la 3-an de majo al Valencio.

Kelkaj kulturaj programeroj estis la prelego de Tonyo del Barrio, prezidento de **Hispana Esperanto-Federacio** pri Donkiĥoto kaj Esperanto, de Flama Floro pri Vietnamio kaj de Heroo pri Koreujo, kaj de Javier Romero pri Nova monda kulturo kaj Esperanto. Aliaj temis pri kreado de kantoj kaj ret-katalogo de Biblioteko Juan Régulo. Dimanĉe matene okazis la asembleo de **Hispana Esperanto-Federacio**.



Melburno (Aŭstralio)

Aŭstralia-Novzelanda Kongreso/Somerkursaro (02–11 januaro 2015)



Komence de ĉi jaro 2015 okazis, kun la partopreno de 50 geesperantistoj el sep landoj, en Melburno (Aŭstralio) tiu esperantista aranĝo nomata **Aŭstralia-Novzelanda Kongreso/Somerkursaro**. Kiel sciante, en la suda hemisferio, kie sutuas tiuj landoj, estas somero kiam vintras en nia norda parto de la terglobo.

“La kongreso okazis en agrabla etoso kaj niaj akraj internaj problemoj de la lastaj jaroj tutcerte preskaŭ malaperis en la mallumo de historio,” asertis Sandor Horvath, la nuna prezidanto de **Aŭstralia Esperanta Asocio**. Li aldonis: “nia Trevor Steele instruis la spertulojn pri la krucmilitoj, Rikardo Newsum gvidis la “progresantojn”, kaj Ilia, nia gasto el Indonezio, instruis la komencantojn. Kelkaj el la pintaj prezentaĵoj estis sursceniĝo de la filmo **54 Tagoj** kun subteksto en Esperanto, la indonezia vespero, kaj nia unua defora prezentaĵo, far Richard Delamore pri Esperanto-Televido. Ni esperas, ke nia venonta kongreso estos komuna, trilanda (Indonezio, Aŭstralio, Novzlando) dum pasko 2016 en Bandung, Indonezio. Kompreneble ni bonvenigos vizitantojn el ĉiuj landoj”.

Ĝenerale, la kongreso kaj somerkursaro ricevis pozitivajn komentojn de kelkaj personoj (“bona”, “ĝuinda”, “mi lernis multon”). La organizado de la evento, inkluzive de informo pri kiel iri tien, estis ankaŭ laŭditaj. Tamen, unu respondinto atentigis la neceson allogi pli da gejunuloj. Ankaŭ la **kongresejo** ricevis pozitivajn komentojn, pro sia konveneco (“ĉio en unu loko”), loĝado, manĝoĉambro, salono, manĝo kaj la amikemaj laboristoj. Unu homo ŝatis la vegetarajn elektojn. Tamen, unu afero pri la ejo, kiu ricevis plej da negativaj komentoj, estis la sendrata interret-konekto (Wi-Fi): tre malfacile konekti (nur kvar iloj povis konekti samtempe) kaj ofte tre nefidinde kaj malrapide. La lecionoj estis ĝenerale bonricevitaj, kaj ĉiuj tri instruistoj laŭdiĝis. Tamen kvar respondintoj el la lecionoj por progresintoj skribis ke ili preferus nivelon inter “komencantoj” kaj “progresintoj”, kaj unu esprimis malfacilon per la rekta metodo. Unu respondinto en la klaso por spertuloj plendis ke malbona prononcado de iuj partoprenintoj (kiu malfaciligis komprenadon de la teksto) ne estis korektataj. Pluraj respondintoj laŭdis la programon (“bona mikso de prelegoj”, “bone organizita”, “bona ekvilibro inter ekskursoj, lecionoj kaj individuaj prezentoj”). La ekskursoj estis priskribitaj kiel “ĝuindaj” de tri respondintoj, sed du plendis pri la konfuzo kun temp-kunordigo inter la ekskursoj “Ekologia Melburno” kaj “NGV”. Du respondintoj sugestis ke povus esti pli bona ekvilibro inter Esperanto kaj la angla, kaj unu sugestis posttagmezajn programerojn por komencantoj aŭ malpli spertaj esperantistoj. Aliaj sugestoj estis:

- meti elektaĵojn post vespermanĝo
- havi paroladojn pri Melburno aŭ Viktorio, por tiuj, kiuj vizitas la urbon
- havi programeron por komencantoj samtempe kiel la jarkunsido
- organizi “Google Hangout”, por ke neĉeestantoj povu spekti la prelegojn samtempe el ie ajn en la mondo, kaj por ke ni povu havi pli da prelegoj de neĉeestantoj, kiel la prezento de Richard Delamore.



Български Есперантски Съюз Bulgara Esperanto-Asocio



La 67-a Kongreso de BEA en urbo Ruse – rimarkinde sukcesa

Esperantista kongreso kie lingvo Esperanto ne estis uzata

Inter rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj ĉiam estis bona kunlaboro. En la kongreso de 1910 en Sofio, kiun ĉeestis multaj rumanaj samideanoj, oni decidis unuigi la du naciaj Esperanto-gazetojn "Lumo" kaj "Rumana Esperantisto", kreiĝis komuna gazeto "Danubo", redaktita de miksitaj dunacia komitato kaj presata en Bukureŝto. En la bulgaraj Esperanto-kongresoj partoprenis rumanaj samideanoj kaj en rumanaj Esperanto-kongresoj ĉeestis bulgaraj esperantistoj. Dum la komunisma periodo, kiam en Rumanio estis malpermesita esperantista agado, bulgaraj samideanoj el Ruse kaj Kubrat alportis esperantaĵojn por rumanaj esperantistoj. Esperantista movado en Bulgario estis helpata de bulgara registaro. Bulgario estis sola lando kiu havis Internacian Esperantan Kursejon en Pisanica (montara regiono) kaj ĉe Nigra Maro (Varna). Ankaŭ en Bulgario okazis Universalaj Kongresoj en Sofio (1963) kaj Varna (1978).

Okaze de la 67-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio, mi kaj aliaj 5 samideanoj el Rumanio vizitis la kongreson. Ĉeestis ankaŭ 8 samideanoj (laŭ kongresa libro), el Serbio, Kroatio, Makedonio kaj Danio. Kiam mi ricevis Kongresan Libron, skribitan en Esperanto, mi pensis ke la organizado estas en ordo. Sabate oni malfermis la kongreson en la kunvenejo de la urbodomo. Por ni, eksterlandaj samideanoj okazis malbona surprizo. Kial?

Dum la kongresa kunveno oni parolis nur en bulgara lingvo. Ankaŭ la afiŝo kun la kongresa programo estis skribita en bulgara lingvo. Bedaŭrinde, oni ŝanĝis la programon, kaj informojn pri tiu ĉi oni donis nur en bulgara lingvo. Ni pensis ke ni vizitos la koncerton kun la partopreno de la geaktorj de Bulgara Esperanto-Teatro (kompreneble en lingvo Esperanto), anoncita en kongresa programo. Granda iluzio! Ankaŭ la aktorj legis ion en bulgara lingvo.

Pri la senhonta konduto, la estraro de Bulgara Esperanto-Asocio ofendis ne nur min, sed ankaŭ aliajn eksterlandajn samideanojn kaj la principojn de la internacia lingvo Esperanto. Eble, la komitatoj de Bulgara Esperanto-Asocio forgesis la Deklaracion pri Esperantismo.

La Deklaracio pri Esperantismo, akceptita de nia Unua Universala Kongreso (jaro 1905): *La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzado de lingvo neŭtrale homa, kiu "ne entrudante sin en la internan vivon de popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn" donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigitaj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.*

Efika laboro por Esperanto devas tion ĉiam atenti. Propagandistoj de Esperanto devus antaŭ ĉio konsciiĝi, ke venko de Esperanto proksimiĝas tiom, kiom multiĝas ĝia bezono, ebleco ĝin apliki. Do, ne povas esti propaganda laboro por Esperanto. Simpla afero lingva, simpla studado de la lingvo, plibonigado, pliriĉigado kaj plilogikado de ĝiaj gramatiko kaj vortaro. Tio estas nur malgranda parto de la poresperanta laboro. **La ĉefa parto de la laboro estas uzi la lingvon praktike, kaj ebligi ĝian uzon. Kiel povas helpi disvastigon de la lingvo internacia tiuj homoj, kiuj mem prenos for de si la povon uzi la lingvon?**

Mi dezirus scii la opinion de la estraro de UEA, kie Bulgara Esperanto-Asocio estas membro.

Marian Vochin, VD de UEA, Bukareŝto, Rumanio

Hispanio

2015

Antaŭ tri jarojn, okaze de la dua centjaro de la unua hispana Konstitucio, ni publikigis du numerojn de ĉi tiu revuo, per kiuj ni pritraktis la historion de nia lando de tiuj du jarcentoj. De tiam, fine de la jaro 2012, okazis en Hispanio ega ŝanĝiĝo kaj gravaj eventoj. Nun ni raportos pri ili kaj priskribos la nunan situacion de la hispana socio. Per la lasta ĉapitro de nia historia raporto de la jaro 2012 ni priskribis la unuan jaron de la regado de la dekstra partio subgvide de Mariano Rajoy: la kontraŭsociala politiko de tiu registaro, la laboristaj kaj civitanaj konfliktoj, la brutalo de la polico sufokante tiujn mobilizojn, la ekspropriigo de hipotekitaj loĝejoj, la privatigado de publikaj, ŝtataj entreprenoj, la skisma, sendependecema politiko en iu regiono de la lando...

Dum la du jaroj kaj duono pasintaj de tiam, ĉiuj menciitaj problemoj pliakriĝis kaj aperis novaj aferoj. Kreskiĝis la senlaboreco kvankam ŝajnas ke lasttempe iomete pliboniĝis la situacio tiurilate... aŭ almenaŭ pri tio fieras la registaro. Daŭre estis konfiskado, far la bankoj, de loĝejoj de familioj kiujn ne povis pagi la hipotekon tial ke ili perdis sian laborpostenojn. Foje estas ia, ne granda, civitana rezisto al tiu loĝej-konfiskado, sed la polico perforte sufokadas tian agadon. La polico obeas la regantaron kaj ĉi tiu estas lakea servistaro de la bankoj kaj la posedantoj de kapitalo. La ŝtataj subvencioj por socialaj servoj estas draste malgrandigitaj, kaj oni privatigis multajn hospitalojn domaĝe al saneco de la civitanaro kaj favore al la pliriĉiĝo de la kapitalistoj kiuj akiris tiujn sanec-centrojn. En la ŝtataj budĝetoj oni malgrandigis ankaŭ la fodusojn asignitaj al la universitatoj kaj la edukistemo ĝenerale: stipendioj al la gestudentoj, lernejoj manĝejoj... malplibonigante la kvaliton de la publika intruado. Tamen la impostojn kiujn nutras tiujn ŝtatajn budĝetojn estis plialtigitaj, malplibonigante la viv-konforton de la civitanaro. Alie oni plialtigis ankaŭ la koston de la servoj de la justicaj tribunaloj. Tiaj kiaj restis tiuj aferoj de la saneco, la edukado kaj la justico, nur la riĉuloj povas ĝui ilin. Cetere, la soci-ekonomia diferenco inter la plej altaj klasoj kaj la plej malaltaj konsiderinde pligrandiĝis.

Iu problemo kiu fariĝis speciale grava en Hispanio dum la lastaj jaroj estas tiu de la koruptado. Multaj politikistoj, plejmulte tiuj de la reganta partio, sin vidis/as implikitaj en skandalaj aferoj de koruptado. Eĉ membroj de la reĝa familio falis en tiutipaj aferoj. Ĝuste antaŭ unu jaron la Reĝo Johano-Karlo la 1-a abdikis la kronon favore al lia filo la princo Filipo kiu de tiam reĝas kun la nomo Filipo la 6-a. Ankaŭ la registar-prezidento Rajoy devus demisii pro lia impliko en eksterleĝa financado de sia partio, sed tamen li kun tre cinika aplombo daŭre efektigas sian abomenindan politikon sciante ke en nia malfeliĉa hispana socio ne estas tradicio de politika honesteco kaj la popolo ne bone scias defendi siajn rajtojn tiurilate. Multaj ĉiurangaj politikistoj de la reganta partio, kaj ankaŭ iuj de aliaj partioj kiuj regadis je loka kaj regiona nivelo, intervenis en kazojn de koruptado konsistantaj en asigni publikajn negocojn al entreprenistoj kiuj pagas tiujn favorojn per eksterleĝaj makleraĵoj. Plej grave estas ke la regantaro trouzas sian politikan povon por malfaciligi la laboradon de la juĝistoj kiuj esploras tiujn deliktojn. Tiutipa agado sendube estas tre ofta en la arabaj kaj afrikaj landoj, sed en Eŭropo, kvankam ne mankas kazoj de koruptado, kiam ĉi tiuj estas malkovrataj la implikitoj sin vidas devigitaj demisii. Tiurilate Hispanio pli estas Tria-Monda ol Eŭropa lando. La sensiveco pri tiuj temoj estas rekte proporcia al la grado je kulturo aŭ klereco, kaj tiu grado en Hispanio ĉiam estis malalta, kvankam iom-post-iom tiu afero pliboniĝas.

Menciinda estis tio okazinta en monato majo de la pasinta jaro okaze de la balotado por elekti deputitojn por la Parlamento de Eŭropa Unio. Sed unue ni devas rememori ke printempe de la jaro 2011, konkrete ekde la 15-a de majo, okazis en preskaŭ ĉiuj hispanaj urboj, ĉefe en Madrido, kolosa spontana manifestacio aŭ amasa koncentriĝo kies partoprenantoj baldaŭ ricevis la nomon je "indignitoj" kaj kiuj poste havis imitantojn en aliaj landoj. Nu, tiu mobilizo, kvankam post malmultaj semajnoj estis tute ĉesinta, tamen ne okazis vane. La plej efikaj kaj fruktodonaj revolucioj estas tiuj kiuj okazas nerimarkite, sen perforto, eĉ kun ne-longa daŭro... Tion oni povas diri pri la movado de majo de 1968 en Parizo kaj aliaj lokoj. Post malmultaj semajnoj restis nenio el la okazinta malordo, sed... la mondo jam ne plu estis la sama kiel an-

taŭ la mobilizado. Post majo-1968 radikale kaj definitive komenciĝis ŝanĝi la pensmanieron de la personoj rilate al la sekseco, la geedziĝo, la feminismo, la ekologio, la hipokritaj sociaj konvencioj... Io simile okazis en Hispanio post la movado de la indignitoj. Tiam komencis ruiniĝi la fido de ampleksaj amasoj pri la politika sistemo kaj la dupartiismo kiu karakterigis ĝin dum la antaŭaj jardekoj. Ankaŭ vekiĝis, ĉefe en la novaj generacioj, la rifuzo kaj la naŭzo pri la ega politika koruptado de nia lando. Tiu socia ŝanĝo unuafoje evidentiĝis en la menciita balotado por la Parlamento de la Eŭropa Unio. Tiam, surprizige por ĉiuj, unu el la kandidataroj de la grupoj inspiritaj en la depostuloj de la indignitoj de la 15-M atingis konsiderindan rezulton: 8 procento el la voĉdonoj de la lando kun akiro de 5 el la 54 eŭropaj deputitoj de la lando. Ĉefe surprizis la fakto ke tiuj ĝis tiam nekonataj uloj de tiu kadidataro atingis pli da voĉdonoj kaj deputitoj ol la partio de la tradicia maldekstraro **Unuigita Maldekstro** en kiu enkadriĝas la komunistoj. Post tio, la membroj de tiu kandidataro organiziĝis kiel laŭleĝa partio kun la nomo "**Podemos**" kiu signifas: "ni povas", "ni kapablas". Tiu partio havas karakteraĵojn de kontraŭsistema organizaĵo, kun rifuzo de la koruptado kaj postulo de primaraj balotadoj por interna elektado en la partioj, samkiel la celo elabori novan kaj pli demokratian Konstitucion kaj kontraŭbatali la subpremigan politikon kiun oni plenumas favore al la bankieroj kaj la kapitalistoj.

De tiam okazis pliaj balotadoj en la lando, en kiuj la nova politika forto, **Podemos**, atingis pli kaj pli bonajn rezultojn. Ilia stilo estas imitata de aliaj partioj kaj eĉ ene de la dekstraro oni entreprenis similajn ŝanĝojn (primaraj internaj balotoj...) kaj eĉ naskiĝis nova dekstrara, burĝa partio kiu minacas la hegemonion de la reganta **Popola Partio** regata de Rajoy. La 24an de majo okazis municipaj balotoj en la tuta lando kaj regionaj balotoj en multaj el la hispanaj regionoj. La plej rimarkinda fakto de la balota rezulto estas ke la reganta partio perdis grandan parton el ĝia influo, la kontrolon de iuj regionoj kaj multaj urboj, kaj tio anoncas eblan malvenkon en la ĝenerala balotado kiu devas okazi antaŭ la fino de la jaro. En tiaj cirkonstancoj kaj kun la fono de la politika ŝanĝo okazinta en Grekujo, la agresemo de la reganta partio estas generante ian radikaliĝon de la politikaj pozicioj. Kaj tio okazas kadre de la pliintensiĝo de la naciismaj kontraŭdiroj en la kataluna regiono kie ekzistas konsiderinda skisma, sendependeciga emo. Kaj ankaŭ kadre de monda situacio kun preskaŭ trideko da militaj konfliktoj kiuj, fakte, konstituas kvazaŭ mond-milito laŭsence ke en ili intervenas, eĉ se malkaŝe, la ĉefaj potencoj de la mondo.



ESPERANTLINGVAJ BALOT-AFIŜOJ EN BARCELONO

Unu el la ĉefaj kandidatoj por la urbestra posteno en Barcelono uzis Esperanton en sia balot-kampanjo. Ŝiaj multlingvaj reklam-afiŝoj montris sloganojn kiel "*ili volas nin solaj – ili vidos nin kunaj*" kaj "*La demokratia revolucio apartenas al ĉiuj*". La bildo montras iuj el la balot-afiŝoj en Esperanto, videblaj en la stratoj de Barcelono dum la balot-kampanjo. La vizaĝo estas tiu de politikistino kiu havis realajn ŝancojn fariĝi urbestro de Barcelono post la municipaj balotoj dimanĉe la 24-a de majo. Ŝi nomiĝas Ada Colau (elp. Kolaŭ') kaj la listo per kiu ŝi kandidatas nomiĝas "Barcelona en Comú" (mallonge BeC), esperantigebla per, proksimume, "Barcelono kune". En la balotoj ŝia platformo, en kiu estas integrita **Podemos**, gajnis plej multajn voĉ-donojn, kvankam ne sufiĉaj por absoluta plimulto, sed poste pere de koaliciantaj partioj ŝi povis esti elektita urbestrino.



De antaŭ kelkaj jaroj, ĉiu numero de **Heleco** speciale pritemas iun specifan aferon, kiun ni nomas «ĉef-temo», ĝenerale konekse kun iu historia datreveno aŭ en rilato kun la jaro de la revua eldono. Ĉi-foje ni volas memori ion okazintan antaŭ du jarcentoj. En 1815 Napoleono Bonaparte eskapis el Elba-insulo kaj revenis al Parizo. Poste, en monato junio, post tiu periodo nomata «La cent-taga imperio», li estis venkita en la batalo de Vaterlo kaj tio signifis la definitiva ĉeso de tio kion li signifis en Eŭropo dum pli ol unu jardeko. Sed tiam, kaj pro la sama kialo, estis ankaŭ la fino de alia pli grava afero. Ja, la malapero de Bonaparte el la historia scenejo signifis kaj ebligis la restariĝon de la absolutisma monarkio en Francio, t. e. la fermo de ia historie grava periodo ne nur por tiu lando sed ankaŭ por la tuta Eŭropo kaj eĉ la mondo, la periodo komenciĝinta en 1789, la Franca Revolucio. La ensemblo de la Franca Revolucio kaj la Napoleona Imperio konstituis iun parentezon en la historio de Francio, sed grava ankaŭ por la universala historio.

Nu, ĝuste pri tiu historia parentezo ni volas temi en la ĉi-jaraj numeroj de **Heleco**, kaj la esprimo “ĉi-jaraj numeroj”, plurale, estas pro tio ke laŭlonge de la nuna jaro 2015 ni planas eldoni du numerojn de ĉi tiu revuo. Krom ĉi tiu 91-a numero ni volas eldoni, antaŭ la fino de la jaro, pluan duan numeron, kiu estos dediĉata al la Napoleona Imperio. Ĉi-numere ni pritemas la unan parton de la menciita historia parentezo: La Franca Revolucio.

Nia pritrakto de la afero, tra kelkdeko da paĝoj, kompreneble, ne povas esti tro detala por priskribi la multenombrajn okazintaĵojn de tiu periodo, sed ni intencas ke la raporto sufiĉe profunde esprimu la esencon de tiu interesa ŝanĝo-procezo. Sed, ĉefe, ni volas atingi ankaŭ tion, kio estas la vera celo de ĉiu historia pristudo: eltiri el la pasinteco instruon kiu estu profitdona por la nuntempo. Kaj tio tre gravas nun, kiam multaj signoj ŝajnas indiki ke ni troviĝas en alia historia flekso-punkto aŭ komenciĝo de ŝanĝo-procezo en nia lando kaj ankaŭ mond-skale. La instruo-eltiro, supozeble, estas io kio okazas dum la studado de la historiaj eventoj, kaj ĉefe en la fina bilanco de la ensemblo de la raporto, ne je ĉi ties komenciĝo. Tamen, ni volas antaŭ-atentigi la legantojn pri iu cirkonstanco ligita al ĉiuj ĝisnunaj ŝanĝo-procezoj. Kutime ili okazis meze de kaj pere de sociaj konvulsioj, malordo, perforto... La periodo inter 1793 kaj 1815, objekto de ĉi-studo, ne estis escepto sed tute male; oni verŝis multe da sango dum la Revolucio kaj okaze de la Napoleonaj militoj. Sed, de-perspektive rigardata la afero, oni konstatas ke tiom da homa doloro estis senutila kaj ne-necesa: la celoj de sango-verŝado aŭ ne estis atingitaj, aŭ oni same estus atingeblaj sen la perforto. La fakto ke daŭre estas militoj kaj perforto en la mondo montras ke la homaro ankoraŭ ne lernis tiun lecionon.



La antaŭ- revolucia situacio

Temante pri revolucio, la studo de ties antaŭaĵoj, t. e. la situacio en kiu ĝi okazis, estas esenca faro. Oni povas diri ke grandparto el la revolucia intereso situas ĝuste en la etapo antaŭ la disvolviĝo de la revoluciaj okazintaĵoj. Priskribi tiun antaŭrevolucionan etapon estas formuli la kaŭzojn de la revolucio. La kaŭzojn kaj la protagonistojn, kaj ankaŭ ĉi-ties interesojn kaj celojn. Do ni dediĉos la necesan atenton al la priskribo de la situacio en Francio antaŭ la serio da eventoj komenciĝintaj en 1789.

Dum la lastaj jardekoj de la 18-a jarcento estis okazante en multaj landoj, ĉefe en Okcidenta Eŭropo, grandaj ŝanĝoj en la ideoj kaj en la produktad-sistemo, kio generis ian soci-politikan evoluon de la feŭdismo al la kapitalismo, t. e. ŝanĝoj en la formo laŭ kiu la homoj interrilatis unuj kun la aliaj kaj kun la naturo por organizi la produktadon. Tamen, tiuj feŭdismaj kaj kapitalismaj interrilatoj ne koncernas nur al la materia flanko de la produktado sed influas ankaŭ sur la diversaj sferoj de la socia vivo, ekde la ŝtato kaj la leĝoj, ĝis la maniero interpreti la mondon kaj la lokon kiun la homo okupas en ĝi.

Tiel la feŭdisma kiel la kapitalisma socio baziĝas en ia divido de la loĝantaro en sociaj klasoj kun malsamaj intereso, t. e. antagonismaj soci-klasoj. En iu flanko troviĝas tiuj kiuj laboras, kaj aliflanke situas tiuj kiuj ne laboras kaj vivas el alies laboro. Sed krom tiu komuna eco de ambaŭ socioj, ekzistas inter la feŭdismo kaj la kapitalismo gravaj diferencoj kiujn oni devas prikonsideri se oni volas kompreni pri kio temis la Franca Revolucio. Por kompreni ke tiu revolucio estis la solviĝo de la kontraŭdiroj inter ambaŭ soci-sistemoj oni devas prikonsideri ke en la Francio de la 18-a jarcento kvankam la feŭdismo estis la superreganta sistemo, la kapitalisma produktad-maniero, tamen, estis sufiĉe disvolvita. Kompreneble, por ke estu antagonisma interbatalado devas ekzisti antagonistoj, kaj ĝuste tio estis en Francio, kaj krome ambaŭ antagonistoj estis sufiĉe potencaj. Ni trastudu ilin.

La loĝantaro de Francio fine de la 18-a jarcento estis, proksimume, 25 milionoj da personoj. La ekonomio baziĝis, ĉefe, sur la agrokulturo. Parizo, kun 650.000 enloĝantoj estis iu el la plej grandaj urboj tiutempe. Nur Londono, kun 850.000, estis pli granda. 80 procento el la francoj estis kamparanoj. La nobelaro konsistis el 400.000 personoj, plus 100.000 membroj de la klerikaro. Estis ankaŭ metiistoj, vendistoj, et-bienuloj, instruistoj... kiuj loĝadis en la urboj. Kaj fine estis la burĝaro aŭ mez-klaso, kiu ĝuis pli favoran pozicion ol la kamparanoj sed malpli favoran ol la aristokratanoj.

La transiro de la feŭdismo al la kapitalismo estis sufiĉe kompleksa kaj disvolviĝis laŭlonge de kelkaj jarcentoj. En Francio kaj diversgrade en aliaj landoj, en la kadro de la feŭdisma sistemo aperis kaj iompostiom konkretiĝis du malsamaj sociaj klasoj: la burĝaro kaj la proletaro. La diferenco inter ambaŭ grupoj estis la malsama rolo kiun ili ludas en la ekonomia tereno. La burĝaro aĉetas kaj igas funkcii la laborforton de la proletaro, kiu sin vidas ekonomie devigata vendi ĝin. Sed krom tio ke tiu ekonomia interrilato ne estis tre rimarkebla nek difinita en la antaŭrevolucia etapo, estas la fakto ke ambaŭ grupoj gravis malmulte en la ensemblo de la klasa strukturo de la feŭdisma socio, kiu konsistis el grandnombro da klas-tavoloj kun komplika sistemo de interrilatoj. Ĉiu el tiuj sociaj tavoloj havis specifajn rajtojn kaj devojn, kaj notindas ke la funkciado de la inter-tavolaj rilatoj ne havis ekonomian karakteron sed juran kaj politikan. Ekzemple, la rilato inter la kamparanoj kaj la nobelaro –kaj laika kaj klerika– estis certigita ne per ekonomiaj meĥanismoj sed per la uzado de la povo kaj la forto.

La franca nobelaro, kiu nombris malpli ol 2 procento el la tutlanda loĝantaro, posedis 20 procento el la tero. Sed krome tiu klaso ĝuis multajn rajtojn akiritajn jam de Mezepoko. Ili havis la monopolon pri ĉasado, posedado de muelejoj, uvo-premejoj, oleo-premejoj, fornoj por pano-bakado...

Multaj aristokratoj havis rajton pri justico kaj kontrolo de kamparaj vilaĝoj. Alia privilegio de tiu klaso estis ke ĝiaj membroj estis liberigitaj el la reĝaj impostoj kaj aliaj servoj, kaj male, ili ricevadis impostojn truditajn al la kamparanoj. Kroma privilegio de la nobelaro estis la monopolo de la postenoj de la centra administracio, de la municipoj kaj la regionoj, ĉar la aliro al tiuj aŭtoritataj funkcioj posedis ian heredan karakteron. Kaj paradokse tio okazis eĉ en institucioj kiaj la parlamentoj, kiuj estis kreitaj de la monarkio ĝuste por centralizi la reĝan povon limigante la feŭdisman povon de la aristokrataro, kaj kiaj la reĝaj tribunaloj kies celo estis, ĝuste, eviti la arbitro de la juro de la feŭdaj sinjoroj. Ja, la parlamentoj estis kreitaj kiel tribunaloj de regulita rajto kaj por registri la leĝojn. Tamen, fakte, ili fariĝis bastiono de la aristokrataro kiu sukcesis verdikti tute arbitre kaj ofte efektive vetoo-povon pri decidoj de la monarkoj sin neante registri leĝojn kiuj ne estis konvenaj por ilia klaso.

Post la komenciĝo de la reĝado de Ludoviko la 16-a, la nobelaro kiu estis vidante ŝanĝiĝi la mondo ĉirkaŭ ĝi, entreprenis ofensivon celante rehavi antikvajn privilegiojn kiujn tiu klaso estis perdinta pro la centralizado de la absolutisma ŝtato. La aristokratoj restarigis antikvajn altrudojn kontraŭ la kamparanoj. Ili atingis ke nur iliaj membroj povu aspiri al la episkopaj seĝoj kaj al la plej altaj rangoj de la armeo.

Tamen ene de la nobela klaso estis multaj diferencoj de rango kaj povo, kaj granda malakordo inter la membroj de la diversaj nobelaj tavoloj.

La katolika klerikaro konstituis apartan klason kun siaj propraj posedaĵoj kaj privilegioj. Ankaŭ la membroj de tiu klaso estis liberigitaj je impostoj kaj servoj al la krono. La plej altrangaj membroj de tiu klaso posedis feŭdajn rajtojn kaj ĝuis la rajton trudi al la kamparanoj la pagon de dekonon el la produktado. La Eklezio posedis dekonon el la franca teritorio, kaj en la ideologia tereno ĝi havis enorman povon ĉar ĝi kontroladis preskaŭ tute la eduk-sistemon kaj efektive gvidadis la cenzuron. Krome ĝi realigadis grandan propagandon ekde la predikejoj sur la loĝantaro altgrade malklera, kaj kontrolis la instrumentojn de socia bonfarado. Ankaŭ ene de la klerika klaso ekzistis granda stratumiĝo; ekzistis profunda breĉo inter la alta kaj la malalta klerikaro. La unua povas esti difinita kiel la religia parto de la aristokrataro. La dua, pro ĝia situo en la vilaĝoj kaj ĝia viv-maniero pli similis al la kamparano. Plejparto el la rimedoj elprenitaj en la parokejoj iris destinitaj al la kaso de la episkopoj kaj la monaĥejoj.

En la antaŭrevolucia epoko, 80 procento el la francaj familioj loĝadis en la kamparo. Male ol tio okazanta tiam en plejparto el la eŭropa kontinento, proksimume triono el la francaj kamparanoj estis proprietuloj. Tamen tio ne signifis ĝeneralan bonstaton en la kamparo ĉar la feŭdan ekspluatadon oni efektive gvidadis ne nur kontraŭ la kamparaj servutuloj sed ankaŭ kontraŭ la et-bienuloj pere de diversaj impostoj.

Ja, la kamparanoj suferadis pezan ŝarĝon je rentoj, tributoj, impostoj kaj servoj truditaj de la feŭdsinjoroj, pastroj kaj reĝoj. Dubindas ĉu la kamparano de Francio konstituis homogenan klason. La evoluo de tiu kolektivo ekde antaŭ pluraj jarcentoj generis grandajn diferencojn inter la membroj de tiu granda homamaso. Unu el ĉiu kvaroj da kamparanoj estis proprietulo kaj alia estis tag-laboristo. Tio signifas ke estis prosperante en la kamparo la kapitalismaj interrilatoj. Plej supre de la kolektivo estis iu klas-tavolo da kamparanoj kiu fariĝis lu-prenantoj. Ili pagadis al la terposedantoj iun renton, kiu jam ne estis feŭd-stila sed lu-preza, po unu terpeco kaj/aŭ best-gregoj, kaj akiradis salajritan laborforton. La salajruloj estis la faktaj kampar-laboristoj, taglaboristoj devigitaj vivi el la salajro ricevita po unutaĝa laborado. Ĝenerale, la altrangiĝo de la lu-prenantoj estis en rilato kun ilia plenumado de iuj politikaj kaj administraj funkcioj en la vilaĝoj; ili estis la vilaĝaj kacakoj komisiitaj por distribui inter la familioj la pagon de la feŭdaj ŝarĝoj truditaj al ĉiu vilaĝo. Ofte la lu-prenantoj de la ofico de imposto-kolektisto estis personoj multe pli timindaj ol la feŭdsinjoroj mem ĉar ili ĝisfunde konis la situacion de ĉiu familio kaj ĝuste sciis kiom ili povis postuli.

La malaltaj tavoloj de la kamparana klaso estis konstituita de la t. n. "farmantoj je duono", ia tarda formo de la mezepoka servuteco. Tiuj terkulturistoj estis devigitaj transdoni duonon el la rikoltaĵoj al la terproprietuloj aŭ la feŭdsinjoroj. Ili troviĝis en transira momento al la situacio de la ekspropiitaj taglaboristoj. Kiam la rikolt-duono kiun ili rajtis ne sufiĉis por la subtenado de iliaj familioj, ili devis dungigi kiel salajruloj por iu ajn laboro. Tiamaniere, la membroj de tiuj klastavoloj, cetere tre multnombraj, estis samtempe ekspluatitaj laŭ la antikvaj feŭdismaj formoj kaj la novaj kapitalistaj interrilatoj. Iu grava faktoro de la progreso de la kapitalismo en la kamparo estis la fiziokratiaj ideoj de la ekonomikistoj de la 18-a jarcento. Cele plikreskigi la profiton de la terkultura laboro, la anoj de tiu ekonomika skolo postuladis la ĉirkaŭbaron de agrokulturaj terenoj, la privatan alproprigon de komunaj teroj ankoraŭ apartenantaj al la vilaĝaj komunumoj kaj la abolicion de la feŭdismaj rajtoj kiuj malhelpis kelkajn tipojn je industria agado. La ideoj de la fiziokratistoj povas esti resume esprimitaj per la frazo *laissez faire, laissez passer* (lasu fari, lasu agi). Ili celis transformi la feŭdisman proprieton kaj ekspluatadon al kapitalista propio kaj ekspluatado, kaj konsideris la terkulturon kiel origina fonto de ĉia riĉeco, ĉar nur ĝi permesus grandan gajnjon je malgranda investado. La tero estus la nura vera riĉeco, aliaj ekonomiaj sektoroj nur transformis la produktojn de la tero. La terposedantoj estis rigardataj kiel la veraj agantoj de la riĉeco de la lando.

Ankaŭ la metiistoj de la urboj troviĝis en procezo de transirado de ilia enkadriĝo en la feŭdisma sociordo al ilia transformiĝo kiel salajruloj. Ekde Mezepoko

la diversfakaj metiistoj organiziĝis en gildoj aŭ metiaj asocioj. La gildoj estas mezepokaj korporacioj de sammetianoj aŭ samprofesianoj, posedantaj la rajton de leĝa persono kaj submetanta siajn anojn al kolektiva disciplino. Tiu sistemo samtempe ke ĝi estis garantio kaj defendo de la rajtoj de la metiistoj, ĝi estis ankaŭ baro kaj malhelpo de la progreso de la industrio de produktado de grandkvanto da necesaj baroj por la socio. Do, la industriigado iĝis nehaltigebla sed ĝi estis kreante grandamason da senrajtaj salajritaj laboristoj. Oni povas konsideri ke la opono de la metiistoj al la kapitalismo samtempe estis progresema –ĉar ili kontraŭstaris la kapitalistan ekspluatadon– kaj reakcia –ĉar en ilia teniĝo kontraŭ la kapitalismo ili postulis reiri al pasintecaj formoj de la socio–. En la revolucia disvolviĝo, ilia malamo al la riĉularo iĝis ilin ludi gravan rolon en la radikaligo de la revolucio.

Alia klaso kiu tre rolis en la revolucia procezo sed kiu, tamen, havis klaran ideon pri sia intereso kaj la maniero atingi ĝin, estis la mez-klaso aŭ burĝaro. Sed, same kiel okazis en aliaj klasoj antaŭe menciitaj, ankaŭ ene de la burĝaro ekzistis grandaj diferencoj inter ĝiaj membroj. En la plej altaj tavoloj de tiu klaso estis la komercistoj, ligitaj al la kolonia komerco, kaj la financistoj. Ĉi tiuj sociaj sektoroj riĉiĝis dank al ilia rilato kun la reĝa kaj la nobelara povoj, kaj iuj membroj el tiu kolektivo integriĝis en la aristokrataron pere de aĉeto de nobel-titoloj aŭ edziĝo kun filinoj de nobeloj ekonomie malfortaj. Pli multnombra estis la membraro de la burĝa tavolo de la proprietuloj de manufakturaj uzinoj. Tiuj posedantoj de la industria kapitalo fariĝis la dominanta grupo. La interesoj de tiu klaso samtempe ke ili estis kontraŭ la feŭdismo, jam de tiam –antaŭ la revolucio– kontraŭstaris la interesojn de la laboristoj. Oni povas konsideri ene de la burĝaro ankaŭ multajn profesiulojn ligitajn al la burokrataro de la ŝtata aparato. El ĉi tiu sektoro eliros multaj revoluciaj aktivistoj.

La franca ŝtato en tiu antaŭrevolucia etapo estis la t. n. «absolutisma monarĥio». Estas polemiko pri la difino de tiutipa ŝtato. Laŭ iuj ĝi estis plene feŭdisma, sed laŭ alies opinio temis pri alianco inter monarĥia ŝtato kaj disvolviĝanta burĝaro kontraŭ la povo de la feŭd-sinjoroj. Oni perceptas en tiu reĝimo, kaj aliaj de Okcidenta Eŭropo de la sama epoko, ecojn kaj karakteraĵojn de ambaŭ menciitaj modeloj. Verdire, ne temis pri senmova situacio, la kontraŭdiraj fortoj kaj interesoj estis en bolanta stato kaj tio okazigis konfliktojn kaj politikan kaj kulturen kontraŭfrontigon de diversaj fortoj. La feŭdisma naturo de la absolutisma monarkio neniel signifas ke la feŭd-sinjoroj ne havis konfliktojn kun la centra povo. Male, la centralizo de la povo de la monarkio implikis senigi la nobelaron el iuj antikvaj rajtoj kaj privilegioj. La povo de tiuj aristokratoj ne baziĝis nur sur la propio de la tero sed ĉefe sur hereda karaktero de politikaj rajtoj. La ekzistado de lokaj armeoj estis esprime kaj garantio de tiu dispartigita suvereneco. Ki-

am la monarĥoj devis kontraŭfronti tiujn povojn ili devis entrepreni militojn kiuj postulis enormajn elspezojn, kiuj siavice iĝis necesaj egajn impostojn. La centralizo estis komuna intereso de la reĝo kaj la urbaj burĝaroj. Multokaze ambaŭ devis kontraŭfronti la aristokrataron kaj la lokajn nobelojn.

Kompreneble, tiu alianco inter la monarkio kaj la burĝklaso ne estis natura sed konjunktura. La ekzistado de duraj konfliktoj inter la feŭd-sinjoroj kaj la monarkia povo ne signifas ke inter ili ekzistus nerepacigebla antagonismo. En tiel kontraŭdira kaj senĉese ŝanĝiĝanta situacio, la «absolutisma monarĥio» neniam estis tute absolutisma.

Kiam Ludoviko la 16-a estis kronita en la jaro 1774, restis malmulte el la absoluta povo kiu permesis al la monarkio altrudi sian volon sur la nobelaro. La feŭdisma reakcio de la dua duono de la 18-a jarcento estis vera ofensivo kontraŭ la povo de la monarkio. La aroganta aristokrataro celis restarigi rajtojn kaj privilegiojn kiuj fariĝis arkaikaj de antaŭ preskaŭ tuta jarcento. Ĉi tio signifis pli grandan ekonomian premon sur la kamparanoj. Parto de tiu sama postulo estis la postulo de kunvokado de la **Ĝeneralaj Statoj**. Vidante ĉi tion, povus ŝajni ke ekzistis radikala antagonismo en Francio inter la nobelaro kaj la monarkio. Tamen, la klasa intereso kiu estis malantaŭ tiuj disputoj reaperos kiam ambaŭ kontraŭfrontos komunan malamikon.

Priskribinte la sociajn klasojn de la antaŭrevolucia Francio kaj ties interesojn kaj kontraŭdirojn, konvenas iome raporti pri la ideoj kiuj inspiris la revoluciuojn. Multaj el la sociaj perturboj okazintaj fine de la 18-a jarcento estis rekte aŭ nerekte influitaj de la ideoj de la t. n. **Klerismo**. Tiuj ideoj estis respegulo de la necesoj kaj streĉiĝoj de ŝanĝiĝanta socio kaj baziĝis sur la nova scienca kono de la 18-a jarcento, kiu generis novan fidon sur la racio kaj la progreso. Unue, tio stimulis ian rifuzon de la aŭtoritato kaj akcepton de la **Homaj Rajtoj** inspiritaj en la verkaro de Rousseau. Aliflanke, la novaj ideoj estis inspiro ankaŭ por la monarkoj, kiuj, fine de la 17-a jarcento, komencis koncentri kaj kontroli la povon kaj regadi pere de burokrataraj agentoj nomumitaj de ili. Tamen, tiu centraligo vekis la reziston de ĉiuj kiuj havis interesojn en la **Malnova Reĝimo**, Eklezioj, gildoj kaj korporacioj kaj, ĉefe, la aristokrataro. Iliaj lideroj sin turnis al la teorioj de Montesquieu por pruvi ke la socio estis ia organisma formo kaj ke iliaj tradiciaj grupoj ne nur asignis necedebajn rajtojn al ĝiaj membroj sed krome generis iun povekvilibron kiu protektas la homojn el la tiraneco.

En la kadro de tiu kontraŭfrontiĝo inter la klerismaj kaj la tradiciismaj ideoj okazis en Francio la publikigo de la Enciklopedio. Ĝia rekta celo estis la diskonigo de la novaj sciencoj, sed tion farante, fakte, ĝi utilis por ruinigi la teoriantan bazon kiu subtenis la instituciojn de la **Malnova Reĝimo** kaj disvastigis la ideojn de liberpensado. Tiu kultura evoluo, plus iu grava ekonomia krizo, ebligis la revolucion.

Krizas la Malnova Reĝimo



Se por kompreni iun revolucion estas interese koni ties antaŭaĵojn, ne malpli interesa estas studi ankaŭ la krizon kiu provokas la revolucion eksplodon. Estas du malsamaj tempoj kaj ritmoj; la antaŭrevolucia situacio estas longa periodo, la kondiĉoj maturiĝas dumlonge kaj malrapide, dum jardekoj, eĉ dum pluraj jarcentoj kiel en la kazo de la Franca Revolucio kiun ni priraportas, sed la fina krizo estas rapida sinsekvo da eventoj kiuj vekas la partoprenon de la amasoj, tiuj amasoj kiuj dumlonge estis paceme suferante la mizerojn de la sistemo. Temante pri ĉi tiu afero, iam Lenino verkis:

Kiuj estas, ĝenerale, la distingaj signoj de iu revolucia situacio? Ni certe ne eraras montrante ĉi tiujn ĉefajn signojn: 1) la neebleco ke la superregantaj klasoj konservu ilian dominadon senŝanĝe. Ia ajn "krizo en la sistem-pinto", ia politika krizo de la superreganta klaso, malfermas fendon tra kiu violente penetras la malkontento kaj la indigno de la subpremataj klasoj. Por ke okazu revolucia eksplodo ne sufiĉas ke la malaltklasuloj ne volu vivadi kiel antaŭe, sed estas necese ankaŭ ke la altklasuloj ne plu povu vivadi kiel ĝis tiam. 2) Ia malboniĝo, pli granda ol kutime, de la mizero kaj la penoj de la subpremataj klasoj. 3) Ia konsiderinda pliintensiĝo, pro la menciitaj kialoj, de la aktivismo de la amasoj, kiuj en la "pacaj" tempoj sin lasas trankvile prirabi, sed kiuj en turbulaj epokoj, estas pelitaj tiel de la kriza situacio ĝenerale kiel de altrangularo mem al iu historie sendependa agado.

Iu revolucio estas radikala transformiĝo de la socio. La rompiĝo de la normala situacio igas ke la ŝanĝoj okazu dum mallonga tempo. Sed, kiel prave asertis Lenino, por ke la amasoj intervenu amase kaj impete ne sufiĉas la malkontento kaj la mizeraj vivkondiĉoj. En Francio la unua romp-paŝo ne estis farita de la burĝuloj, nek de la kamparanoj, nek de la senkulotuloj. La politika krizo komenciĝis per iu feŭdisma

reakcio kontraŭ la reĝa povo. La akreco de tiu disputo daŭris ĝis kiam aperis sursceneje la "Tria Stato" kaj la diversklasaj fortoj reenviciĝis laŭ malsama akso de kontraŭfrontiĝo.

La "krizo en la sistem-pinto" komenciĝis en Francio per la financa bankroto en 1787. La interveno en la anglo-usona milito okazigis al la franca ŝtato ian ŝuldon malfacile eltenebla. La pago de la interezoj, la subtenado de la armeo kaj la diplomatia aparato forgluadis tri kvaronojn el la elspezoj de la monarkio. Ne estis alia solvo ol pligrandiĝi la impostojn kaj ne eblis fari tion koste de la laboristaj klasoj sed jes ja de la privilegiuloj. La ministro pri Financoj, Charles Alexandre Calonne, ellaboris programojn je reformoj surbaze de la ekonomiaj teorioj de la fiziokratistoj. Li proponis la kreadon de iu nova imposto pri la tero. Male ol ĝis tiam, por determini la pago kvanton oni ne prikonsiderus la rangojn de la proprietuloj sed oni aplikus procenton laŭ la fekundeco de la teroj. Tio estas, la fiska reformo signifus ŝanĝi la karakteron de la teroj, kiuj ĉesus estis feŭdisma propraĵo por fariĝi kapitalisma propraĵo.

La nobelaro reagis kontraŭ tiutipa politiko. La aristokratoj disponis je politikaj kaj instituciaj rimedoj por kontraŭstari la ŝanĝon. Calonne intencis manovri proponante la kreadon de provincaj asembleoj por la distribuado de la nova imposto. La perado en tiuj asembleoj ne dependus de la personaj rangoj sed nur de la kondiĉo de proprietulo de teroj. Sed la klasaj fortorilatoj ne permesis la aplikadon de tiutipaj planoj. La aristokrataro sukcesis ke la ministro estu eks-oficigita kaj procesita. Ili asertis ke la parlamentoj ne rajtis registri reĝajn reglamentojn pri novaj impostoj, kaj ke nur asembleo de Ĝeneralaj Statoj povus fari tian aprobon. La Ĝeneralaj Statoj estis tipa institucio de la feŭdisma monarkio. Male ol la burĝaj parlamentoj, la Ĝeneralaj Statoj ne kunsidis periodece sed laŭ reĝa kunvoko. En ĝiaj asembleoj estis reprezentita la "tri statoj" aŭ "tri klasoj". La unua stato estis

la klerikaro, dua la nobelaro, kaj en la tria stato estis enkalkulitaj ĉiuj ceteraj sociaj grupoj. La rolo de la Ĝeneralaj Statoj estis konsili al la reĝo, esprimi iujn apelaciojn kaj aprobi novajn impostojn.

En Francio, la Ĝeneralaj Statoj ne estis kunvokitaj ekde la jaro 1614, t. e. de antaŭ 150 jaroj. De tiam, la sinsekvaj monarĥoj ne kunvokis tiun asembleon kaj tio estis kongrua kun la centralizado de la povo en la krono surbaze de la teorio de la dia rajto de la reĝoj. La urĝo de la problemo de la ŝuldo kaj la neebleco trovi solvon kun aristokrataro kiu, spite al ĝiaj internaj diferencoj, kuniĝis kontraŭ la perdo de ĝiaj politikaj kaj fiskaj privilegioj, igis necesa en 1788 la kunvokon de Ĝeneralaj Statoj por 1789. Dume daŭre malboniĝis la financa situacio pro la krizo de la franca manufaktura industrio rezulte de la konkurado kun la angla industrio. Ludoviko la 16-a nomumis ministro pri Financoj la svisan bankieron Jacques Necker kiu jam estis plenuminta tiun oficon en la jaro 1781. Oni esperis ke li kapablu atingi kreditojn. Li ne sukcesis bremsi la ofensivon de la nobelaro kaj mildigi la pezan ŝarĝon de la ŝuldo, kaj fiaskis same kiel lia antaŭulo.

La krizo de la sistem-pinto etendiĝis malsupren ekde la kunvoko de la Ĝeneralaj Statoj. La efektivigo de la balotado por elekti la reprezentantojn kaj la redaktado de la plendo-kahieroj permesis ke la propagando kaj la agitado etendiĝis de Parizo al la provincoj, de la ĉefurboj al la urbetoj kaj vilaĝoj, igante ke tio kio komence estis nura palaca intrigo fariĝu afero de tutlanda politiko. Kaj ekde kiam ekmoviĝis la t. n. “Tria Stato” la situacio radikale ŝanĝiĝis.

La Tria Stato ne estis, ĝust-parole, unu socia klaso. En ĝi estis enkalkulitaj diversaj klasoj kaj klas-tavoloj: burĝuloj, etbienuloj, senpropietaj kamparanoj, metiistoj, lakeoj, oficistoj, militistoj... kies intereso ne estis komunaj, kiel poste evidentiĝis dum la disvolviĝo de la revolucio. Tamen, la malamo al la parazita kaj disipema aristokrataro povis kunigi ĉiujn menciitajn kolektivojn, kiuj, ĉiuj kune, konstituus plejparton el la franca popolo. La detruo de la komunumaj interrilatoj en la kamparo pro la progreso de la kapitalismo kaj la postlasiĝo de la industria disvolviĝo estis kreante amason da mizeruloj kiuj amasiĝis en la urboj kaj kies vivado dependis de la sekal-pano kiun ili povus akiri tie. Serio da malbonaj

rikoltoj okazigis plialtiĝon de la prezo de la pano en la jaro 1789. Kutime en tiutipaj situacioj, la malriĉaj laboristoj ekribelis kaj atakis la magazenojn kie la akaparistoj retenadis la grenon spekulante pri la plialtiĝo de la prezoj, aŭ la veturilojn per kiuj oni portadis ĝin, aŭ la domon de iu muelisto, aŭ tiun de iu riĉulo kiu estis denunciata tial ke li estis kaŝante nutraĵon. Tiaj tumultoj okazadis kun alta grado je perforto en formo je incendioj, disrabo kaj linĉado. Sed, post la furiozo kaj la malordo la situacio kvietiĝis kaj la leĝa ordo restadis ĉiam netuŝita.

Tamen, la krizo de la pano de la jaroj 1788 kaj 1789 okazis en malsama kunteksto. La kunvoko de la Ĝeneralaj Statoj igis ke la perturboj pro la malsato, la mizero kaj la mortado de la malriĉuloj jam ne plu estis atribuitaj al tiu aŭ tiu ulo sed al la sinjoroj kiuj profitadis je la misfortuno de la popolo. Tia estis la stato je mobiliziĝo en kiu troviĝis Francio kiam fine

la 5-an de majo de la jaro 1789 okazis la malfermo de la kunsidoj de la Ĝeneralaj Statoj en Versajlo. La klasa elitismo de la nobelaro estis liberiginte fortojn kiuj finruinigis ĝin.

En la inaŭgura sesio de la Ĝeneralaj Statoj, proksimume 1200 deputitoj aŭskultis la diskurson de la reĝo. Proksimume duono el ili apartenis al la tria stato. Baldaŭ konkretiĝis la debato inter ĉi tiu kaj la ceteraj. La unua polemika afero estis decidi kiamaniere oni devus kontroli la validecon de la reprezent-rajto de ĉiu deputito. La unua kaj la dua statoj deziris ke ĉiu stato kontrolu la validecon de la rajtigiloj

de sia membraro, sed la malalta stato postulis ke tiu tasko devus esti realigata de la tuta asembleo de la Ĝeneralaj Statoj. Simila disputo okazis kiam la tria stato deklaris ke en la sesioj devus esti kune ĉiuj deputitoj, kaj ke la voĉdonado devus esti po ĉiu deputito, ne po-state. La slogano “ĉiu homo, unu voĉdono” estis formulo kiu situigis unu-flanke la trian staton kaj la reĝon, kaj kontraŭflanke la aliajn statojn. La diskutado pri tiuj temoj ne esprimis nuran malakordon pri proceduro-formoj celante balot-venkon en la voĉdonado de la asembleo. La disputo respegulis du malsamajn konceptadojn pri la socio, la politiko, la homa estaĵo... Fakte, estis kontraŭfrontiĝante du ideologioj kies formado estis daŭrinta jarcentojn. La ĝistiamia sociordo baziĝis sur iu konceptado kiu havis kiel premison la jura kaj politika malegaleco inter la sociaj klasoj aŭ statoj. La



La reĝo Ludoviko la 16-a

institucio de la Ĝeneralaj Statoj respeguladis la skemon de la tri-statan socion kiu estis ellaborita dum Mezepoko far la ekleziaj intelektuloj. Laŭ ties teorio, iuj homoj naskiĝis por preĝi, aliaj por esti soldatoj kaj la ceteraj por labori. Ĉiu el tiuj klasoj aŭ statoj estis, laŭ tiu teorio, kvazaŭ organo de la socia korpo, kiu bezonis la funkciadon de ĉiu organo por ke funkciadu la tuto. Kaj ĉi tio estis tiele laŭ dia ordono.

Malantaŭ la postulo de unupersona voĉdono enestas komplete refuto de la tradicia konceptado de la tiam valida socio. Laŭ la alternativa konceptado kiu enestis en la refut-teniĝo de la tria klaso, la homo kiel individuo konstituas la fundamenton de organizita socio. La politika kaj socia organizo prezentiĝas kiel rezulto de racia kaj propravola decido kiun la homoj, rajtegalece, interakordas. Laŭ ĉi tiu konceptado, la malegaleco kiu ne baziĝas sur la meritoj, la talento, la iniciato aŭ la laboro, estas aberacio de la naturaj rajtoj de la homo. La violentado de la rajtoj de la individuoj signifas violentado de ia natura ordo bazita sur la Racio (majuskle). Ĉi tiu burĝa konceptado de la mondo estis disvolviĝante ekde la finiĝo de Mezepoko kaj komenciĝo de la Moderna Epoko laŭ mezure ke la novaj laboro- kaj vivo-formoj estis diferencante la burĝaron kiel socia klaso. Multaj intelektuloj kontribuis koherigi tiun penson kaj interpreti ĝin kiel antagonismo kontraŭ la dominanta ideologio. La forto de ĉi tiu konceptado centrita en la individuo, la racio kaj la naturaj rajtoj estis pli kongrua kun la tiama socia realaĵo ol la skemo de la tri statoj. La teoria produktado de tiu burĝaro kun revolucia impeto atakadis la privilegiojn de la superregantaj klasoj, ilia parazitismo kaj malŝparema vivo-formo. Kompreneble, ĉi tiu kritiko estis alprenita ankaŭ de la kamparanoj, tag-laboristoj kaj etbienuloj. Sed tiu penso bazita sur novaj valoroj efikis ne nur sur la malaltaj klasoj. Ne malmultaj membroj de la nobelaro kaj la klerikaro alprenis tiun ideologion kiel propra. Ĝistioma grado estis disvastiĝinte la ideojn de la Klerismo ke multaj el ties postulatoj fariĝis parto el la komuna saĝo de multaj sektoroj en la epoko de la Franca Revolucio.

Tial, la debato pri la formo de la asembleo-balotado, kiu okupis kelkajn semajnojn de la Ĝeneralaj Statoj, estis nepre ligita al la afero de la naturo de la socio. Baldaŭ evidentiĝis ke la solvo de tiu problemo estis esenca kaj neprokrastigebla. La fama diskurso de la abato Sieyès pri la tria stato respegulis tiun konstataĵon. Jen citaĵo el tiu diskurso:

Antaŭ la evoluo de la okazintaĵoj kaj de la spiritoj, la Tria Stato devas konsciĝi ke ĝi povas esperi neniun krom el ĝia lumoj kaj kuraĝo. La racio kaj la justeco estas ĝiaflanke kaj devas certigi ĝian tutan forton. Ne, jam ne plu estas la momento labori por la interakordo de la partioj. Kian pakton oni povas aranĝi inter la energio de la subpremanto kaj la koleraro de la subpremanto? (...) Estus senutile fermi


la okulojn antaŭ la revolucio okazigita de la tempo kaj la forto de la aferoj: ne pro tio ĝi ĉesus ekzisti. Aliepoke la tria stato estis sklava kaj la nobela stato estis ĉio. Hodiaŭ, la tria stato estas ĉio kaj la nobleco estas nura titolo.

Estis neakceptinde ke la malalta stato, kiu reprezentis 24 milionojn da francoj, submetiĝus al la volo de iu grupo de 400-milo da privilegiuloj. La 17-a de junio de 1789 la tria stato proklamiĝis Nacia Asembleo kaj invitis la aliajn du statojn partopreni en tiu agado. Estis situacio eliranta el la kutima vojo de la afero. La reĝo devis decidi kion fari en tia situacio tute ne antaŭvidita kaj por kiu ekzistis nenia politika formulo. Liaj duboj eksplikas la hezitudon en kiu li dronis dum la sekvintaj semajnoj, kun kontraŭdiraj decidoj. Li ne povis akcepti la postulojn de la Tria Stato sen abdiki kaj ruinigi la socipolitikan sistemon de la Malnova Reĝimo, kies natura subtenilo estis la aristokrataro. Do li unue decidis politikon je rezistado kaj tio signifis sin meti flanke de tiu nobelaro kiu ĝis tiam kontraŭstaris la absolutisman povon de la monarĥio.

La reĝa decido estis meti finon al la sesioj de Ĝeneralaj Statoj. Kiam la deputitoj de la ĵusnaskiĝinta Nacia Asembleo volis kunsidi la 20-an de junio ili konstatis ke la pordoj de la salono de la debatoj estis fermitaj. Laŭ sugesto de la deputito Guillotin ili adresiĝis al la tie proksima korto de la pilk-ludo. Sub la prezidanteco de Jean Sylvain Bailly, kaj post iu diskurso de la deputito Jean-Joseph Mounier, la deputitoj de la tria stato ĵuris ne eksiĝi dum kiam ili ne estos ellaborintaj iun Konstitucion por la franca popolo.

Sekve de tio, dum kelkaj tagoj okazis inter la Nacia Asembleo kaj la reĝo ia streĉa procezo de cedomalcedo respegulanta ian faktan povo-ekvilibron, kiu iompostiom evoluis al plifortiĝo de la pozicio de la tria-klasa deputitaro... La reĝa sesio per kiu Ludoviko la 16-a esprimis la ordonon de dissolviĝo de la komuna asembleo okazis la 23-a de junio kaj signifis rompiĝon inter ambaŭ kontraŭaj partoj. La reĝo rompis la dekretojn de la tria stato, kvankam akceptis iujn petojn pri fiska mildiĝo, kaj ordonis ke la sekvan tagon la statoj kunsidu aparte laŭ la tradicia kutimo. Dum la nobelaro kaj la klerikaro retiriĝis la tria stato restis senmova defiante la reĝan aŭtoritaton kaj deklaris la deputitojn netuŝeblaj. La teniĝo de la Asembleo estis jam fakta ribelo. La reĝo pripensis la eblecon uzi la forton kaj ordonis al la palaca gvardio eksigi la deputitojn, sed eĉ kelkaj reprezentantoj de la nobelaro malkonsentis pri tio kaj La-Fayette kaj aliaj faris minacan geston preni la glavon. Ludoviko ne plu insistis, momente.

La 24an de junio plejparto el la deputitoj de la klerikaro aldoniĝis al la asembleo de la tria stato. Sekvintage 47 deputitoj de la nobelaro estritaj de la duko de Orleans, kuzo de la reĝo, faris la samon. Fine la reĝo sin vidis devigita peti al la cetero el la nobelaro kaj la alta klerikaro reunuiĝi kun la ceteraj en la Nacia Asembleo, kiu de tiam transformiĝis en Konstitucia.



Intervenias la popolaj amasoj

Ĉiu situacio de pov-ekvilibro aŭ duobla povo estas malstabila kaj restas kondamnita esti provizora. Tiu principo povas esti aplikata al la stato de la aferoj en Versajlo ekde la 24-a de junio de 1789. Ŝajnas ke pri tiu realaĵo tiel estis konsciaj la deputitoj de la Nacia Asembleo kiel la reĝo mem kaj ties alianculoj de la aristokrataro kaj la alta klerikaro. Ja, ĉi tiuj tute ne emis akcepti senreziste ke oni metu finon al la feŭdisma sistemo en kiu ili ĝuis privilegian pozicion.

Kvankam Ludoviko la 16-a estis agnoskinte la legitimecon de la Nacia Asembleo, poste li sin dediĉis sekrete prepari la rebaton. Li ordonis kantonmentigi trupojn en la Marso-Kampo, proksime al Parizo. Sed ankaŭ la Asembleo atentis pri la situacio kaj voĉ-donis mocion petante al la reĝo, senutile, retiri la trupojn. Dume en Parizo, kaj en la cetero el la lando, la situacio estis neeltenebla en kio rilatas al la viv-kondiĉoj de la malaltklasuloj. La prezo de la pano tre multe estis altiĝinta pro la malbonaj rikoltoj de la antaŭaj jaroj. Dum la nokto de la sabato, la 11-a de julio al la dimanĉo la 12-a, la popolaj amasoj de Parizo alsaltis 40 el la 54 oficejoj kiuj kolektadis la impostojn. Proksimume tagmeze de la 12-a oni konis en la ĉefurbo la novaĵon de la elpostenigo de la ministro Necker. Tio kaj la koncentriĝo de 20.000 soldatoj apud Parizo indikis ke oni estis komencante la sufokadon de la revolucia procezo.

Notindas ke la solvo de la krizo de julio estis iniciato de la popolaj amasoj, ĉefe tiuj de la ĉefurbo. La senlira situacio de Versajlo estis rompita de la parizaj ribelintoj de la malaltaj klasoj de la socio. La Asembleo ne estris la mobilizon sed restis spektanta. Nur la plej radikalaj el la deputitoj partoprenis en la surstrata agado. La 1-an de julio Jean-Paul Marat estis lanĉinta jenan pamfleton:

Civitanoj! Senĉese observu la konduton de la ministrojn cele reguli la vian propran. Ilia celo estas nuligi nian Nacian Asembleon. Ilia sola rimedo estas la civilmilito. La ministroj nutras la ribelon. Ili ĉirkaŭigas vin per la timiga ĉeesto de la soldatoj kaj la bajonetoj!...

Kaj la 12-a, Camille Desmoulins faris tiun alvokon al la parizaj popol-amasoj:

Civitanoj, mi venas el Versajlo... Necker estis eksoficigita! Ĉi tiu elpostenigo estas la trumpetalarmo de iu Bartolomea Nokto de masakrado de patriotoj. Ĉi-nokte, ĉiuj svisaj kaj germanaj batalionoj foriros el la Marso-Kampo por veni senkapigi nin... Ni devas ne perdi eĉ momenton! Estas al ni nenia alia solvo ol preni la armilojn kaj surmeti al ni kokardojn por identiĝo!

Desmoulins eksplikas la signifon de la eksigo de Necker; temas pri la signalo por la masakrado de patriotoj. Antaŭ la ofensivo, ne estas alternativo. Parizo devis preni la armilojn. La kokardo elektita kiel signalo de identiĝo estis trikolora, kun la blanko de la antikva reĝa koloro plus la ruĝo kaj la bluo, la koloroj de la ĉefurbo. La parizaj stratoj pleniĝis je barikadoj kaj tranĉeoj. Tiuj kiuj ne posedis armilojn suprenportis pavim-ŝtonojn al la altaj etaĝoj de la konstruaĵoj por ataki per ili la reĝajn trupojn. La prizono de la ŝuldantoj de la ĉefurbo estis alsaltita kaj ties prizonuloj liberigitaj. La pariza popolo, kuniĝinta en la Placo de la Grève, antaŭ la Urbodomo, elektis iun komitaton konstituitan de municipaj oficiroj kaj la urbaj deputitoj de la Ĝeneralaj Statoj.

La municipa regantaro kreita por gvidi la insurekcion estis titolita **Pariza Komunumo**. Jean Sylvain Bailly estis elektita urbestro de Parizo. Li estis membro de la Akademio de Sciencoj, mate-

matikisto kaj astronomo. Li estis la deputito de Parizo en la Ĝeneralaj Statoj kiu legis la ĵuron de la Korto de la Pilk-ludo en Versajlo. La komitato de la Komunumo rajtigis la distribuadon de pulvo kaj decidis la kreadon de burĝa milicio por kio, tre rapide, ĝi sukcesis rekruti pli ol 13-mil personojn. Parto el tiu burĝa milicio atakadis la reĝajn trupojn koncentritajn, ĉefe, en la Marso-Kampo, atingante ke iuj el ili transiru ali-partien. La formado de armitaj grupoj daŭris sekvinttage per la kreado de unu milicio de Parizo konstituita de 48-mil homoj kaj komandita de La-Fayette. En ĉi tiu naskiĝo de io kio poste estos la Nacia Gvardio, kvankam estis evidenta la insurekcia karaktero de la armita korp, notindas ke la eniro en tiu institucio estis limigita al la t. n. “respektindaj civitanoj”, klare parolante, la burĝuloj, kun rifuzo de la popolanoj de la plej malaltaj klasoj. La nomumo de La-Fayette kiel kolonelo de la milicio, ja, ne estis signo je radikaleco, kvankam li ankoraŭ konservis la prestiĝon esti batalinta en la usona Milito je Sendependiĝo. Tio estas, eĉ en la momentoj de plej granda revolucia impeto, la burĝaro ne ĉesis atenti pri la danĝero kiun signifus por ĝiaj interesoj la armita popolo. Tamen, nur la popola mobilizo povus alfronti la kontraŭrevoluciajn fortojn kiuj komencis ĉefatenti pri siaj komunaj interesoj. Cetere, tiu popola mobilizo senĉese pliintensiĝis. Tiutage mem, ekde la tagmezo, la regimentoj de infanterio estis ricevinte el la kortego ordonon evakui Parizon sed ili rifuzis obei kaj sin metis je la dispono de la aŭtoritato kies sidejo estis la Urbodomo.

Matene de la 14-a de julio unu komisiono prezentigis antaŭ la arsenalo «*des Invalides*» postulante fusilojn. Tial ke ne estis respondo, la arsenalo estis disrabita kaj la revoluciuloj forprenis 28-mil fusiloj kaj 20 kanonoj. Ĉirkaŭ la 13-a horo, proksimume 5-mil armitaj viroj kaj virinoj, kune kun kelkaj francaj gvardioj kiuj enviciĝis kun ili, adresiĝis al la emblema Bastilo. Survoje tiuloken la grupo plikresĝis ĉefe per la aldoniĝo de laboristoj de la tieproksima kvartalo «*Saint Antoine*». La Bastilo estis iu mezepoka fortreso. Kun la absolutisma monarĥio ĝi fariĝis simbolo de la subpremado ĉar ĝi estis uzita kiel malliberejo por politikaj prizonuloj. Tie, la popolanoj postulis ke oni disdonu la pluvon kiu estis stokita en tiu fortreso. La guberniestro de la Bastilo, la markizo de Launay, firmece rifuzis permesi la eniron de la revoluciuloj kaj pretiĝis rezisti per la malmultenombra garnizono. La alsaltantoj sukcesis faligi kelkajn pordojn kaj unu leveblan ponton. Ili situis kanonojn en la korto kaj en la fosajoj ĉirkaŭ la fortreso. Dum estis sonanta la pafado ĉirkaŭ la konstruaĵo, pli kaj pli da alsaltantoj adresiĝis tiuloken. Subite oni vidis ke la sieĝitoj hisis blankan flagon. Sed kiam kelkaj

viroj kaj virinoj triumfe alproksimiĝis ili estis mortpafitaj. Sekvis la atakado kaj fine, je la 17 horo, post kelkhora batalado la atakantoj sukcesis eniri en la Bastilon. Kiam la homamaso alvenis tien kie troviĝis Launay oni linĉis lin, same kiel al la ĉefserĝento de la fortreso kaj poste oni liberigis la prizonulojn kiuj troviĝis tie.

La kapto de la Bastilo havis, sendube, simbolan efikon, sed ne nur tion ĉar oni atingis per tiu faro ankaŭ materian utilon tial ke la alsaltintoj trovis tie armilaron: pulvo, kanonoj... La sieĝitoj perdis nur unu solan homon dum la atako sed la alsaltantoj havis 98 mortintojn kaj 73 vunditojn. Hazarde, en iu poŝo de la markizo Launay oni trovis leteron kiun estis sendinta al li la provosto de la komercistoj, Sinjoro Flesselles. Ĉi tiu promesis sendi al la defendantoj de la Bastilo helpo-trupojn antaŭ la nokto-mezo. Dum kelkaj revoluciuloj restis en la ĵus konkerita fortreso, la homamaso adresiĝis al la Urbodomo kie troviĝis Flesselles kun la ceteraj magistratanoj laste elektitaj far la popola povo. Oni eksigis lin el tiu loko kaj kiam li estis elirante oni mortigis lin per unu pafado. Poste lia kapo kaj ties de Launay kaj la ĉefserĝento de la Bastilo estis portitaj sur pik-stangoj tra la parizaj stratoj dum la urba loĝantaro vivu-kriadis la alsaltintojn de la fortreso. La perforto de tiu tago kaj tiuj ĉi okazintaĵoj signis la karakteron de la tiam komenciĝanta revolucio. Ja, la perforto kaj la klasaj kontraŭdiroj ene de la kontraŭfeŭdisma socia bloko, krom inter ĉi tiu kaj la aristokrataro, signis la disvolviĝon de la tuta revolucia periodo.

La reĝo volis pensi ke la eventoj de la 14-a de julio estis nura popola ribelo pro la manko je vivrimedoj, sed li sin sentis devigita retiri la trupojn el la ĉefurbo kaj remeti la ministron Necker-on. La 15-an li aliris al la pariza Urbodomo kaj akceptis surmeti al si la kokardon de la revoluciuloj. Tre emociita, li deklaris: «*Mia popolo ĉiam povas kalkuli je mia amo*». Sed de tiam la aristokrataro komencis forlasi la landon por konspiri kontraŭ la revolucio de-ekstere. La grafo de Artois foriris frumatene de la 17-a de julio destine al Nederlando kune kun siaj filoj kaj servistaro, la Princo De-Condé kaj sia familio sekvis lin, la gedukoj de Polignac adresiĝis al Svisio, la marŝalo De-Broglie al Luksemburgo, kaj sekvis aliaj.

La 18-an de julio la aŭtoritatoj de la Urbodomo ordonis la revenon al la ordinara laborado kaj oferis mon-rekompencan por la repreno de la armilaro kaptita de la ribelintoj. Sed ne rezultis facile la reveno al la normaligo de la situacio. La 22-an de julio unu el la ministroj nomumitaj de la reĝo, Foulon, kaj la intendanto de Parizo estis akuzitaj je instigado de la kontraŭrevolucio kaj spekulacado pri cerealo. La popolamaso ekzekutis ilin en la

placo de la Greve, antaŭ la Urbodomo. Tio estis indico de la apero de ia nova povo kiu ne estis tiu de la Nacia Asembleo de Versajlo kaj ankaŭ ne tiu de la pariza Urbodomo, sed tiu de la popolanoj kiuj konsciis pri siaj propraj interesoj, malsamaj ol ties de la burĝaro. Krome, la konkuro de malsamaj povoj generis la malstabilan situacion kiu persistis ĝis la elĉerpiĝo de la revolucia impulso.

Dum estis okazante en Parizo la historiaj eventoj de julio 1789, la revolucia ondo manifestiĝis ankaŭ en aliaj urboj kaj regionoj de Francio eĉ ne konante, en iuj kazoj, la parizajn okazintaĵojn. Oni kaptis arsenalojn kal alsaltis tribunalojn kaj aliajn oficialajn centrojn. Multkaze, la ribeluloj eksigis municipajn oligarkiojn kaj lokajn regantarojn por anstataŭi ilin per la delegitoj de la Ĝeneralaj Statoj. La revolucio etendiĝis ankaŭ tra la kamparo, kie abundis la insurekcioj de la salajritaj kamparanoj. Ĉi-tiuj kaj la tag-laboristoj taksis la okazon konvena por venĝi la ne-elteneblajn altrudojn de la feŭd-sinjoroj. La penoj pro la malabundo je nutr-aĵoj okazigis la socian eksplodon de la viktimoj de kelkjarcenta subpremado politika, ekonomia, socia kaj religia. La reago de la ĝis tiam subpremitaj kamparanoj estis altgrade perforta. Ili alsaltis kaj bruligis feŭdajn kastelojn kaj palacojn. Ĉi tio akcelis la forkuron eksterlanden de multaj aristokrataj familioj.

Ĉi tiu nova situacio estis neatenditaĵo por la membroj de la Asembleo, kiu reagis tim-zorge kaj komencis atente prikonsideri la postulojn kiujn la kamparanoj estis registrinte en la plendo-kahieroj kaj pri kiuj ĝis tiam ili ne estis dediĉinte grandan intereson. Tio metis en konsideron la aferon ĉu oni agnoski aŭ ne la proprieto-raĵton bazitan sur la feŭdismaj privilegioj. Kaj tio vekis kontraŭdiron en la idearo de la burĝklaso ĉar kvankam ĉi tiu rifuzadis la feŭdisman proprieton kaj la ideologion sur kiu baziĝis tiu rajto, dume ĝi agnoskis la privatan proprajon kiel respektinda homa rajto. Do, jen la problemo por la burĝaro: kiel eksproprigi la feŭdsinjorojn ne detruante la propraj-raĵton ĝenerale? Tiu rilato inter la feŭda kaj la burĝa proprieto montris eblan unuecon de ambaŭ proprieto-raĵtoj, t. e. la objektivan eblecon de interakordo inter ambaŭ super-regantaj klasoj kontraŭ la granda amaso da senposedantoj. Momente la sendependa mobiliziĝo de la amasoj malebligis tian interakordon. En unu sesio kiu daŭris la tutan nokto de la 4-a al 5-a de aŭgusto, la Konstitucia Asembleo proklamis la abolon de la feŭdeco. Konvenas analizi la signifon de tiu formulo; ĝi estis sufiĉe ambigua por pravigi la neadon de la feŭdismaj privilegioj ne tuŝante la tiklan aferon de la proprieto-raĵto. Reale, temis pri fakta kompromiso inter la altrangaj klasoj. La liberalaj membroj de la aristokrataro en

la Asembleo rezignis pri la “super-reganta feŭdeco”, tio estas la rajtoj truditaj per la forto kaj uzurpitaj al la centra povo, sed dume, laŭ konveno de ambaŭ klasoj, oni dekretis nenion pri abolo je rajto je privata propraĵo.

Ĉi-kaze la dispono estis grava de jura kaj politika vidpunkto. Laŭ la dekreto de la Asembleo estis abolitaj la jurpovo kaj la ĉasad-privilegio de la feŭdsinjoroj samkiel la specialaj pagoj al la Eklezio kaj la dekonaĵ-impostoj, kaj ankaŭ la parlamentaj kaj juraj privilegioj de la Unua kaj Dua Statoj. Ankaŭ la urboj rezignis pri siaj partikularaj rajtoj (foruoj). Tamen oni respektis la “kontraktan feŭdecon”, t. e. la privatan proprajon, kiu de tiam transformiĝis en burĝan proprieton aŭ posedmanieron. Laŭ tiu rajto, la eksproprigo signifus pagon je monkompensoj al la “legitima” posedanto.

Tio signifis la agnoskon de la burĝa proprieto en la jura sistemo, do la apero de iu merkato de terenoj kiu metis je la dispono de la kapitalistoj la propraj-eblecon de la tero. Klare evidentiĝas kiuj estis la beneficuloj de la “abolo de la feŭdeco”. Tute ne la senposedantaj amasoj kiuj per siaj mobiliziĝo efektivigis la venkon de la revolucio sed aliaj klasoj. Unue, tiuj membroj de la nobelaro kiuj estis sukcesinte kombini siajn feŭdajn privilegiojn kun la profitado de terkulturo. Due, nur tiuj kamparanoj kiuj estis sukcesinte fariĝi kapitalistoj sufiĉgrade por posedi iome da mono por investado. Plejparto el la kamparanoj kaj tag-laboristoj perceptis ke la dispono ne favoris iliajn interesojn, do la mobiliziĝo en la kamparo pludaŭris.

Resume, ne estis intenco plenumi agraran reformon celante ke la tero estu por tiuj kiuj prilaboras ĝin. Tamen, ne estis tute malgrava la transformado entreprenita de la Asembleo. La abolo de la politikaj privilegioj de la feŭdsinjoroj pri la tero, la nuligo de la distingo inter nobelaj kaj plebaj teroj, la starigo de homogenaj imposto-kriterioj, implicitis radikalan socian transformadon de la tero-proprieto kaj la rilato de la socio kun ĝi. Temis pri decida salto el la feŭdismo al la kapitalismo. Ĉi-lasto bezonas kaj implicas ke la tero fariĝu komercaĵo, ke la superregado de la proprieto, sen ia ajn politika rilato, estu nura superregado de la privata propraĵo, de la kapitalo, senigita de ĉiu ajn politika signifo: ke la rilato inter la proprieto kaj la laboristo estu nura ekonomia rilato inter ekspluatanto kaj ekspluatato, ke ĉesu ĉiu ajn persona rilato inter la proprieto kaj la propraĵo, ke ĝi konsistus nur je la materia valoro de la aĵoj. De tiam kaj ĝis la nuntempo la burĝa kapitalismo enportas en ĝia idearo tiun kontraŭdiron. Ja, la privata propraĵo ne estas hom-raĵto sed privilegio ĉar fakte ekzistas multaj homoj kiuj posedas nenion. Sen egaleco oni ne povas paroli pri rajtoj sed pri privilegioj.



Interklasaj kontraŭdiroj

Dum en la urboj kaj en la kamparo okazadis la popola mobilizado kontraŭ la feŭdisma sistemo, en Versajlo la Konstitucia Asembleo daŭrigis sian leĝo-faran taskon. Post la dekreto de la 4-a kaj 5-a de aŭgusto kiu abolis la superregantan feŭdecon, fine de tiu monato la Asembleo publikigis la faman tekston de la **Universala Deklaracio de Rajtoj de la Homo kaj la Civitano**. Kelkaj inter la unuaj artikoloj de tiu dokumento tekstas:

La homoj naskiĝas kaj plu restas liberaj kaj egalrajtaj. La sociaj distingo ne povas baziĝi krom sur la komuna utilo. La celo de ĉiu politika asocio estas la konservado de la naturaj kaj ĉiamvalidaj rajtoj de la homo. Ĉi tiuj rajtoj estas la libereco, la proprieto, la sekureco kaj la kontraŭprema rezisto. Socio en kiu ne estas certa la garantio de la rajtoj nek fiksita la pov-apartiĝo, estas konstitucio-manka.

Tiu teksto klare respegulas la aspirojn kaj la interesojn de la burĝa klaso. Ĝi draste kondamnas la feŭdecon, t. e. la valoroj sur kiuj baziĝis la feŭdisma soci-sistemo: privilegioj, rajtoj de la Unua kaj Dua Statoj, familiaj titoloj kaj rangoj... Sed dume ĝi lasas bone firmigita la ekomian bazon de la kapitalismo, t. e. la privata proprieto. Ja, tiu nova super-reganta klaso sin ŝirmis, perleĝe, kontraŭ la reakiro de la povo far la nobela aristokrataro kaj ankaŭ kontraŭ la mobiliziĝo de la malaltaj socialtavoloj de la Tria Stato.

Notindas ke multaj el la ideoj esprimitaj en tiu **Universala Deklaracio de Rajtoj de la Homo kaj la Civitano** estas esenca parto de ĉiuj burĝaj konstitucioj, eĉ nuntempe, post pli ol 200 jaroj. De vidpunkto de la feŭdismo la Deklaracio signifis grandan revolucion ĉar ĝi rompis la malnovan klasan strukturon, kvazaŭ kasta, ene de kiu ĉiu havis

ekskluzivajn rajtojn kaj privilegiojn, kaj starigis socion en kiu ĉiuj homoj estas konsiderataj jure kaj politike egalaj. La nocio de egalrajteco estis io eksterordinara en la 18a jarcento. Kontraŭ la dia kaj hereda bazo de la monarĥio oni instituis la principon de la ĝenerala volo. Krom tio, oni agnoskis la rajton kontraŭ-rezisti la subpremadon. Tamen, la burĝaro kiu gvidis kiel klaso la revolucion por fariĝi superreganta, samtempe ke ĝi bataladis kontraŭ ĝia antagonisto de la antaŭa reĝimo, celis haltigi la antaŭeniron (realan aŭ eblan) de sociaj tavoloj pli radikalaj. Ĝia revolucio celis detru la konkretan dominadon de la feŭda klaso, sed neniel ĝi intencis meti finon al la dominado ĝenerale de iu klaso super alia. Atinginte la povon, tiu klaso proklamis la finon de la historio. De ĝia vidpunkto, tial ke oni sukcesis konstrui socion akorde kun la ĉiamvalidaj "homaj rajtoj" kiuj aperas en la Deklaracio, jam ne plu estis necesa la mobilizo. Sed tiuj naturaj, eternaj kaj nerezignebaj rajtoj kiujn oni garantias al la "homo" en la Deklaracio rilatas nur al ia specifa momento de la homa historio. La homo kiun oni prezentas kiel la tuta esenco de la homaro, ne estas, spite al la retoriko de la Deklaracio, la "universala" homo. La hom-tipo de tiu Deklaracio estas la burĝa homo, individuisma kaj proprietema. La homaj rajtoj de la Deklaracio ne estas la rajtoj de la homoj sed la rajtoj de la privata proprieto. La rajto pri posedado konstituas la kernon de la tuta burĝa socio kaj la centron de ĝia leĝaro. Ili baziĝas sur la agnosko de la individua povo disponi je la propra posedaĵo, eĉ domaĝe al aliaj homoj. Tiu ĉi realaĵo klare montras la veran esencon de la proprieto: ĝi ne estas vera homa rajto, io kion ĉiuj homoj ĝuas egalrajte, sed nur ia kroma formo de privilegio de iuj homoj domaĝe al aliaj. Cetere, la sekureco, pri kiu temas

la Deklaracio, rekte rilatas al la protektado, pere de la leĝoj kaj de la publika forto, de la privilegio je posedado.

En ĉi tiu priskribita situacio oni povas vidi la inter-klasajn kontraŭdirojn kiuj manifestiĝis en la Franca Revolucio jam dekomence. La konflikto inter la tri klasoj: unuavice la aristokrataro kaj la alta klerikaro, duavice la diversaj tavoloj de la burĝaro, kaj triavice la malaltaj klasoj da senposedaj uloj, pludaŭris dum la sekvintaj jaroj ĝis la krizo de la revolucia procezo en 1797. Tiu konflikto daŭris dum ne estis klare solvita la afero de la povo. La afero de la povo, kiel poste konstatis Lenino, estas la ĉefa problemo de ĉiu revolucio. En la kazo de la situacio en Francio en 1789 oni devas noti ke eĉ tiam, post la alsalto de la popolamasoj al la Bastilo kaj la kaptado de tiu fortreso far la revoluciuloj, la problemo de la povo ne estis definitive solvita. Sendube tiu interveno de la polaj amasoj utilis por malbloki la situacion de povo-ekvilibro en Versajlo inter la monarĥo kaj la Asembleo, sed la rezultinta politika situacio daŭre estis provizora kaj malstabila.

Dum la delegitoj de la Asembleo estis efektiviĝante sian konstituciantan kaj leĝigan laboron, la reĝa kortego ne sin sentis tute venkita. Tiam, spite al ĉiuj ŝanĝoj, la Asembleo kaj la reĝo daŭre estis en Versajlo. Tie estis la kortego ekde kiam Ludoviko la 14a decidis retiri ĝin el Parizo. Versajlo troviĝas sufiĉe proksima al la ĉefurbo por ke la informoj rapide alvenu, sed ankaŭ sufiĉe malproksime por izoligi la kortegon el la konspiroj kaj maĥinacioj de la pariza aristokrataro. Komenciĝinte la revolucia procezo kiu trejnigis la amasojn al la politika scenejo, la popolo de Parizo konsideris ke devus ne ekzisti distanco inter la loko kie oni decidadis pri la aferoj kaj la urbo kie estis okazantaj la ĉefaj eventoj. Ekde septembro Ludoviko la 16-a montriĝis kontraŭa al du revoluciaj dispojoj: la dekretoj de la 4-a kaj 5-a de aŭgusto pri abolo de la feŭdeco kaj la **Universala Deklaracio de Rajtoj de la Homo kaj la Civitano** de la 26-a de aŭgusto de 1789. La maniero laŭ kiu manifestiĝis la reĝa opono konsistis prokrasti la promulgon de tiuj dispojoj. La postulo de la Asembleo akceli la aprobon de tiuj leĝoj ricevis kiel respondo novan kantonmenton de trupoj en Parizo. La 1-a de oktobro, la reĝa gardo-korpuso organizis bankedon por soleni la alvenon de iu regimento. Dum la festeno, en kiu partoprenis ankaŭ la reĝa familio, oni insultis la Asembleon kaj la nacian suverenecon, kaj iuj tretaĉis la kokardon kiu ekde la eventoj de julio simbolis la revolucion. La insolento de la reĝa familio indignis la polojn kiam oni eksciis pri tiu afero. De antaŭ kelkaj se-

majnoj revoluciaj ĵurnalistoj kaj oratoroj estis proponante marŝadon al Versajlo por submeti la povon de la kortego. Unu el la ĉefaj agitistoj estis Jean Paul Marat pere de sia ĵurnalo «**La amiko de la popolo**». Dank' al sistema kaj persista laboro de aktivistoj kiel li kaj multaj aliaj, la popolo povis akiri la politikan konscion necesan en tiuj revoluciaj cirkonstancoj.

La 5an de oktobro de 1789 grandnombro da parizanoj, kun granda partopreno de virinoj, adresiĝis al Versajlo. La-Fayette, timante ke la iniciato forsuperus lin, akceptis gvidi la grupon celante kontroli ĝin. La varieco de la postuloj de tiu amaso montras kiom multe la mobilizado de la amasoj pretersuperis la tujajn ekonomiajn motivigilojn. Estis petoj pri garantio de la pano-provizado al Parizo, sed apud tiu celo estis ankaŭ postuloj ke oni respektu la liberecon, ke la reĝo subskribu la dekretojn de la Asembleo, ke oni riparu la faritan ofendon al la kokardo kaj ke la regantaro translokiĝu al Parizo. La reĝo akceptis senhezite aprobi la dekretojn, sed li rifuzis forlasi Versajlon. La popolamaso restis dum la tuta nokto de la 5-a al la 6-a de oktobro en la reĝaj ĝardenoj atendante kaj premante por ke oni efektivigu la translokiĝon. Ĉar la monarko persistis en sia rifuzo, frumatene la viroj kaj la virinoj de la pariza popolo eniris perforte en la palacon kaj mortigis kelkajn gvardiojn. Kiam La-Fayette kaj la naciaj gvardioj sukcesis kontroli la situacion, la reĝa familio montriĝis en la ĝardenoj kie la multamaso kriadis “Al Parizo!”. Fine, la reĝa familio devis cedi kaj definitive forlasis Versajlon por instaliĝi en la Palaco de la Tuilerioj. La politika batalado kiu igis necesa la popolan intervenon konsciigis la amasojn pri la politika situacio kaj vekis en ĝi intereson pri la disvolviĝo de la revolucio. Tio evidentiĝis tiam en la fakto ke la popolo malakceptis tiun frakcion de la Asemblea delegitaro kiu ĝis tiam ĉiam defendis la interakordon kun la reĝo kaj la konstitucian monarkion. Kelkaj el tiuj delegitoj forlasis la Asembleon kaj enkondukiĝis en la kontraŭrevoluciajn vicojn.

De tiam la laboro de la Konstitucia Asembleo efektiviĝis en la ĉefurbo. La unua afero kiun ĝi devis alfronti dum la lastaj monatoj de 1789 kaj la unuaj de 1790 estis la financa problemo heredita el la Malnova Reĝimo. Kelkaj deputitoj proponis ke la ŝtato vendu iujn publikajn posedaĵojn por iome mildigi la egan nacian ŝuldon, konkrete, oni pensis pri la teroj apartenantaj al la reĝo kaj al la Eklezio. Ĉar ne ekzistis aliaj alternativoj, tiuj posedaĵoj estis uzitaj kiel garantio por la emisio de la mon-biletoj, kiuj fariĝis la mono de la revolucio. Meze de la jaro 1790 estis lanĉita al la merkato

grandkvanto da teroj, arbaroj kaj konstruaĵoj. Ĉi tiu dispono okazigis grandan transigon de la proprieto kiu favoris tiujn burĝulojn ekonomie fortaj por prezentiĝi kiel aĉetantoj en tiun tero-merkaton. Ankaŭ la laika nobelaro profitis la okazon pli riĉiĝi.

Kompreneble, la maniero laŭ kiu oni realigis la ŝtatan financadon tre damaĝis la havaĵon de la Eklezio. Sed krom tio, estis ankaŭ alia afero kiu tre metis la religian institucion kontraŭ la revolucio. Temas pri la **Civila Statuso de la Klerikaro**. Ja, unu el la ĉefaj politikaj linioj de la revolucio estis meti finon al la socia organizo kaj la korporacia politiko de la Malnova Reĝimo. La Eklezio estis la ĉefa organizaĵo kun korporacia strukturo. Krome la kapo de tiu korpo ne troviĝis en Francio, kaj plejparto el la franca klerikaro emis konservi sian subordiĝon al la Papo.

En februaro de la jaro 1790 la Asembleo abolis la monaĥ-ordenojn, kaj en julio aprobis la **Civilan Statuson de la Klerikaro**. Ĉi tiuj disonoj ne celis la senkristanigon de Francio, kiel pretendis la politika propagando de la malamikoj de la revolucio, sed ian administracian reformon, sed ĝi profunde modifis la strukturon de la Eklezio. La efektivigo de tiu plano metis la religian strukturon sub la aŭtoritato de la franca ŝtato kaj malpermesis la intervenon de fremdaj potencoj, t. e. de la Papo de Romo, en ĉio kio ne strikte rilatus al religia materio. La celo de la Asembleo estis meti ordon en la komplikan strukturon de la Eklezio, igi ke la diocezoj koincidu geografie kun francaj departementoj kreitaj okaze de la administracia reformo. Oni fiksas ankaŭ la kvanton da ekleziaj funkciuloj kaj temploj en ĉiu distrikto aŭ urbo dependante de la nombro da enloĝantoj. Cele establi pli racian kaj malmultekostan organizon, oni eliminis multajn parokejojn kaj ekleziajn postenojn. Krom la eliminado de regul-submetita klerikaro, oni nuligis ankaŭ ĉiujn titolojn kaj ekleziajn oficojn escepte tiujn de la pastroj, episkopoj kaj vikarioj. Rilate al ĉi tiuj ekleziaj oficoj, la **Civila Statuso de la Klerikaro** inkludis elekto-sistemon, kaj tio signifis la malaperon de la privilegio de la nobelaro por okupi la altajn postenojn de la Eklezio.

Kvankam kelkaj membroj el la eklezia hierarĥio konsentis pri la neceso je pli racia organizado en la strukturo de la institucio, la **Civila Statuso de la Klerikaro** rezultis ne-akceptebla por multaj aliaj kaj ĉefe por la ensemblo de la Eklezio. La franca klerikaro provis prokrasti la aplikadon de tiu leĝaro mendante al la Papo permeson por ĝia aprobo. En decembro de 1790 la Asembleo postulis al la klerikaj deputitoj ke ili ĵuru fidelecon al la konstitucio por poste postuli la samon al la

pastroj kaj episkopoj. Preskaŭ ĉiuj francaj episkopoj rifuzis submetiĝi al tiu leĝo, kaj same faris duono el la malalta klerikaro. Krome, komence de la sekvinta jaro la Papo Pio la 6-a kondamnis la **Civilan Statuson de la Klerikaro**. La rezulto estis la divido de la klerikaro de la lando. La Papo kondamnis la pastraron kiu ĵuris la konstitucion. Iu rezulto de tiu konfuza situacio estis ke grandparto el la franca loĝantaro kontraŭstaris de tiam la revolucio. La Eklezio kiel institucio unuiĝis al la aristokrataro en la opozicio al la nova reĝimo. Sed por ĉi tiu pli grave ol la malamikeco de la alta klerikaro estis tiu de multaj katolikaj popolanoj. Ĉi tiu afero estis speciale grava en regiono kiel **La-Vendée**, kie la kontraŭstaro al la parizaj aŭtoritatoj estis ĝenerala kaj radikala ĝis la ribelo.

Oni bone komprenas la konfliktojn surbaze de interkontraŭantaj klasaj interesoj, kaj tio abundis en la franca revolucio. La agresemo de alta klerikaro samkiel tiu de la nobelaro apartenas al tiutipa klasbatalo. Sed okaze de la konflikto kun la Eklezio aperas iu nova faktoro en la kontraŭstaro al la revolucio. La opozicio de la vendeanoj kaj aliaj popolanoj, kiu aperis okaze de la kunfrontiĝo de la Asembleo kun la klerikaro, kaj kiu pligrandiĝis dum la sekvintaj jaroj, ne povas esti atribuita al inter-klasaj kontraŭdiroj. Estis nenia objektiva kialo por ke multaj miloj da vilaĝanoj kaj ĉiutipaj popolanoj el la malaltaj klasoj de la socio sin tenu agreseme kontraŭ la aŭtoritatoj kaj institucioj generitaj de la revolucio, kaj tamen tio okazis. Kaj tio meritas ian eksplikadon, aŭ almenaŭ intencon je eksplikado. Ja, ne estis objektivaj kialoj por tiu popola kontraŭ-revolucia teniĝo, sed, jes ja, estis subjektivaj kialoj por la okazado de tiu stranga fenomeno, kiu, cetere, estas tre ofta en la historio, antaŭ kaj post la Franca Revolucio. La homaj estaĵoj ne ĉiam procedas objektivaj, laŭ logika penso. Foje ili agadas subinflue de sentoj, emoj, inklinoj kaj preferoj kies origino troviĝas en malsama cerba parto ol tiu kiu rezonas logike. La religiaj, la naciismaj kaj aliaj sentoj apartenas al tiu tipo je homaj motivigiloj kiujn oni ne povas ekspliki laŭ ekonomia aŭ praktika intereso. Tiuj sentoj, en rekta rilato kun la sento de mem-identeco, ofte pelas la homojn al fanatikeco kaj mem-oferado favore al aferoj tute ne konvenaj. Ankaŭ la simpatio kaj antipatio kiu spontane naskiĝas en tiu parto el la homa cerbo apartenas al tiaj nekontroleblaj sentoj, same ol la amo kaj la malamo. Sen tiaj karakteriĝoj la homoj ne estus homoj, sed maŝinoj. La spertaj politikistoj scias atenti pri tiuj homaj ecoj ne malpli ol pri la ekonomiaj interesoj de la personoj. Ne nur la ekonomio sed ankaŭ la psikologio kaj la sociologio estas necesaj iloj por la regado.



Konstitucio kaj eraroj en 1791

En 1791 oni estis atinginte ian ekvilibron kiu igis pensi al multaj ke estis stariĝinta nova ordo kaj ke la revolucio finiĝis. Tamen, kvankam oni estis realiginte tre profundajn reformojn kelkaspekte, la rilato de la nova ordo kun la antaŭa estis nura kompromiso, kiel poste evidentigis iu okazintaĵo de tiu jaro. Sed la malekvilibro ekzistis inter la fortoj kiuj starigis la novan ordon. Temante pri povo-ekvilibro oni povas pensi ke la afero pritraktas la rilaton inter du kontraŭantaj fortoj, kaj ofte okazas tiele, sed en la kazo de la Franca Revolucio la afero estis pli komplika ĉar ne rolis nur du povo-konkurantoj. Ene de la revoluciaj fortoj ekzistis priekonomiaj kontraŭdiroj ne malpli gravaj ol tiuj de ĉiuj ili kun la Malnova Reĝimo. La sama jaro 1791 vidis, krom pluan streĉitecon inter la monarkio kaj la revolucio, ankaŭ sangan kaj perfortan konflikton inter la revoluciuloj.

Ja, temis pri esplodo de la kontraŭdiroj inter la burĝaro kaj la malaltaj klasoj de la ĝis tiam nomata Tria Stato. Klasbatalo estas neevitebla en socio kie ekzistas klasoj kun malsamaj kaj kontraŭaj interesoj. Sed la klasbatalo povas havi multajn formojn, ne ĉiuj perfortaj. Estas socioj kie la interklasaj kontraŭdiroj esprimiĝas per baraktado, procezoj de cedomalcedo, sed sen la perforto kiu karakterizis la francan socion ekde la jaro 1791 al 1797. Se oni verŝis tiom da sango dum tiu periodo, krome senutile, estis necese ke oni multe eraru. Kaj, paradokse, la grave erarintoj estis homoj kiuj tre enfazadis pri la konceptoj de *racio* kaj *racieco* kaj pretendis konstrui novan sociordon sur pli raciaj bazoj ol la Malnova Reĝimo.

Se priraporti kronologie la okazaĵojn de la jaro 1791, ni devas komenci per la fuĝ-provo de la reĝa familio. Vidate deperspektive la eventoj de la Franca Revolucio povus ŝajni stranga la persisto de la monarkio ĝis la jaro 1792. Kiam oni pensas pri tiu Revolucio oni tuj kunligas la kapton de la Bastilo kaj la senkapigon de Ludoviko la 16-a. Sed inter ambaŭ okaz-

intaĵoj pasis pli ol tri jaroj, kaj dum tiu periodo kelkfoje estis vivoj al la reĝo en la revoluciaj okazaĵoj. Estis nenia fatalo ke la franca monarĥo finiĝu en la gilotino. Sufiĉe da reĝaj dinastioj dumlonge kunvivadas kun reĝimoj kies konstitucio estas multe pli progresista ol tiu de Francio de 1791, kaj eĉ nuntempe ekzistas kelkloke tiutipaj reĝimoj de konstitucia monarkio. Se Ludoviko la 16-a havis tiel tragikan destinon estis pro siaj propraj eraroj, kaj ankaŭ tio estis paradokso ĉar la monarkia institucio en Francio havis pli ol unu jarmilo da politika sperto.

La elmigrantaj nobeloj komencis konspiri deeksterlande kontraŭ la revolucio. La reĝo estis en kontakto kun ili kaj sciis pri la planoj de la aŭstria imperiestro, lia bofrato, por deklari militon al la revolucio. En tiuj cirkonstancoj, Ludoviko la 16-a, kiu tute ne rezignaciis al la rolo de konstitucia reĝo al kiu la nova politika ordo destinis lin, decidis forlasi Francion por sin meti, proksime al la aŭstria landlimo, for de la kontrolo de la revoluciuloj. En la nokto de la 20-a al la 21-a de junio de 1791, la membroj de la reĝa familio sekrete foriris el Parizo, maskovestitaj kiel la servantoj de rusa baronino. Ilia celo estis la fortresa, firme monarkisma urbo Montmédy en nordorienta Francio, el kie la reĝo esperis instigi kontraŭrevolucion. La fuĝo fiaskis kiam la reĝa familio estis malkovrita dum la traŭro de la ponto sur la rivero Mosa en la urbo Varennes-en-Argonne, sufiĉe proksima al la aŭstria landlimo. Post la malkovro la reĝa familio estis arestita kaj resendita al Parizo. Sekve de tio, la aŭstria imperiestro Leopoldo la 2-a, frato de la reĝino Maria Antonieta, faris alvokon al ĉiuj eŭropaj reĝoj por ke ĉiuj unuiĝu kontraŭ la revolucio. Subgvide de la aŭtoritatoj de la Asembleo, kiu ankoraŭ estis Konstitucia, ankaŭ Francio komencis prepariĝi por sin defendi el la fremda invado. La Asembleo sin deklaris en konstanta sesio kaj oni mobilizis ĉiujn naciajn gvardiojn. Dume okazis popolaj tumultoj dum kiuj oni bruligis palacojn.

Spite al lia fuĝo-provo, la Asembleo decidis ne detronigi la reĝon. Oni ellaboris nekredoblan rakonton informante ke la reĝa familio estis sekvestrita. Kiam la Jakobena Klubo, unu el la plej radikalaj politikaj grupoj, sendis al la Asembleo mendon detronigi Ludovikon, plejparto el ĝiaj deputitoj retiriĝis el la klubo kaj konstituis iun novan, pli moderan, nomatan Fuldensa Klubo. La tiamaj politikaj kluboj estis kvazaŭ ekĝermo de la nuntempaj partioj. La jakobenoj prenis ĝian nomon el la loko kie ili kunsidadis, kiu antaŭe estis monaĥejo de Sankta Jakobo ĝis la abolo de la monaĥaj ordenoj. La malpliigo de la nombro da jakobenaj deputitoj en la Asembleo ne signifis malfortiĝo de tiu politika tendenco, sed tute male, ĉar ene de la Jakobena Klubo, tiuj ŝanĝoj ebligis la plifortiĝon de la hegemonio de Maksimiliano Robespiero, kiu de tiam iĝis unu el la ĉefaj figuroj de la Franca Revolucio. Dum plejparto el la deputitoj de la Asembleo emis savi la monarkion, la pariza popolo, ĉefe la “sen-kulotuloj” komencis gvidi la plej energian kaj rezolutan linion el la revoluciaj tendencoj. La “sen-kulotuloj” ricevis tiun nomon tial ke ili ne survestadis la kulotojn uzataj de la riĉuloj. Ili estis metiistoj, butikistoj, etbienuloj kaj ankaŭ laboristoj kiuj estis pretaj puŝi la revolucion ĝis la fino de la batalo kontraŭ la privilegioj. Ili malkonfidis ne nur je la aristokrataro sed ankaŭ de la riĉuloj ĝenerale. Estante malpli dialektemaj ol la leĝ-fakuloj de la Asembleo, ili postuladis klarajn kaj rotundajn dispozojn. La politika organiziĝo de tiuj tavoloj devigis alpreni, dum la sekvintaj jaroj, drastajn dispozojn kontraŭ ĉiu signo de feŭdismo kaj alportis al la Franca Revolucio ian profunde demokratian karakteron kiu neniel enestis en la politika programo de plejparto el la burĝaro. La senkulotuloj organiziĝis laŭ teritoriaj sekcioj, ligitaj al la Klubo de la jakobenoj kaj aliaj similaj, sed ili havis siajn apartajn gvidantojn kaj dum iom da tempo ili sukcesis konduki la revolucionan procezon.

Pro la manko je iniciato de la Asembleo, la senkulotuloj kaj la civitanoj de la popolaj distriktoj ekagadis. Ili redaktis peton postulante la detronigon de la reĝo. Subskribis tiun noton ses mil homoj, laŭŝajne multaj el ili analfabetoj aŭ duonalfabetoj. La superregantaj klasoj, burĝaj kaj eksaristokrataj sendistinge, tuj komprenis la danĝeron kiun por ili implicis la sendependa organiziĝo de la amasoj. La Urbodomo de Parizo proklamis Militan Leĝon kaj ankaŭ la Asembleo pretiĝis defendi la ordon. La 17-an de julio de 1791, formiĝis en la Marsa Kampo unu popola manifestacio por prezenti la peton. Bailly, kiu estis elektita urbestro de Parizo dum la eventoj de julio 1789, prezentiĝis en tiu loko akompanata de granda taĉmento da naciaj gvardioj. Kiam la amaso insultis lin kaj ĵetis ŝtonojn kontraŭ li kaj lia gvardio, li ordonis pafi. La atako kontraŭ la popolo okazigis centojn da mortintoj. La masakro de la Marsa Kampo daŭris dum la sekvaj tagoj per iu sistema subpremo kiu

celis senkapigi kaj paralizigi la popolan forton de la senkulotuloj. Laŭ ies kalkulo, dum tiuj tagoj la Nacia Gvardio mortigis pli da personoj ol ĉiuj linĉadoj far la popolamasoj ekde la 14-a de julio de 1789. Post tiu kontraŭ-popola reago de la burĝaj superregantaj fortoj, ĉi tiuj eniris en procezon de negocado kun la reĝo por enkonduki en la Konstitucion kiun oni estis ellaboranta iujn modifojn kiuj celis redukti ĝian demokratian dimension limigante la politikajn rajtojn de la popola plimulto de la neriĉuloj de la lando. Estis aliaj konstituciaj ŝanĝoj kiel ampleksigi la funkciojn de la reĝo domaĝe al tiuj de la Asembleo. Pro tiu erara politiko, kiu akcentis la perfortan karakteron de la revolucia procezo, tiel la burĝaro kiel la reĝo devis pagi altan koston du jarojn poste. La jakobenaj deputitoj Maksimiliano Robespiero kaj Jeromo Pétion estris la batalon kontraŭ tiu reakcia revizio de la Konstitucio, kio igis ilin gajni la estimon de la pariza popolo. Sed fine nur kelkaj el la proponitaj ŝanĝoj estis enkondukitaj en la konstitucian tekston. Sed ĉi tio kontentigis neniu: nek la popolajn sociajn fortojn kiuj emis pli radikalajn ŝanĝojn, nek la reakciajn fortojn kiuj konspiradis kontraŭ la revolucio ene kaj for de la lando.

La konstitucia teksto estis finpreta en septembro de tiu jaro 1791. Ĝi deklaras ke la suvereneco apartenas al la nacio, ne al la reĝo, kiu de tiam titoliĝas “Reĝo de la Francoj”, kaj proklamas la liberecon de penso, presaro kaj religio. Ĝi krome abolas la nobelecon kaj la heredajn distingojn, la kavalariajn ordenojn, korporaciojn kaj meti-societojn, kaj dekretas liberan aliron al la oficoj kaj funkcioj kiuj ĝis tiam estis rezervitaj por la nobelaro aŭ oni heredadis ilin. La subtenado de la lokoj de religia kulto pasis dependi de la ŝtato, same kiel la pagado al la pastraro. Oni starigis la apartiĝon de la leĝa, jura kaj rega povo. La ellaborado de la leĝoj koncernas al Leĝo-dona Asembleo, kiu devas voĉdoni la leĝojn, la impostojn kaj deklari militon, kun la aprobo de la reĝo. La rega povo restis en la manoj de la monarkio, la reĝo konservis la povon nomumi kaj eksigi la ministrojn. Do, oni agnoskis al la monarko la rajton vetoi la decidojn de la Leĝo-dona Asembleo. Kvankam ĉi tiu vetoo ne estis definitiva, tiu prokrastiga ebleco fariĝus vera armilo por bremsi la revolucion. La jura povo estis asignita al sendependaj tribunaloj. La konstitucio garantiis la netuŝeblecon de la privata proprieto. Oni kreis iun servon de publika instruado por provizi bazan kaj senpagan instruon al la civitanoj, kaj ankaŭ iun publikan fondaĵon de bonfarado por okupiĝi pri la orfaj geinfanoj kaj zorgi pri la handikapuloj. Oni deklaris la egalecon inter la civitanoj rilate al la impostoj, kiujn oni aplikus proporcie al la propraĵoj kaj la enspezoj. Ankaŭ la fiska sistemo estis modifita eliminante nerektajn impostojn kaj starigante rektajn impostojn, kies kvanto dependis de la riĉeco de la posedantoj, ĉu teroj, urbaj propraĵoj aŭ industriaj kaj komercaj negocoj. Malaperis la antikva divido laŭ

provincoj kaj oni organizis la teritorion en 83 departementoj, kiuj siavice estis dividitaj en sekcioj.

Ĉi tiu konstitucio, ja, ne estis tre demokratia. Plejparto el la burĝuloj kaj intelektuloj de tiu epoko estis liberalaj, sed tio ne signifas ke ili estis demokratoj. La pov-divido, la politika koncepto de monarkio konstitucia, la abolo de la feŭdecaj rajtoj, la ekonomia unuecigo de la lando, la disvendado de la teroj de la Eklezio, la unuecigo de pez- kaj mezurunuoj... estis disponoj sufiĉe allogaj por plejparto el la francaj burĝuloj. Al tiu klaso interesita disvolvi la komercon, la industrion kaj la terkulturon sur kapitalistaj bazoj, malmulte povus interesi ebligi rektan partoprenon de la senposedaj amasoj. Cele bremsi la politikan partoprenon de tiuj malaltaj klas-tavoloj, oni dividis la civitanojn laŭ la konceptoj de “aktivaj” kaj “pasivaj”. La kriterio por diferencigi ambaŭ kolektivojn estis la ekonomia situacio. Tiucele oni konsideris la tutjaran renton kiun ĉiu ricevadis kies indikilo estis la pagado de nerektaj impostoj egalvalora al tritaga salajro kaj la fakto havi fiksan loĝlokon. Nur la “aktivaj” civitanoj rajtis voĉdoni kaj okupi postenojn en la administracio. La balotado por elekti perantojn por la Leĝo-fara Asembleo fariĝis laŭ nereкта maniero, sed por la municipaj perantoj la balotado estis laŭ rekta maniero. Plejparte el la politikaj kluboj rifuzadis la “pasivajn” civitanojn, kaj same okazis en la armeo kaj la Nacia Gvardio. Eble ĉi tiu socia distingo de la civitanaro laŭ ekonomiaj kriterioj estis la plej grava el la eraroj de tiu jaro 1791. Plendante pri ĉi tiu malegaleca politiko, Marat publikigis en sia ĵurnalo «**La Amiko de la Popolo**»:

Sed estas malvero ke (...) ili abolis, kiel ili fieras, ĉiun institucion kiu lezas la liberecon kaj la rajtegalecon, ĉar ili jam komencis starigi kiel bazon de sia laboro la plej humiligajn kaj ofendajn distingojn, ekskludante el la rajto je civitaneco, elektebleco por la oficoj kaj la honoro servi la patrujon, la multamason da civitanoj deklaritaj ne-aktivaj.

La 1-an de oktobro komencis funkcii la Leĝdona Asembleo. La Konstitucia Asembleo estis dekretinte ke siaj membroj ne povu esti elektitaj por la nova asembleo. Tiamaniere oni promociis grandan renoviĝon de la politikaj figuroj, kaj el tio rezultis la apero de novaj politikaj tendencoj kiuj poste ludis gravan rolon en la sekvintaj jaroj. Dum tiuj lastaj monatoj de la jaro 1791 formiĝis la politika grupo kiu poste estis konata kiel “ĝirondistoj”. La grupo neniam atingis la organiz-gradon de iliaj samtempoj kaj konkurantoj de la Klubo de la Jakobenoj, kaj neniu el ili havis la priprogramajn difinojn de la nuntempaj politikaj partioj. Tamen ilia komuna poziciigo en la asembleaj debatoj igis kunflui kelkajn talentajn deputitojn devenintajn el la franca departemento de Ĝirondo, kiuj kunvenadis ĉe **madame Roland** kun Jacques Pierre Brissot, kiu fariĝis unu el la ĉefaj ĝirondistaj lideroj. Estis la danĝero kaj la

proksimeco de milito kio impulsis la promocion de la ĝirondistoj. La organizado de armeoj de francaj nobeloj elmigrintoj en Koblenco, inter kiuj troviĝis la fratoj de Ludoviko la 16-a, estis realaĵo pri kiu devis atenti la francaj aŭtoritatoj rezultintaj el la revolucia procezo. La reĝino Maria Antonieta sendadis pli kaj pli urĝajn leteroj al ŝia frato, la aŭstria imperiestro, incitante lin interveni. Krom la dinastiaj ligiloj inter ambaŭ monarkioj ekzistis ankaŭ forta unueco bazita sur la klasaj interesoj kiuj des pli konkretiĝis ju pli grandiĝis la revolucia minaco.

La aresto de la reĝa familio en Varennes kaj la ĉesigo de la reĝa aŭtoritato —eĉ se nur provizora kaj mallongdaŭra— decidigis multajn eŭropajn nobelojn interveni en la francaj aferoj kiuj kontestis la sociopolitikan organiz-manieron sur kiu baziĝis ilia propra povo. Rezulte de la alvoko kiun la imperiestro Leopoldo estis farinta post la evento de Varennes, fine de aŭgusto de 1791 Aŭstrio kaj Prusio subskribis interakordon por organizi la kontraŭrevolucion ambaŭflanke de la landlimo inter Francio kaj Aŭstrio. La kontraŭrevoluciaj ribeloj en kelkaj francaj regionoj, ĉefe en **La-Vendée**, pri la religia afero kaj la senĉesa minaco de la elmigrintoj ĉe la landlimo montris ke la situacio tute ne normaliĝis. Fine de novembro la Leĝo-dona Asembleo dekretis ke la nobeloj kiuj ne estus revenintaj al Francio antaŭ la 1-a de januaro de 1792 estus mort-kondamnitaj kaj iliaj propraĵoj konfiskitaj. Kelkajn tagojn poste oni aprobis punojn kontraŭ la pastroj kiuj sin oponis al la klerikara statuso. En ĉi tiu kadro prosperis la predikoj de la ĝirondistoj favore al la milito. Ili konsideris ke la alfrontiĝo kontraŭ la eksteraj malamikoj kontribuis difini la internan situacion. La 12-an de decembro de 1791, la ĝirondisto Brissot eksplikis sian pozicion antaŭ la Jakobena Klubo:

Ĉu vi volas detrui per unusola bato la aristokrataron, la reakciajn pastrojn, la malkontenton? Detruu Koblencon. La estro de la nacio estus devigita reĝi laŭ la konstitucio.

Dum la ĝirondistoj propagandis favore al la milito kaj la revolucio, la reĝa Kortego laboradis favore al la kontraŭrevolucio. Estas evidenta ke la forto-rilato alvenis al iu punkto en kiu estis necesa ia difino en la politik-militista tereno. Spite al tio ke oni agnoskis la neeviteblecon de armita kontraŭfrontiĝo, ne ĉiuj revoluciaj lideroj, eĉ ne la plej radikalaj, estis favoraj al ekstera milito. La Jakobena Klubo sin oponis al la konflikto. En iu diskurso de la 2-a de januaro de 1792 Robespiero eksplikis ĉi tiun poziciigon. Li konsideris grava eraro situigi la malamikon en Koblenco kiam la malamiko troviĝis ankaŭ, kaj ĉefe, ene de Francio. Laŭ li, la rango de ĉefa celo kiun Brissot kaj la ĝirondistoj asignis al la milito permesus daŭre eviti alpreni internajn disponojn klare revoluciajn por senartikigi la kontraŭrevolucion, ekzemple, armi la popolon. Tamen, ĉi tiuj pozicioj ne havis grandan apogon.

1792: milito kaj revolucia radikaliĝo



Dum la unuaj monatoj de la jaro 1792 pliakcentiĝis la problemoj, kaj internaj kaj eksteraj, de la revolucia reĝimo. Interne de la lando estis du tipoj je disturboj, unue tiuj de la sociaj fortoj kaj regionoj kiuj, pro religiaj, tradiciaj k. a. kialoj, estis kontraŭ la revolucio, kaj due, tiuj far de amasoj kiuj, aprobante la revolucionan procezon, tamen, suferadis la mankon je necesaj nutraĵoj. Ekstere de la lando, konkrete en Koblenco, estis amasiĝante militaj fortoj pretaj invadi Francion por restarigi la malnovan soci-ordon. Tiuj fortoj estis konstituitaj de la elmigrintaj nobeloj plus armeaj trupoj de Aŭstrio kaj Prusio. La reĝa Kortego deziris tiun eksteran militistan intervenon kaj la reĝino Maria Antonieta senĉese sendadis leterojn al ŝia frato la imperiestro de Aŭstrio, Leopoldo la 2-a, tiusence. Jen teksto de parto el unu el tiuj leteroj:

Koncernas al la Imperiestro meti finon al la disturboj de la Franca Revolucio. Jam ne plu eblas la interakordo. La armita forto detruis ĉion kaj nur la armita forto povos ripari ĉion.

Tamen dum tiuj monatoj estis ia diplomatia negociado, almenaŭ formala, inter la aŭstria imperiestro kaj la franca revolucia regantaro kun la ŝajna celo eviti la militon. Sed la teniĝo de ambaŭ negocantoj tute ne estis sincera. Leopoldo ne deziris iniciati la militajn operaciojn kaj preferis peli la francojn fari tiun paŝon apogante la internajn konfliktojn de la lando. Dume ankaŭ la francoj emis la militon, tiel la Kortego kiel la ĝirondista asemblea plimulto, kvankam pro malsamaj kialoj kaj celoj. Brissot kaj siaj ĝirondistoj volis la eksteran militon por vekii unuigantan senton de la francoj kontraŭ fremda atako. Laŭŝajna paradokso estis ke la reĝo Ludoviko la 16-a apogis tiun politikon kaj li simulis apogi la revolucionan reĝimon kaj partoprenis en la religia kulto far pastroj akceptintaj la Statuson de la Klerikaro

ellaboritan de la revoluciuloj, sed lia vera celo estis ke la franca armeo estu venkita por restarigi lian absolutisman povon. Nur la montanoj, kies ĉefaj lideroj estis tiam Danton kaj Robespiero, sin oponis en la Asembleo al la militaj planoj. Oni nomis **montanoj** la deputitojn kiuj sidadis en la altaj benkoj de la Asembleejo, kiuj apartenis al la jakobenoj kaj aliaj grupoj kiel la t. n. **“cordeliers”**.

Sed venkis la partianoj de la milito kaj Francio deklaris ĝin al Aŭstrio la 30-an de aprilo de 1792. La rezulto de tiu elpaŝo estis malsama ol esperite de ĉiuj. Unue oni devas noti ke tiam estis nova aŭstria imperiestro, Francisko la 2-a regadis la imperion ekde la forpaso de lia patro Leopoldo la 2-a okazinta la 1-an de marto de tiu jaro. Lia teniĝo rilate al la milito kaj la francaj aferoj estis la sama kiel lia patro. La komenciĝo de la milito ne rezultis laŭ la plano de la ĝirondistoj. La francaj trupoj senorde diskuris antaŭ la armeoj de Aŭstrio kaj Prusio komandataj de la duko de Brunswick. Ĉi tiu avancadis sur la franca teritorio serioze minacante la Revolution. La konspirado de la reĝino kun la fremdaj potencoj ne ĉesis kaj okazadis kontraŭrevoluciaj incidentoj en la sudo de Francio, ĉefe en la urbo Arles. La situacio estis malfacila ankaŭ en la ekonomia tereno; tre malaltiĝis la valoro de la revoluciaj monotoj kaj malabundis iuj nutraĵoj. Triobligis la prezo de la sukero pro tio ke la eventoj de la metropolo influis sur la franca kolonio de Haitio. Pro la kriza situacio, amasoj de miloj da kamparanoj de la ĉirkaŭaĵoj de Parizo okupis vendejojn en la ĉefurbo kaj altrudis novajn prezojn pli kongruaj kun la enspezoj. Do, la urbaj civitanaj sekcioj postulis al la Asembleo pli fortajn disponojn kontraŭ la nutraĵ-akaparado.

Je la komenciĝo de la milito la reĝo akceptis enkonduki en la registaron ĝirondistajn ministrojn pri Financoj kaj Internaj Aferoj. Sed tio ne signifis ke

li rezignaciis reĝi laŭ la konstitucio kiel estis supozinta Brissot. Male, kiam en junio oni konstatis la superecon de la armeoj de la kontraŭrevolucio, Ludoviko la 16-a eksigis la ĝirondistajn ministrojn, vetois la dekreton kontraŭ la klerikoj rifuzintaj la statuson kaj tiun kiu disponis la starigon de kampadejo por 20-mil naciaj gvardioj apud Parizo. Reage, la ĝirondistoj kunvokis popolan manifestacion. La 20-an de junio, etvendistoj kaj metiistoj de la plej radikalaj kvartaloj de Parizo, portante armilojn, adresiĝis al la palaco de la Tuilerioj kie ili preskaŭ linĉis la reĝan familion. Por tion eviti kaj koste perdi iom el la malmulta digno kiu ankoraŭ restis al li, Ludoviko la 16-a akceptis surmeti al si la frugian ĉapon kreitan de la ĝirondistoj kaj tostis je la sano de la nacio. La ĝirondistoj sentis panikon pro la rezulto de la mobilizo kiun ili mem iniciatis. Ili estis perantoj de la alta komerca burĝaro kaj multaj el ili apartenis al tiu klaso. La politikiĝo de la amasoj kontestis, fakte, la distingon inter “aktivaj” kaj “pasivaj” civitanoj. Ekde la krizo de junio de 1791, kun la fuĝo-provo de la reĝo, oni permesis al la malriĉaj civitanoj varbiĝi kiel helpo-trupo de la nacia gvardio kaj volontuloj de la armeo. Sed la “pasivaj” civitanoj ne nur respondis la alvokojn de la Asembleo kaj la Urbodomo; pli kaj pli ili formis siajn proprajn “fratajn societojn” kie ili debatadis kaj sin organizadis. La sekcioj de Parizo troviĝis en stato de ekscitiĝo. Evidentis ke tiu demalsupra movado ne estos sufokata per la redono de siaj ministraj oficoj al iuj ajn deputitoj.

Rezulte de la katastrofa situacio de la milito, la 11-an de julio de 1792 oni deklaris la patrujon subdanĝere. La graveco de la situacio devigis ignori la tiurilatan vetoon de la reĝo. La Asembleo ordonis kunveni 20-mil gvardiojn proksime al la ĉefurbo. Krome, kun la preteksto inviti ilin al la festado de la 14-a de julio, la Asembleo kunvokis halti en Parizo la gvardiojn de la provincoj kiuj troviĝis survoje al la milita fronto. La grupo da 500 marsejlaj volontuloj revenantaj sufoki la kontraŭrevolucionan ribelon de Arles, distingiĝis pro sia batalemo. Ilia milit-kanto, verkita de Rouget de Lisle, klamadis en ĝia refreno: *Al la armoj, civitanoj! Formu viajn batalionojn! Ni marŝu! Ni marŝu! Ke ia malpura sango inundu / niajn sulkojn!* La Marsejl-kanto, kiel ĝi estis nomata, plurestis ne nur kiel nacia himno de Francio, sed ankaŭ kiel simbolo de ĉiu batalado kontraŭ la tiraneco kaj la subpremado. Pli kaj pli kreskis la nombro de tiuj kiuj postuladis ke oni metu finon al la kompromiso kun la monarko kaj ke oni detronigu lin. La popola viglado kaj la rekvizicio de la armiloj de la suspektinduloj, la febra agado de la sekcioj de Parizo kiuj sin deklaris en stato de konstanta asembleo, estis for de tio atendita de la ĝirondistoj. Kaj same kiel estis farintaj antaŭe la deputitoj de la Konstitucia Asem-

bleo, ili entreprenis negocadon kun la reĝo por reakiri iliajn ministrejojn kaj faris alvokon al la popolo trankviliĝi. La ekstera minaco, laŭ ilia aserto, postulis demeti ĉiun ajn ŝanĝon je registaro aŭ konstitucio. Tiele, konfirmiĝis la timo de la jakobenoj: la milito fariĝis vualo kaj bremsilo kontraŭ la plifirmiĝo de la revolucio kaj preteksto por ne detrui tiujn kiuj minacis ĝin de interne.

Tuj post kiam la ĝirondistoj intencis bremsi la mobilizadon, prenis la iniciaton la senkulotuloj, kiuj tiam jam estis konsiderinde organizitaj. La asembleoj de la plej radikalaj sekcioj kunsidadis ĉiuvespere, post la finiĝo de la labor-horaro. Ignorante la distingon inter la civitanoj establitan de la Konstitucio, la plej radikalaj sekcioj komencis akcepti “pasivajn” civitanojn. Krom ĉi tiu laŭkvartala organiziĝo formiĝis iu centra komitato kiu ampleksis 48 sekciojn. Iu simila okazis en aliaj lokoj en la lando. Baldaŭ tiuj komitatoj pretiĝis gvidi ribelan movadon. La ŝanĝo-procezo trafis ankaŭ la municipan regantaron de Parizo kie Bailly, la urbestro responsulo de la **Masakro de la Marsa Kampo**, estis anstataŭigita de la ĝirondisto Pétion. Komence de la monato aŭgusto estis konata la enhavo de la **“Manifesto Brunswick”** redaktita la 25-an de julio en Koblenco. Post enkonduko per kiu oni pravigis la intervenon de Aŭstrio kaj Prusio defendante la francan monarkion, tiu dokumento proklamis ke oni garantius la protekton al ĉiuj kiuj submetiĝis al la reĝa aŭtoritato kaj kontribuis al la restarigo de la ordo (antaŭrevolucia). La centra tezo prezentata per tiu teksto estis ke la militon oni povus eviti se la trupoj de ambaŭ menciitaj landoj ne estus kontraŭstarigataj de la popolo, la armeo kaj la naciaj gvardioj. Anstataŭ senkuraĝigi, la **“Manifesto Brunswick”** furiozigis la anim-staton de tiuj kiuj ne plu povis elteni la subtenadon de la reĝo sur la trono. Unu post alia, la sekcioj sin deklaris dum la sekvintaj tagoj kontraŭ la monarkio kaj la monarko. La sekcio de la laborista kvartalo de *Saint Antoine*, kunvokis la ceterajn efektiviĝi marŝadon arm-enmane al la asembleo la 5-an de aŭgusto. La urbestro Pétion sukcesis konvinki la parizajn aktivulojn postmeti la agadon ĝis la 9-a de tiu monato, ebligante ke la deputitoj abolu la monarkion sen popola mobilizado. Sed en la sesio de la 9-a de aŭgusto la Asembleo eĉ ne pritraktis la aferon. Nur la Asembleo ŝajnis nenion scii pri la preparado kiun tiel la senkulotuloj kiel la reĝa Kortego estis farante por iu interfrontiĝo jam neevitebla. La reĝo plifortigis la garnizonon de la svisaj gvardioj de la palaco de la Tuilerioj al kiuj aldoniĝis kelkaj nobelaj volontuloj. Siaflanke, la sekcioj, la naciaj gvardioj kaj kelkaj provincaj armeanoj kiuj troviĝis en la ĉefurbo entreprenis novan mobiliziĝon kaj kreis la Insurekcion Komunumon de Parizo. Matene de la 10a de aŭgusto la insurgentaj fortoj adresiĝis al la

Palaco de la Tuilerioj kaj eniris en unu el la kortoj. Post mallonga diskutado la reĝaj gvardioj pafis kontraŭ la homamaso. La batalo estis feroça. Sed spite al la multenombraj ambaŭflankaj viktimoj, komence de la vespero, la alsaltintoj havis la palacon subkontrole. La trijara revolucia sperto klarigis al la popolamasoj kiuj estis iliaj malamikoj kaj celoj. Ĉi-foje, male ol estis okazinte en oktobro de 1789 kaj eĉ antaŭ kelkaj tagoj, la popolanoj ne konformiĝis trudante ian humiligon al la reĝo por eltiri el li novan signon de aliĝo al la revolucio. La celo, tiam, estis definitive meti finon al la monarĥio. La antaŭa sperto instruis al la plej radikalaj sociaj sektoroj ankaŭ tion ke ili devus sin teni viglantaj por ke tio kion oni estis akirinte pere de la sango de multaj viroj kaj virinoj ne perdiĝu per ia negocita interakordo. Nun ili atingis la eksigon de la reĝo. La alsalto al la Palaco de la Tuilerioj signifis la realigon de la rompiĝo kun la Malnova Reĝimo. Oni devas reliefigi ke la subjekto de la elpaŝo de 1792 kiu akcelis la kurson de la revolucio ne estis la burĝaro, eĉ se ĝia enhavo estis parto el la burĝa revolucio.

La revolucia decido enkarnigita en la senkulotuloj (metiistoj, etvendistoj, laboristoj...) respeguliĝis en ĉiuj aspektoj de la socia kaj politika vivo. Plejparto el la deputitoj de la Leĝiga Asembleo demisiis kaj multaj el ili forlasis la landon. La prizonoj pleniĝis je liberalaj nobeloj. Retiriĝis el la lando ankaŭ ĉiuj ambasadoroj escepte tiu de Usono. Ĉesis okazi la festoj kaj salon-kunsidoj, en kiuj ankoraŭ kunekzistis perantoj de la malnova kaj la nova ordo. La establo de la Insurekcia Komunumo okazigis grandan anstataŭigon de gvidantoj. La novaj estis membroj de la sekcioj, malpli lertaj pri parol-arto sed ankaŭ malpli hezitemaj pri la agado. La restriktaj disponoj de la Konstitucio de 1791 estis forgesitaj kaj la sekcioj realigadis rektan demokration kiel neniam antaŭe estis okazinte. Komenciĝis la rekvizicioj serĉante armilojn, veturilojn kaj suspektindulojn. Kelkfoje, la sekciaj asembleoj rolis krome kiel popolaj tribunaloj. Francio havis militon, kaj internan kaj eksteran. Spit' al ĉio, en la Leĝo-dona Asembleo la ŝanĝo ne tiom estis radikala. Fine estis la ĝirondistoj kiuj rapide kontrolis ĝian gvidadon. Escepte la ministrejo pri Justico kiu estis asignita al la karisma kaj sendependa Danton, ĉiuj ceteraj ministrejoj estis okupitaj de ĝirondistaj deputitoj. Dum la daŭro de malmultaj tagoj ili prenis disponojn kiujn oni estis evitinte ekde la komenciĝo de la revolucio: oni suspendis la reĝon; oni decidis la deportadon de la rezistemaj pastroj; ĉesis esti sub la kontrolo de la Eklezio la registrado de naskiĝoj, gedziĝoj kaj mortoj; oni legaligis la eksedziĝojn; oni abolis la feŭdecajn rajtojn senkompense; oni ekpraktikis la ekspropriigon de la elmigrintoj; oni malpermesis la uzadon de la titolo *monsieur* (sinjoro)

kiu estis anstataŭita per la uzado de *citoyen* (civitano). Krome oni kunvokis balotadon por formi Konvencion al kiu oni asignis la taskon redakti novan Konstitucion kaj samtempe regi la landon. Spite al la radikaleco de tiuj disponoj, la senkulotuloj kiuj kontrolis la Parizan Komunumon postuladis pli klaran avancon. Al ili ne sufiĉis la suspendon de la reĝaj funkcioj: ili petis detronigi la reĝon kaj juĝi lin kune kun ĉiujn rojalistojn. Laŭ ili, oni devus apliki ekzemplo-donajn punojn kiel la ekzekutado de la akaparistoj, spekulantoj kaj tiuj kiuj agadis kontraŭ la revoluciaj mon-notoj.

Komence de septembro de 1792, la invadintaj armeoj estis atinginte grandajn sukcesojn en Francio. La revoluciuloj sciis ke la ekstera invado estis ĝuante la apogon de la interna kontraŭrevolucio. Oni timis ke la urbo Verduno, distance 300 kilometrojn el la ĉefurbo, ne kapablos dumlonge rezisti la sieĝon far la prusia armeo. Parizo devis pretiĝi por la defendo. La aŭtoritatoj de la Komunumo devis denove proklami la patrujon subdanĝere, kaj kunvokis la civitanojn aliĝi al la armeo: *Al la armeoj, civitanoj, al la armeoj!* tekstis la multenombraj afiŝoj surgluitaj en la urbaj stratoj. Nur en Parizo, en la daŭro de malmultaj tagoj oni sukcesis rekruti 20-mil volontulojn, 300-mil en la tuta lando. Danton alvokis haste organizi la defendon kun la konvinko ke la venko eblis: *Sonas alarm-trumpeto kiu disvastiĝos tra la tuta Francio. Ĝi neniel estas alarma signalo: ĝi estas la trumpet-alvoko por impeti kontraŭ la malamikoj de la patrujo. Por ilin venki, sinjoroj, estas al ni necesa aŭdaco, ankoraŭ plua aŭdaco, ĉiam aŭdaco, kaj Francio estos savita.* Por atingi tiun savon estis necese ne nur volontuloj destine al la fronto sed ankaŭ efektivigi internan vigladon por decide tranĉi ĉiun ajn kontraŭrevolucian ĝermon. Pelitaj de la ekstreme grava situacio, la Asembleo devis alpreni eksterordinarajn disponojn por ĝin alfronti, kaj decidis fariĝi milita komitato. Ĉiuj civitanoj devis mobiliziĝi por savi la patrujon: tiuj kiuj posedus armilojn devus adresiĝi al la fronto, tiuj kiuj restus en la postgardio devis sin armi per pik-stangoj kaj fosi tranĉejojn. Dum Danton estis prononcante sian faman diskurson de la 2-a de septembro de 1792 en la Asambleejo, ekde la Sav-Komitato de la Urbodomo de Parizo, Marat lanĉadis proklamojn kontraŭ la malamikoj kaŝitaj en la urbo kaj alvokis la popolon ekzekuti ilin. Dum tiuj tagoj ĉio atingita de la Revolucio povus perdiĝi per la restariĝo celata de Aŭstrio kaj Prusio kaj apogata de 300-mil elmigrintaj nobeloj, la rifuzemaj pastroj kaj la grandaj komercistoj kaj financistoj. La franca popolo sciis ke ĉiu ajn ekstera movo ĉiam povus kalkuli kun la agado de tiuj kiuj estante ene de la lando estis sin organizante favore al la sama reakcia celo. Parizo prenis la iniciaton kromanfoje. La popolaj societoj, la radikalaj kluboj,

soldatoj kiuj ankoraŭ restis tie kaj la naciaj gvardioj de la urbo kiuj estis rekrutitaj inter la senkulotuloj, la *cordeliers* k.a., kiam komenciĝis la rumoro ke la politikaj arestitoj profitos la ekiron de la 20-mil-volontuloj por fari kontraŭ-baton kaj transdoni Parizon al la malamiko, entreprenis masakradon kaj dum kelkaj tagoj ili pereigis inter 1.100 kaj 1.400 prizonulojn. Tiu faro estas konata en la historio kiel la “masakro de septembro”. La ĝirondistoj atribuis al la jakobenoj kaj al Dantono la respondecon pri tiu mortigado kaj uzadis ĝin de tiam kiel argumento atestanta pri la sang-avida kaj murdema karaktero de siaj politikaj rivaloj. Tamen decas klarigi ke la efektivigado de la mortigoj ne estis rezulto de individua decido. La subjekto kiu plenumis la masakron de septembro ne estis la Klubo de la Jakobenoj sed la pariza popolo. La komunikaĵo de la Komunumo de Parizo al la komunumoj de la tuta lando tekstis: *La Komunumo de Parizo haste informas siajn fratojn de ĉiuj departementoj ke la popolo mortigis parton el la ferocaj konspirantoj arestitaj en la prizonoj. Ĉi tiu faro de justico ŝajnis al ĝi neevitebla por reteni per la teroro la hordojn da perfiduloj kiuj sin kaŝis ene de la urbaj muroj kiam la popolo estis pretiĝanta por marŝi kontraŭ la malamiko.* Se la masakroj de septembro plifirmigis la Revolucion en la interno de la lando, la mobilizado de volontuloj permesis bremsi la invadan avancadon plifirmigante la revolucion ekstere. La pinto de la venko de la francoj sur la prusia armeo estis la batalo de Valmy la 20-an de septembro de 1792. La norda franca armeo komandita de Charles François Dumouriez kaj la centra armeo de tiu lando komandita de François Christophe Kellermann, haltigis la prusian armeon subkomande de la duko de Brunswick. De strikte militista vidpunkto la batalo ne estis tre grava. Mortis en ĝi 300 francoj kaj 184 prusoj, kaj krome ambaŭ malamikaj armeoj devis retreti ĉar la pozicioj kiujn ili okupadis estus malfacile defendeblaj. Sed de politika vidpunkto ĝi estis tre grava ĉar reliefigis ke la kontraŭrevoluciaj trupoj ne povis plu avanci kontraŭ la francan ĉefurbon.

Du tagojn post tiu batalo, la 22-a de septembro, la ĵus formita Konvencio dekretis *...unuanime ke la monarkio estis abolita en Francio.* Tri tagojn poste tiu asembleo dekretis ke *la franca Respubliko estas unu kaj nedividebla.* La revolucia procezo estis eniranta en novan fazon. Post la alsalto al la Palaco de la Tuilerioj la reĝo estis suspendita kaj la tuta reĝa familio troviĝis prizonita en la iama fortreso de la Templ-kavaliroj. La proklamado de la Respubliko kaj la kreskanta popola malamo al la reĝo devigis difini ĉi ties situacion. La poziciigo de la ĝirondistoj pri ĉi tiu temo altiris al ili la malamikecon de ampleksaj popolaj sektoroj. La radikaleco kiun estis akiranta la procezo preterpasis la

kapablon de la membroj de tiu politika tendenco. La ĝirondistoj rifuzis apogi la ekzekutadon de la monarko. Estis la jakobenoj kiuj prenis la iniciaton pri tiu ĉi temo. En la debatoj ĉu la reĝo devus esti juĝata far iu speciala tribunalo, Robespiero asertis, la 3-an de decembro, ke entrepreni leĝan proceson kontraŭ Ludoviko implicus legitimi la monarkion kiun la popolo, la vera suvereno, jam estis kondamninta: *Proponi ke oni procesu Ludovikon la 16-an (...) estas ia kontraŭrevolucia ideo ĉar ĝi kontestas la Revolucion mem.* Siaflanke Louis de Saint-Just esprimis jenajn opinioj: *laŭ mia opinio ne eblas ia mezpunkto: tiu homo devas aŭ reĝi aŭ morti... ...ne eblas reĝi senkulpe... ...ĉiu reĝo estas aŭ ribelulo aŭ uzurpanto...* Dum la lastaj monatoj de la jaro 1792 tiu afero de la destino de la reĝo estis unu el la ĉefaj temoj pri kiuj devis okupi la Konvencio.

Alia, eĉ pli grava, problemo kiun la revoluciuloj devis alfronti tiam estis la kontraŭdiroj rezultintaj el la konflikto inter la ekonomia liberalismo kaj la soci-ekonomia krizo kiun estis suferante Francio de antaŭ kelkaj jaroj kaj kiu estis speciale akra en la aŭtuno de 1792. La ekonomia liberalismo estis unu el la centraj aksoj de la burĝa revolucia programo: meti finon al la sennombraj impostoj, al la distingo inter plebaj kaj nobelaj teroj, al la jurisdikcia povo de la aristokrataro... Tamen tiu programo ne nur kontraŭfrontis la interesojn de la aristokrataro sed efikis ankaŭ kontraŭ la malriĉa popola bazo de la socio. Kaj estis malfacile plifirmigi la Revolucion malatentante pri la interesoj de la popolo, kiu, male ol dum la Malnova Reĝimo, tiam politike mobiliziĝis pro la problemo de la porvivaj nutraĵoj, ellaboradis programojn kaj disponis je propraj lideroj. Dum la lastaj monatoj de 1792, pro la malabundo je nutraĵoj, okazis tumultaj disrabo en la urboj kaj grava kamparana ribelo postulante la maltigon de la prezo de la tritiko. Kelkaj deputitoj de la Konvencio proponis eksterordinarajn leĝojn por alfronti la problemon sed temis pri izolitaj kaj ne plene konvinkitaj voĉoj. Do, oni prenis neniun disponon. Laŭ la superreganta pensmaniero de la burĝa revolucio oni devus interveni nenion sur la ekonomia funkciado. Tiel por la ĝirondistoj kiel por plejparto el la jakobenoj, estis kvazaŭ dogmaro la ideoj de la fiziokratistoj. *Laissez faire, laissez passer* (lasu fari, lasu okazi) estis ilia devizo. Tiu penso, sufiĉe forte instalita en la Konvencio, eniris en kontraŭdiron kun la sento kaj la necesoj de la popolaj amasoj, kiujn pli bone enkarnigis tiam la senkulotuloj, kaj aliaj grupoj kiel la “rabiuloj” tiam aperantaj sub la premo de tiu problemaro. Tiamaniere oni estis generante gravan kontraŭdiron en la interno de la revolucia forto mem. Estis maturiĝante la kondiĉoj por la okazado de revolucio ene de la Revolucio.

Revolucio ene de la Revolucio



La reĝo Ludoviko la 16-a, kiu tiam estis nomata “la civitano Ludoviko Kapeto” vivis nur la tri unuajn semajnojn de la jaro 1793. Oni senkapigis lin per la gilotino la 21-an de januaro. La persona karaktero de la monarkia institucio igis ke la revoluciuloj konsideris neeviteble pereigi la monarkon. Ili timis ke dum li estus vivanta, li konstituus pretekston por kontrurevolucio. Oni kreis du komisionojn: unu kun la celo esplori la dokumentojn trovitajn en la Palaco de la Tuilerioj kaj alia kun la misio establi ĉu Ludoviko Kapeto, deklarita nepunebla en la Konstitucio, povus esti procesata. La 6-an de novembro de 1792 la imuneco de la monarko estis revokita, do la eksreĝo povis esti metita sub proceso de la Konvencio. La 19-an de novembro oni malkovris la feran ŝrankon kie estis kaŝitaj la poŝtaĵoj de la korespondado inter Ludoviko la 16-a kaj la fremdaj monarĥoj. Post tiu malkovro, iuj deputitoj, kiel Robespiero kaj Saint-Just, deklaris sian volon puni la civitanon Ludovikon Kapeton sen ia ajan proceso, sed plejparto el la Konvencio preferis fari laŭregulan proceson por ke Francio kaj la fremdaj landoj ne dubu pri la leĝeco de la verdikto. Ludoviko kunlaboris kun liaj advokatoj sed li sciis ke estis tre malebla lia savo. Post lia ekzekutado la fremdaj potencoj kiuj antaŭe ne estis partoprenantaj en la koalicio kontraŭ la revolucia Francio decidis eniri en tiun aliancon.

Dume pludaŭris kaj eĉ pliakriĝis la sociekonomia problemaro en la lando. Dum la unuaj kvar monatoj de 1793 tre altiĝis la inflacio ĉefe de la prezoj de la ligno, sapo, sukero kaj kandeloj, kaj senvaloriĝis la stampita paper-mono de la revolucio, kio okazigis popolan agitiĝon en Parizo. La respondo proponita de la senkulotuloj estis dekreti maksimumajn prezojn en la tuta lando, samkiel la devigan kurzon de la revolucia mono, kio damaĝus la riĉulojn kiuj havis alirecon al la oro kaj la arĝento, kaj apliki teroron kontraŭ la akaparistoj kaj kontraŭrevoluciuloj. Por ebligi tiujn disponojn rezultus necese purigi la Kon-

vencion eksigante la konservemajn ĝirondistojn. Sed ne nur la ĝirondistoj sed ankaŭ la jakobenoj havis la ekonomikan konceptadon de la liberalismo kaj tial ĉiuj ili estis kontraŭaj al la proponitaj disponoj, ĉefe al tiuj pri la prezfiksigo. La 24-an de februaro la senkulotuloj faris egan premon sur la Konvencio. La virinoj partoprenantaj la manifestacion memorigis al la deputitoj ke sen la popola apogo estus malfacile atingi la rekrutadon de soldatoj. Tial ke la Asembleo montriĝis evitema, dum la du sekvintaj tagoj la senkulotuloj de Parizo sin lanĉis al la rekta agado. Ili invadis la vendejojn kaj fiksis la prezojn. La naciaj gvardioj, multaj el ili apartenantaj al la samaj sociaj tavoloj kiel la predantoj, prokrastis sian intervenadon. Tiu mobilizado estis kondamnita de la Konvencio. Robespiero kritikis la civitanojn kiuj generis ribelojn. Marat, kiu estis incitinta ekde sia ĵurnalo disrabi la vendejojn kaj pendumi la ekspluatantajn komercistojn, denuncis post kelkaj tagoj la movadon asertante ke ĝi estis ĝirondista konspiro. La ĝirondistoj, pli prave, denuncis Marat-on kiel instiginto de la agitiĝo. Tamen la fortorilato malebligis ke la kondamno prosperu, ĉar, tiel kiel argumentis la manifestaciintaj virinoj, al la Konvencio estis necesa la favoro de la popola movado. La Komunumo de Parizo daŭre prezentadis petojn kaj proponojn antaŭ la Asembleo por atingi ian solvon al la problemo de la provizajoj kaj tiele iompostiom radikaligadis la revolucia procezo. Sed estis necese ke pliiintensiĝus la kontraŭrevolucio por ke la Konvencio alprenu kiel propraj la disponojn proponitajn de la senkulotuloj. Neniu socia klaso sinmortigas kaj cedas ĝian superregadon senbatale. En la decidaj momentoj de la klasbatalo estas kiam plej nete manifestiĝas la klaso-interesoj kaj la solidareco de la samklasanoj, kaj tiu solidareco transcendas la land-limojn. La Franca Respubliko proklamis al la popoloj de la mondo sian apogon en la batalo kontraŭ la subpremado kaj la tiraneco. Tiu internaciismo, propra de ĉiu aŭtentika

revolucio, zorgigis la subpremantojn kaj tiranojn de la kontinento. Anglujo, Hispanio kaj Nederlando aldoniĝis al la aŭstro-prusa koalicio kontraŭ la Franca Revolucio. Post la venko de la francoj en la batalo de Valmy, la armeo de la revolucio, komandita de Dumoriez, sukcesis forpeli el la lando la invadintojn kaj eĉ eniri en la nederlandan teritorion. Sed post la plifortiĝo de la kontraŭrevolucia alianco, la iniciato pasis denove al la atakantoj kaj la franca armeo devis retroiri. Sed plej grave estis ke ene de Francio estiĝis interna milito pro kontraŭrevolucia movado, pli intensa ol ĉiuj antaŭaj, kun partopreno de dekmi- loj da kamparanoj. Tiu ribelo estis plej grava en la Vendea departemento. En tiu regiono okazis kamp- aranaj ribeloj, same kiel en aliaj lokoj de Francio, en 1789 kaj 1792, tamen estis okaze de la porarmea re- krutado kiam estiĝis amasa ribelo en 1793 kiu kon- kretiĝis kiel vera kontraŭrevolucia movado gvidata de aristokratoj celantaj restarigi la Malnovan Reĝi- mon per fero kaj sango. Sukcesinte konkeri la lokan regadon, la vendeanoj nuligis la vendon de la teroj de la Eklezio kaj komencis mortigi respublikanojn kaj naciajn gvardiojn. La alianco inter la kamparanoj de la Vendée, la pastroj kaj la nobeloj ricevis apogon de Anglio. En majo de 1793 la vendeanoj lanĉis ofensivon ŭesten kaj suden metante sub serioza dan- ĝero la revolucion kaj la nacian sendependecon. Kaj tiu de la Vendée-regiono ne estis izolita kazo. En gravaj urboj kiel Liono, Marsejlo kaj Bordoza oka- zis municipaj ribeloj kiuj sin oponis al la radikaliĝo de la nacia procezo. En ĉiuj kazoj la malkontento vekigis okaze de la krutado por la armeo. Reage al tiu reakcia perforto la Konvencio aprobis pli radika- lajn disponojn: oni kreis iun Komitaton de Publika Savo kaj revoluciaj komitatoj en ĉiu urbo-domo por juĝi politikajn deliktojn. Oni aprobis ankaŭ pli du- rajn punojn kontraŭ la pastroj kiuj sin oponis al la Statuso de la Klerikaro. La kontraŭstaro de la tradi- ciaj fortoj vekis la radikaliĝon de la revolucio kaj ĉi tiu pliintensigis la kontraŭrevolucian teniĝon kaj perforton de la konservemuloj, kiu siavice generis plian revolucian perforton. Estas senutile intenci es- tabli kiu kulpas pri tiu procezo. La ekspliko estas ke en ĉiu ŝanĝo-procezo, ĉu revolucia aŭ kontraŭrevo- lucia, la afero neniam solviĝas pace inter iu klaso kiu volas konservi sian superregadon kaj alia kiu emas renversigi la situacion.

Sed dum oni alprenis tiujn disponojn por defendi la revolucion, estiĝis malakordo ankaŭ ene de la Konvencio inter la ĝirondistoj kaj la montanoj. La disputo inter ambaŭ deputitaraj grupoj, fakte, ek- zistis ekde la kreado de la Konvencio, sed pliakr- iĝis en majo de 1793. La ĝirondistoj, sufiĉe kon- servemaj pri kelkaj aferoj, pretendis kontroli la ur- bajn sekciojn kies membraro, tamen, tute malsimi- lis ol ili. Sed la Revolucio ankoraŭ estis aktiva, ĉe- fe en Parizo. Tiel la montanoj kiel la rabiuloj ko-

mencis laŭsisteman agadon por purigi la Konven- cion kaj eviti ke la sekcioj de Parizo falu en la ma- nojn de la ĝirondistoj. La metodoj proponitaj de ĉiu el tiuj tendencoj estis konsiderinde malsimilaj. Por la jakobenoj kaj aliaj deputitoj de la Monto, sufiĉus forigi la ĝirondistojn el la Asembleo. La rabiuloj, male, postuladis la fizikan eliminadon de tiuj deputitoj kiuj jam enviciĝis kontraŭ la revolucio. Komence de aprilo, laŭ propono de Marat oni estis farinte alvokon al ĉiuj departementoj por ke ili forneu iliajn ĝirondistajn deputitojn. La pasia kaj agresema tono de tiu dokumento estis respon- dita de la ĝirondistoj per iu ofensivo ene de la Kon- vencio. La deputitoj de tiu tendenco atingis ke “la amiko de la popolo” estu procesita de la revolucia tribunalo. Tamen, male ol tio esperite de ili, la tri- bunalto absolvis lin. Elirante el la juĝejo Marat es- tis vivuata de grandamaso da parizaj popolanoj. La logiko de la situacio, kun la interna kaj la eks- tera militoj, devigis la registaron aprobi kelkajn disponojn petitajn de la rabiuloj de antaŭtempe, ĉe-fe la kurzo de la revolucia paper-mono. Fine de majo, kiam la senkulotuloj jam kontrolis tri kvar- onojn el la sekcioj de Parizo, ĉi tiuj kreis iun revolucian Komitaton konsistigita de naŭ personoj kies misio estis plani kaj gvidi la insurekcion. La celo estis tre klara: forigi la ĝirondistojn el la Kon- vencio por alpreni ĉiun disponojn, kiujn ili estis prokrastigante, rilate al la nacia defendo, la revolucian Teroro kaj la devigaj altrudoj al la riĉuloj. La insurekcia movado komenciĝis matene de la 31-a de majo. La plej moderaj deputitoj entreprenis ne- gocadon cele eviti ke la insurekcio de Parizo trud- iĝos sur la konstituita povo en la Konvencio. Ta- men, jam ne eblis kompromisa solvo. Dimanĉe la 2-an de junio de 1793, grupoj de armitaj batalionoj de naciaj gvardioj kiuj tiam estis komandataj de la radikala François Hanriot, kaj grandamaso da arm- itaj senkulotuloj, gvidataj de la rabiuloj ĉirkaŭis la Palacon de la Tuilerioj kie tiam asembleis la Kon- vencio. La deputitoj ne povis eviti kapitulaci antaŭ la pariza popolo kaj fine la Asembleo diktis la en- hejman areston de 29 ĝirondistaj gvidantoj.

Ŝanĝita la fortorilato en la Konvencio per la popo- la mobilizo de la 31-a de majo al la 2-a de junio de 1793, komenciĝis la plej radikala kaj heroeca peri- odo de la Franca Revolucio subgvide de la jakobe- noj. Komenciĝis revolucio ene de la Revolucio. De tiam kaj dum unu jaro, oni aprobis disponojn kiujn nek la deputitoj de 1789 nek la ĝirondistoj volis alpreni. Tamen, la fakto ke oni atentis pri la radiko de la problemoj kaj oni aplikis eksterordi- narajn rimedojn por konkretiĝi la necesan trans- formadon ne signifis ŝanĝon en la klasa enhavo de la revolucio. La esencaj kontraŭdiroj de la revolu-

cio en la revolucio gvidata de la jakobenoj, finiĝis en julio de 1794 per nova forto-reĝustigo kiu, unuafoje ekde 1789, ne okazis maldekstr-direkten. Oni devas ne fari duon-revoluciojn. La 10-an de julio de 1793, Danton kaj aliaj gvidantoj kiuj, kvankam enviciĝintaj kontraŭ la ĝirondistoj, havis poziciigon multe pli moderitaj ol la jakobenoj, estis eksigitaj el la Komitato pri Publika Savo. Kelke da tagoj poste, laŭ decido de la Konvencio kiu estis la sola oficiala referenco de la popola suvereneco, Robespiero eniris en la Komitaton. Li neniam oficis kiel diktatoro, eĉ ne kiel prezidento. Lia influo sur la registaro kaj sur tuta Francio estis rezulto de lia persona merito, lia kapablo konvinke realigi la taskojn truditajn de la situacio kaj lia revolucia fordonco. La makiavela bildo de Robespiero konstruita far liaj multenombraj malamikoj ne devenas el la senkulotuloj kiuj volis pliprofundigi en la revolucionan procezon. La bildo de iu Robespiero halucinita kaj fanatika venis el malamikoj politike moderaj aŭ klare kontraŭrevoluciaj. Neniam ili povis pardoni al li esti nekoruptebla. La jakobenoj kaj, kvankam ne regis, ankaŭ la rabiuloj kaj aliaj montanoj aŭ maldekstruloj, komprenis ke oni devas ne duonfari revolucion, ke vera revolucio devas esti komplete. Ilia revolucia karaktero kaj ilia pli malpli flua ligo kun la popola movado, igis ilin percepti la limojn kaj kontraŭdirojn de la nova socio kiun ili ĵus komencis konstrui. Pro ilia socia pozicio, pro la momento en kiu ili devis interveni kaj pro la historia senco de la procezo kiu igis ke la burĝaro estu la klaso alvokita superregi, tiuj jakobenaj gvidantoj, kaj eĉ la aliaj pli radikalaj grupoj, ne povis nek sciis ellabori alternativon kiu superus la kontraŭdirojn kaj limojn kiujn nepre enhavas ĉiu burĝ-klasa revolucio. Robespiero kaj aliaj tiamaj revoluciuloj estis konsciaj pri la fakto ke la pluekzistado de la privata propraĵo estis atenco kontraŭ la principo de la **egaleco**, devizo de la revolucio, sed ili konsciis ankaŭ pri sia nekapablo solvi tiun problemon. Jen deklaro de Robespiero de la 24-a de aprilo de 1793:

...ne estis necese, sendube, fari revolucion por sciigi al la universo ke la granda malegaleco de posedaĵoj estas la bazo de sennombraj malbonaĵoj kaj sennombraj deliktoj, sed ne pro tio ni ne estas malpli konsciaj ke la egaleco de propraĵoj estas ĥimero.

Sed male ol plejparto el la burĝaro kaj la liberalaj intelektuloj –kaj tiamaj kaj nuntempaj– ili ne dubis pliprofundigi en la revolucionan procezon evitante kompromison kun la feŭdisma tiraneco aŭ kun tiu de la mono. La burĝaro mem kun timo retroiris antaŭ la jakobena decidemo. Eĉ nuntempe

oni emfazas en la **Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano**, la akcepteblan povo-dividon kongruan kun la monarkio kaj la grandecon de la unua imperio kreita laŭ tiu skemo sub Napoleono. Rapide post ilia ekregado, la jakobenoj impulsis la redaktadon kaj aprobon de nova Konstitucio. Ĉi tiu estis aprobita la 24-an de junio de 1793, kaj, spit' al tio ke ĝi neniam estis plene praktikata, ĝi establis la bazon de la (burĝa) demokratio. Dum la debatado pri la nova konstitucia teksto, unu el la plej diskutitaj aferoj estis la rilato inter propraĵo kaj libereco. La fakto ke la posedado aperus kiel plejsupera rajto estis kritikita de la plej radikalaj revoluciuloj. Robespiero asertis pri la Universala Deklaracio de 1789:

Definante la liberecon kiel la unua el la homaj bonoj, kiel la plej sakrala el la rajtoj kiujn ĉiu homo posedas laŭnature, vi prave asertis ke ĝi trovas siajn limojn en la rajtoj de aliaj. Kial vi ne aplikis saman kriterion al la propraĵo kiu estas iu socia kreaĵo, kvazaŭ la eternaj leĝoj de la naturo estus malpli respektindaj ol la homaj kreaĵoj? Vi multobligis la artikolojn por certigi kiel eble plej grandan liberecon al la uzado de la propraĵo, kaj vi diris eĉ ne unu solan vorton por determini ĝiajn legitimajn karakteraĵojn. Tiamaniere via Deklaracio ŝajnas farita, ne por la homoj, sed por la riĉuloj, por la akaparistoj, por la kaŝ-negocistoj kaj por la tiranoj.

Spite al la riĉenhava debato, ĉi tiu konceptado pri la posedaĵo kiel socia konvencio subordigata al la naturaj rajtoj ne estis enkondukita en la **Rajtojn de la Homo kaj de la Civitano** kiu iris ĉekape de la nova Konstitucio. Sed esceptante tiun kontraŭdiron inter la posed-rajto kaj la libereco, la cetero el la nova Konstitucio estis totala rompiĝo kun la liberala tradicio ne-demokratia de la periodo inter 1789 kaj 1791. Oni establis unuafoje, eĉ se nur por la viroj, la universalan voĉdon-rajton. Tio signifis nuligi la distingon inter aktivaj kaj pasivaj civitanoj establitan en la antaŭa Konstitucio. En julio de tiu sama jaro la Konvencio alprenis la plej grandan decidon, kiu ne estis abolita iam poste: la nuligo de la sistemo de feŭdeca propraĵo. Male ol la restriktaj kiujn oni estis enkondukinte en 1789, ĉi-foje oni deklaris ĝian totalan abolon kaj senkompensojn. Ĉi tio signifis ne asigni al la feŭdorigina proprieto la legitimecon kiun oni asignis al la burĝa aŭ la malgranda proprieto. Oni povas diri ke koncerne al la detruo de la feŭdismo, estis ĉi tiu leĝo kiu reale kaj totale faligis tiun sistemon. Oni ordonis la detruon de ĉiuj feŭdaj titoloj. Teknike, la decido igis necese determini la eblan feŭdecan karakteron de grandnombro da kontraktoj kiuj,

kvankam interakorditaj inter plebanoj, uzis feŭdecajn formojn, cele aboli ĉiun tiutipan kontrakton. En kio rilatas al la konstruo de la nova socio, jam frue prezentiĝis la problemo de la rajtoj de tiuj kiuj ne havis alian posedaĵon ol sia laborforto. Unuafoje oni establis la devon de la ŝtato provizi laboron, publikan prizorgadon kaj bazan instruon. La projekto krei novan sistemon de publika edukado ellaborita de Louis Michel Lepeletier celis ke la kulturo ĉesu esti ies privilegio. Estas interese vidi kiel iu difino tre ege progresista kaj preciza de la malpermesigo de ĉiutipa servuteco aŭ sklaveco enportas establon de la rajto pri kontraktado (kaj ekspluatado) de la salajrita laboro. La Konstitucio de 1793 deklaras ke: *Ĉiu homo povas impliki siajn servojn, sian tempon, sed ne povas sin vendi nek esti vendata; sia persono ne estas cedebila propraĵo. La leĝo ne agnoskas ian ajn servutecon; povas ekzisti nur kompromiso de zorgado kaj dankeco inter la homo kiu laboras kaj tiu kiu provizas al li laboron.* Reprenante la analizon pri la transicio de la feŭdalismo al la kapitalismo, ni vidas ĉi tie iun leĝan konkretiĝon de la kondiĉo de

la ekzistado de la kapitalo: la ekzistado de salajrata laboro. Samtempe, oni povas vidi en ĉi tiu ĝenerala formulado de la ŝajno de la salajro kiel justa interakordo de pagata laboro kaj ne kiel rilato de ekspluatado. Jacques Roux, lidero de la rabiuloj tre atentis pri la ekonomiaj diferencoj. Per lia diskurso konata

kiel la **Manifesto de la Rabiuloj**, prononcita en la Konvencio la 25-an de junio de 1793, diris: *La egaleco estas nura fantomo kiam la riĉulo, pere de la monopollo, uzas la rajton pri vivo kaj morto de siaj proksimuloj.* Tamen, en kio koncernas al la salajro, la kritiko de Roux temis pri la perdo je akiro-povo pro la inflacio, la malaltaj niveloj de la salajroj de la virinoj kaj la neebleco subteni per ili multpersonajn familiojn. Tiam ankoraŭ ne eblis kompreni la esencon de la ekspluatado kiun oni realigas kaj oni kaŝas pere de la salajra rilato eĉ kiam la kvanto de la salajro ne estas sub tiom necesa por la fizika kaj socia reproduktiĝo de la familio. Tiuj-ĉi limiĝoj devas ne kaŝi la progresan karakteron de la Konstitucio por tiu historia momento. La insurekcio ne nur estis agnoskita kiel popola rajto kontraŭ la subpremado, sed kiel devo, kaj tio ne estis nura retoriko ĉar tiam la popolo ankoraŭ estis armita. Laŭ la Konstitucio de 1793, la nacia defendo estas afero de la civitanoj, kiuj krome estas ankaŭ soldatoj. Koncerne al la rilato kun aliaj landoj oni apogas la internaciismon kiu

celas la amikecon inter la liberaj popoloj samtempe kiel la malebleco je paco kun la invadintoj.

En ĝiaj landlimoj, Francio devis sin defendi tiam de la atako de prusanoj, aŭstroj, angloj, hispanoj, piemontanoj kaj korsikanoj. En oktobro la fortoj de la koalicio estis okupante Alzacon. Kaj estis milito tiam ankaŭ interne de la lando. En junio la kontraŭrevoluciuloj de la Vendée entreprenis novan ofensivon kaj kvankam ili estis venkitaj en la batalo de Nanto, ili estis sukcesinte kapti kelkajn urbojn kaj kelkfoje venki la armeojn de la Respubliko. Krome estis ankaŭ la federaciisma ribelo, kiu estis tre forta en kelkaj provincoj, kontraŭ Parizo kaj la jakobena registaro post la forpelo de la ĝirondistoj. En Liono la rojalistoj kaptis la povon kaj komencis mortigi la respublikanojn. Krome pliintensiĝis la jam ekzistantaj ribeloj en Marsejlo, Bordoza, Kaeno kaj Tulono.

La 13-an de julio de 1793 Marat estis murdita. Iu junulino, Karlota Kordaj, simpatianta de la ĝirondista tendenco, translokiĝis el la departemento de Normandio kun la celo mortigi “la amikon de la popolo”. Ŝi sukcesis eniri en la domon de la fama



La morto de Marat

revoluciulo kaj ponardis lin en la dorso dum li estis ene de banujo. La murdo vekis grandan indignon en la revoluciaj medioj de la ĉefurbo. La junulino estis ekzekutita kvin tagojn poste kaj ĉio ĉi kontribuis doni plian perfortan karakteron al la socia interfrontiĝo. Malmultajn tagojn post la murdo de Marat la britoj dekla-

ris ke ili konsideros kiel kontrabando la komercadon de greno kun Francio. Tio estis parto de iu plano de ekonomia sabotado kontraŭ Francio. Krome estis bruligitaj kelkaj kampoj kaj fabrikoj far kontraŭrevoluciaj fortoj. Celante detru la revolucian reĝimon ĉiurimede, la reakciaj fortoj ne heditis cedi Tulonon al la angloj, kaj same estus farinte en Liono se la respublikanoj ne estus enirinte ĝustatempe en la urbon. En tiu malfacila situacio la inflacio kaj la senvaloriĝo de la revolucia papermono akceliĝis kromanfoje. La percepto ke ekzistis konspiro cele uzi la manko je nutraĵoj kiel metodo por frakasi la rezisto-volon de la respublikana popolo, igis pliigi la popola malamo kontraŭ la akaparistoj, la monopolistoj kaj la spekulantoj kiuj enviciĝis kun la malamikaro. Pli kaj pli aliĝis al la kontraŭrevolucio frakcioj de la burĝaro lacaj je la popola agitiĝo kaj emantaj ordon, liberalaj politikistoj kaj militistoj kiuj gvidis la revolucion de 1789, kaj ankaŭ la ĝis tiam revoluciaj ĝirondistoj. Aŭtune de la jaro 1793 la situacio de la revoluciaj fortoj estis vere neeltenebla.



Totala milito kaj revolucia teroro

La defendo de Francio kaj de la Revolucio estis la sama afero en la situacio de la lastaj monatoj de 1793. La problemo estis kiuj pretis subordigi ĉiujn ceterajn politikajn aferojn al tiu celo. Estis klare ke oni ne povis kalkuli je la alta burĝaro nek la meza. Ankaŭ ne kun la “brilaj” homoj kiuj reprezentis la Trian Staton en 1789, kaj eĉ malpli kun grandparto el la armea oficiraro. La defendo de la Revolucio estis alprenita de la senkulotuloj kaj la malriĉaj kamparanoj sub jakobena gvidado. Kvankam la jakobenoj diferencis el ilia bazo ili ne dubis batali apud la popolo. La 23-a de aŭgusto de 1793 la Konvencio dekretis amasan rekrutadon. Eble unuafoje en la historio oni entreprenis “totalan militon”. Oni rekrutis preskaŭ duon-milionon da novaj soldatoj, per kio duobliĝis la trupoj mobilizitaj por la defendo de la Revolucio. Sed ne nur la junuloj forirantaj direkte al la fronto plenediĉiĝis al la milito. La tuta loĝantaro devis partopreni en la militaj streboj. La edziĝintaj viroj devis labori en la fabrikoj de armiloj; la virinoj kudrante tendojn kaj uniformojn; la infanoj kaj la maljunuloj farante bandaĝojn... La tuta franca popolo estis ia aŭ alimaniere mobilizita por la defendo de la Respubliko. Tiurilate, oni povas diri ke far la Revolucio, aŭ rezulte de ĝi, estis naskiĝante nova maniero militi. La noveco de la taktikoj kaj la juneco de la militistaj kadruloj estis esprimo de la socia transformiĝo kiu estis okazanta en la lando, La mobilizado de civiluloj por la milito signifis drastan ŝanĝon en la maniero efektiviĝi la kontraŭfrontiĝojn, multobligante kaj potencigante la forton de la revolucia armeo. Ja, la civitanoj-soldatoj ne havis profesion trejniĝon ĉar ĝis antaŭ malmulte da tempo, ili estis laboristoj, metiistoj, vendistoj, instruistoj... Tamen ili posedis la spiritan forton defendi la revolucion kaj universalajn valorojn kiel la libereco, la rajtoegalco, la justeco, kvankam fine ĉi tiu revolucio instituis socian ordon kie ne multe donus al ili. Prave opiniis Napoleono pri tiu temo: *En la revolucioj*

estas du tipoj je personoj, tiuj kiuj faras la revoluciojn kaj tiuj kiuj eltiras profiton el ili.

Ĉiukaze, en 1793 la malamo a la internaj kaj eksteraj malamikoj de la revolucio efikis kiel instigilo. La francaj respublikanoj sciis ke la reĝoj, la klerikaro kaj la aristokrataro ne kompatas al ili se ili atingus la venkon. Iom-post-iom la nacia armeo rekonkeris la invaditajn teritoriojn. Sed krom defendi la landlimojn, estis necese sufoki la internajn kontraŭrevoluciajn movadojn kiuj agadis akorde kaj kombine kun la deekstera agresado. La Konvencio prenis kelkajn decidojn por plifaciligi la ekonomian penadon de tiutipa milito. Oni dekretis mort-punon por la akaparistoj, permeson rekvizicii grenon por ĝin provizi al Parizo kaj aliaj grandaj urboj, devigan imposton por la riĉuloj. Kvankam jam antaŭe oni estis alpreninte tiajn disponojn, nun estis efektivigataj rigore kaj senprokraste. La Konvencio apogis la defendon ankaŭ pliintensigante la persekutadon kontraŭ la malamikoj: oni decidis procesi la eksreĝinon Maria-Antonietan, detruadi la Vendée-regionon kaj enkarcerigi ĉiujn eksterlandanojn venintajn al Francio ekde 1789. La pliigo de la perforto karakterizis la revolucionan procezon de tiam kaj dum la sekva jaro. Per iu diskurso de la 25-a de decembro de 1793, Robespiero diris:

La revolucia regantaro ŝuldas al la bonaj civitanoj ĉiun publikan protekton; a la malamikoj de la popolo ne ŝuldas pli ol la morto.

La senĉesa malboniĝo de la situacio kaj la danĝero kiun tio signifis por la Revolucio kaj la revoluciuloj igis ke la Konvencio pripensu pli drastajn disponojn ol tiuj adoptitaj antaŭe. La 4-an de septembro la senkulotuloj kune kun etvendistoj kaj proprietuloj koncentriĝis en la Placo de la Grève postulante panon. Jacques Hébert kaj Pierre-Gaspard Chaumette, radikalaj membroj de la pariza Komunumo proponis al la manifestaciantoj kuniĝi sekv-tage por marŝadi di-

rekte al la Konvenciejo. La 5-an de septembro iu manifestacio gvidata de Chaumette adresiĝis a la Konvencio por postuli la kreadon de iu revolucia armeo kaj la starigon de la Teroro kontraŭ ĉiuj kiuj volus ekonomie kaj/aŭ politike subfosi la revolucion. Iuj deputitoj defendis eĉ pli drastajn proponojn.

La Konvencio konsentis pri iuj el la faritaj postuloj, sed pere de iu lerta manovro, al kiu kontribuis Danton per sia oratoria arto, oni sukcesis enkonduki en la interakordon iajn kompensojn kiuj iom post iom da tempo rezultis fatalaj por la senkulotuloj. Ja, oni disponis ke la membroj de la revoluciaj komitatoj ricevu pagon kaj ankaŭ la malriĉaj ĉeestantoj de la asembleoj, sed aliflanke oni limigis la nombron da kunsidoj de la sekciaj asembleoj al nur po du en ĉiu semajno. Sed tiumomente estis rimarkinda la venko de la senkulotuloj. Ili sukcesis ke oni arestu la suspektindulojn; oni aprobis kolosan krediton por la fabrikado de armiloj, kaj la Komitato de Publika Savo entreprenis projekton por la kreado de iu revolucia armeo. Ekde septembro de 1793, la Konvencio estis prilaboranta la instituciojn kiuj poste karakterizis la respublikon de la jakobenoj kaj la senkulotuloj. La 5-an de tiu monato oni alprenis la rigoran politikon t. n. "Teroro". Sekvinttage, du deputitoj kiuj defendadis en la Konvencio poziciojn similajn al tiuj de la senkulotuloj, Billaud-Varenne kaj Collot d'Herbois, estis elektitaj por la Komitato pri Publika Savo. La 11-an oni voĉdonis la leĝon kiu fiksas la maksimuman prezon de la greno. La 17-an oni aldonis la leĝon kontraŭ la suspektinduloj. Fine, la 29-an oni aprobis la "ĝeneralan maksimumon", tio estas, ĉiuj naciaj prezoj estis fiksitaj en la valoroj de la jaro 1790 plus unu triono. Ankaŭ la salajroj estis fiksitaj iom pli altaj ol la valoroj de 1790. Notindas ke la salajroj estis plialtigitaj pli ol tiu kvanto tial ke malabundis la laboristoj pro la milita rekrutado. Ĉi tio pli estis perceptebla en la grandaj urboj kiel Parizo, kie la laboristoj estis akirinte konsiderindan politikan gravon. Tial, la enkonduko de la salajroj ene de la maksimumo ne estis populara decido, kvankam, verdire, la fakta limigo de la salajroj ne estis aplikita ĝis meze de la sekvinta jaro.

La 10-an de oktobro la Konvencio dekretis ke la registaro estos revolucia ĝis la atingo de la paco, kaj pro tio estis suspendita la aplikado de la Konstitucio. Tiutage mem, Saint-Just pravigis la Teroron, ĝiajn motivojn kaj ĝiajn celojn: ***Estas nepre necese regadi fere tiujn kiujn oni ne povas regi alimaniere! Estas nepre necese subpremi la tiranojn!*** La plej konsciaj gvidantoj estis alveninte al la sama konkludo: oni ne regas en la revoluciaj tempoj same kiel en la normalaj tempoj. Antaŭ kelke da tagoj, Robespiero estis mendinte al la Konvencio pli da energio en la subpremado de la reakcio: ***Ĉi tio povas ŝajni dura; sed eĉ pli dura por iu patrioto estus ke, post du jaroj estos mortintaj cent-mil homoj pro la perfido***

kaj la malrigoro: ĝuste la malrigoro antaŭ la perfiduloj damaĝas nin. La pliintensiĝo de la socia interfrontiĝo nepre kondukas al tiutipaj kontraŭdiroj. Neniu kapablas trafe difini ĉu estas pli fatala preni tiajn decidojn aŭ ne, almenaŭ en la momento de la decido. Multaj konvencianoj opiniis same kiel Robespiero pri ĉi ties konkludoj. Li mem rigore defendadis en 1791 la esprim-liberon, sed fine de 1793 li agnoskis ke iuj rajtoj kaj garantioj plifortigadis la malamikojn. Respondante al tiuj kiuj akuzis je despotismo la registaron, li deklaris:

Se la forto de la popola regantaro en paca tempo estas la virto, ĝia forto en tempo de revolucio estas, samtempe, la virto kaj la teroro. Sen la virto, la teroro estas fatala: sen la teroro la virto estas senpotenca. (...) Oni diris ke la teroro estas la forto de despota regantaro. Do, ĉu similas tiu via al despotismo? Jes, kiel la glavo kiu brilas en la manoj de la herooj de la libereco similas al tiu per kiu estas armitaj la lakeoj de la tiraneco. (...) La revolucia regantaro estas la despotismo de la libereco kontraŭ la tiraneco. Ĉu la forto estis farita nur por protekti la krimon?

Povas ŝajni konvinka ĉi tiu argumentado de la revolucia gvidanto, sed la studanto de la historio, kiu celas eltiri instruon de la pasintecaj okazaĵoj, devas atenti pri la trompo kiun tiu argumentado enportas. Sendube la kontraŭrevoluciuloj profitas la demokratiajn atingiĝojn siacele, sed la agad-maniere de la revoluciuloj devas esti malsama ol tiu de la kontraŭrevoluciuloj ĝuste pro tio ke ankaŭ siaj celoj estas malsamaj. La revolucia celo estas liberigi la homaron el ĉiu subpremado, perforto, ekspluatado... resume, la celo estas la bono de la homaro. La revolucio estas tio... aŭ estas nenio. Se por atingi tiun celon oni falas en la praktikadon de perforto kaj subpremado, la rezulto estas kvazaŭ konstrui sur sablo; la konstruaĵo nepre ruiniĝos. Akceptinte la argumentadon de Robespiero, ke decas perforti kontraŭ la malamikoj, la revoluciuloj de 1793 starigis la bazon de iu praktiko kiu poste ruinigis la Revolucion mem kiam la kontraŭdiroj inter la diversaj revoluciaj tendencoj igis ke iuj revoluciuloj sin sentis malamikoj de aliaj.

Nu, kongrue kun tiuj principoj de Robespiero, ekde septembro al decembro de 1793 la nombro da arestitoj en Parizo triobliĝis, de 1500 al 4500. Inter oktobro kaj decembro estis ekzekutitaj 177 personoj. Maria Antonieta, emblemo de la konspirema kaj frivoleca Kortego, troviĝis inter la unuaj kiuj estis gilotinitaj, sen la "honoraj" kiujn ŝia edzo ĝuis je la ekzekutado. Plejparto el la mort-kondamnitaj, tamen, ne estis aristokratoj de la Kortego sed personoj kiuj iam ajn dum la Revolucio ludis ian rolon: Bailly, urbestro de Parizo ekde julio de 1789 al aŭgusto de 1792 kaj responsulo de la Masakro de la Marsa

Kampo estis ekzekutita en tiu sama loko; Barnave kaj Dupont, membroj de la triumviraro kiu gvidis la Revolucion ekde oktobro de 1789 ĝis la reĝa fuĝoprovo de Varennes en 1791; Madame Roland, iu klera virino en kies salono ofte kunsidis la ĝirondistoj; Olympe de Georges, la redaktorino de la **Deklaracio de la Rajtoj de la Virino kaj de la Civitano** kiu defendis la reĝon dum ĉi ties proceso. Estis ekzekutitaj ankaŭ 22 ĝirondistaj lideroj. En ilia disputo kun la jakobenoj, la membroj de tiu tendenco alproksimiĝis pli kaj pli al la moderuloj kaj la monarkistoj. Ja, ili ne kapablis adaptiĝi al la radikaliĝo de la Revolucio. Iuj el ili aliris al la gilotino kantante la Marsejl-kanzonon sed la plej malcedemaj sin tenis klare kontraŭrevolucie. Iu ĵurnalo de la epoko, tre legata de la senkulotuloj, diris en oktobro de 1793:

Ek!, hastu do, Majstro Samsono (pariza ekzekutisto) grasigu la pulioj, pretiĝu meti sur la pezilon tiun klikon da Krimuloj kiujn kvin-cent miliono da demonoj vomis sur la teron kaj kiujn oni devus sufoki ĉe ilia lulilo.

Iu gravulo kiu estis ekzekutita tiam estis la princo Filipo Egaleco, kuzo de Ludoviko la 16-a, kiu estis adoptinte sian novan nomon cele anstataŭi la titolon de duko de Orleans kaj kiu estis voĉdoninte favore al la senkapigo de la reĝo en la Konvencio sed kiu falis en malfavoron okaze de la perfido de lia filo kiu fuĝis al Anglujo kune kun Dumoriez. La dizerto de la generalo Dumoriez estis okazinte printempe de tiu jaro, La 18-an de marto li suferis malvenkon en Nerwinden antaŭ la aŭstria armeo. La Konvencio sendis komisionon preziditan de Beurnonville, ministro pri Milito. Dumoriez, timante malfavoran sentencon decidis ribeli kontraŭ la revolucia reĝimo, arestis la ministron kaj la deputitojn de la Konvencio kaj transigis ilin al la malamiko, sed li fiaskis en lia intenco ke la trupoj komanditaj de li marŝadu kontraŭ Parizo. Do li ekziliĝis, la 4-an de aprilo, kaj akompanis lin iuj komplicoj, inter ili la filo de la duko de Orleans. Rilate al la teroro, iuj membroj de la Konvencio proponis ke oni inkludu en la liston tiujn kiuj sin oponis

al la mobilizo de la 2-a de julio, sed Robespiero kontraŭstaris tion kaj sukcesis ke oni retenu ilin en la prizono. Samtempe kiam oni estis efektivigante tiun terorigan politikon kontraŭ la interna opozicio, oni decide entreprenis la operaciojn por rekonkeri la perditan teritorion. Oni nomumis novajn reprezentantojn kun plena povo por apliki la teroron kaj agadi favore al la senkulotuloj. Fine de aŭgusto la revolucia armeo rekonkeris Marsejlon kaj en oktobro faris la samon en Bordojo. La 9-an de oktobro kapitulaciis Liono. La Komitato pri Publika Savo dekretis la senarmigon de la loĝantaro de la kaptitaj urboj, la kreadon de lokaj komitatoj, la detruon de la domoj de la riĉuloj kaj la ŝanĝon de la nomo de “urbo” per

“Liberigita Urbo”. Por efektivigi tiujn disponojn, oni nomumis la necedemajn Collot d’Herbois kaj Fouché. Cele rapidigi la aplikadon de la puno al la kontraŭrevolucioj, oni anstataŭis la uzon de la gilotino per fusil- kaj kanon-pafado. Oni kalkulas ke dumil lionanoj estis ekzekutitaj en la daŭro de malmultaj tagoj. Fine de 1793 oni sukcesis venki ankaŭ la rojalistajn kolonojn de la Vendée. La amasigo kaj la malsanoj okazigis la morton de miloj da kaptitaj vendeanoj. La subpremado de tiu movado, pioniro de la armita ribelo kontraŭ la Respubliko kaj la Revolucio, estis feroĉa. En la urbo Nanto, la komisiito de la Konvencio, Carrier, ordonis proksimume kvin-mil ekzekutojn anstataŭante la gilotinson per fusil-pafado kaj dronado. Ankaŭ Tulono estis rekonkerita far la armeo de la Respubliko.

Al la sukceso de ĉi tiu kampanjo tre kontribuis la Kolonel-leŭtenanto Napoleono Bonaparto. La angla eskadro estis devigita retiriĝi. Dum la sekvintaj semajnoj la revoluciaj komisiitoj ordonis centojn da paf-ekzekutoj. Ĉu La teroro savis la Revolucion? Ĉiukaze la savo ne daŭris dumlonge. Dubindas ĉu por tiel magra venka rezulto meritis la penon tiom da sango-verŝado. Tamen, estas eksterdube ke la rojalistoj estus aplikintaj similan perforton kaj subpremadon kaze ke ili estus pli fortaj, kiel ili fakte faris en la lokoj kie ili venkis kaj atingis la povon kaj poste en la tuta Francio dum la sekvintaj jaroj.



Simboloj de la Revolucio




Krom en la militista, politika kaj socia terenoj, ankaŭ en la temo de la ideologio kaj ĉi ties simboloj la revolucio eniris en novan fazon en septembro de 1793. La konstruado de ia nova identeco jam estis konkretiĝinta en iuj emblemoj kiel la kokardo, unue verda kaj poste trikolora en julio de 1789. Ankaŭ la t. n. “arboj de la libereco” kaj la “altaroj de la patrujo” aperis antaŭ la Respubliko, same kiel la frigia ĉapo kiun popularigis la ĝirondistoj. La Marsejl-kanto aperis en 1790. La abolo de la nobelaro kaj la konfliktoj kun la ne-revolucia klerikaro impulsis la anstataŭon de la simboloj de la Malnova Reĝimo per aliaj novaj simboloj, kongruaj kun la nocio de civitaneco. La titolo “civitano” anstataŭis tiun de “sinjoro”, kaj la rifuzo de la pompa vestaro kaj la komplikaj hararanĝoj esprimis la abomenon al la kortega aristokrataro kaj ĉi ties valoroj. Multaj nomoj de lokoj: stratoj, kvartaloj ktp bazitaj sur la katolika tradicio estis delasitaj ŝanĝe de aliaj eltiritaj el la revolucia idearo. Eĉ oni komencis elekti por la ĵusnaskiĝintoj nomojn kiuj anstataŭ esti prenitaj el la katolika sanktularo, venis el la antikva Romo. Romo estis la devigita referenco tiel por la vestaro kiel por la har-aranĝoj kaj ankaŭ por la historiaj analogioj kiuj plenigis la tiamajn politikajn diskursojn.

La novan identecon oni disvastigadis pere de multaj rimedoj: kanzonoj, civitanaj festoj, teatro, multenombraj ĵurnaloj kaj broŝuroj, la diskursoj en la kluboj... sed ĉefe en la novaj praktikoj kiuj fariĝis

preskaŭ ĉiutagaj. La edukadon de civitanoj efektiviĝis tiel en la kluboj kaj sekciaj asembleoj kiel en la manifestacioj kaj ribelaj okazaĵoj kiuj kunligis la nocion de civitaneco kaj la revolucionan karakteron. Ankaŭ la unueciĝ-rilato inter la nocioj de civitano kaj soldato kontribuis plifirmigi la identiĝon kun la patrujo. Ne estis hazardo tio ke kiam la Revolucio fariĝis pli radikala, la proceso sammaniere manifestiĝis en la sfero de la simboloj. Kiel forta esprimo de la klerisma raciismo kaj kiel signo ke la Revolucio estis malfermante novan eraon en la historio de la homaro, la 5-an de oktobro de 1793 la Kon-

venencio establis la Revolucionan aŭ Respublikan Kalendaron, kiu estis elaborita de la matematikisto Gilbert Romme. La dato prenita kiel komenciĝo de la nova erao estis tiu de la Proklamo de la Respubliko, la 22-a de septembro de 1792, kiu estis konsiderita la jaro unua. Ankaŭ la monatoj

estis modifitaj; estis 12 monatoj de 30 tagoj ĉiuj ili, kaj por kompletigi la 365 tagojn oni aldonis 5 tagojn, de la 17-a al la 21-a de septembro de la tradicia kalendaro. Anstataŭ sep-tagaj semajnoj oni establis dek-tagajn periodojn (tri en ĉiu monato). La nomoj de la monatoj estis, en aŭtuno: Vendimiero, Brumero kaj Frimero, en la vintro: Nivozo, Pluviozo kaj Ventozo, en la printempo: Ĝerminalo, Florealo kaj Pradialo, kaj en la somero: Mesidoro, Termidoro kaj Fruktidoro. La kvin krom-tagaj de la jaro estis nomataj “senkulotaj” kaj estis ferioj dediĉitaj al civitanaj festoj



Libereco

Egaleco

Frateco

honore al la Virto, la Genio, la Laboro, la Opinio, kaj la Rekompenco. La kromtago de la tradicia kalendaro estis aldonita ĉiu kvara jaro al la senkulotaj tagoj kaj dediĉita al la festo de la Revolucio. Tiu noveca kalendaro estis nek pli nek malpli racia ol la tradicia kalendaro sed respegulis la revolucionan volon rompi kun la katolika ordiĝo de la tempo. Tio, kune kun la establo de la publika instruado kaj de la ŝtataj tombejoj respegulis la emon krei identecon sendepedan el la malnova ideologio. La omaĝoj kaj celebradoj al la martiroj de la revolucio, kiel Marat, la translokigo de la postrestaĵoj de Rousseau kaj Voltero al la Panteono, la oficiala adopto de ritarioj ligitaj al la antaŭkristana panteismo, kaj aliaj tiutipaj disponoj, celis respeguli la separiĝon de la ŝtato el la Eklezio ene de procezo de sekularigo de la socia vivo.

Sed la procezo de rompiĝo kun la ideologiaj aparatoj de la malnova soci-sistemo tre akceliĝis ekde septembro de la jaro 1793, t. e. komence de la 2-a jaro de la Respubliko. La agresemo kontraŭ la Katolika Eklezio pliintensiĝis laŭmezure ke la kontraŭrevolucaj fortoj pli kaj pli engaĝiĝis kun la hierarkio kaj la reakcia pastraro de tiu religio. Flanke de la revoluciaj vicoj la kontraŭfrontiĝo kun la reaktiularo kiu sin identis kun la klerikaro konkretiĝis en agado kiu estis titolita “kampanjo je senkristanigo”. De tiam jam ne plu temis pri leĝaro celanta enkadrigi la Eklezian funkciadon en la organiza



strukturo de la ŝtato sed pri vera brutala atakado kontraŭ ĉio rilatanta al la religia institucio. Oni konfiskis la posedaĵojn de la Eklezio kaj detruis religiajn bildojn. Estis ankaŭ ideologia batalado kontraŭ la katolikismo. La propagando de la revoluciuloj primokadis kaj ridindigadis la religian idearon kaj la liturgion de la Rom-katolika Eklezio. En kelkaj lokoj oni malpermesadis la celebradon de la religiaj kultoj. Notindas ke for de tiuj departementoj kie la reaciaj fortoj, kun religia apogo, masakris la revoluciulojn, en la cetero el la lando la persekutado kontraŭ la Eklezio ĝuis je granda kaj entuziasma popola apogo. La 6-an de novembro de 1793 la Konvencio rajtigis la urbestrojn malpermesi la religiajn ceremoniojn kiam ili konsiderus tion oportune. Sekvinttage la episkopo de Parizo rezignis siajn funkciojn kaj

aliaj pastroj imitis lin. Plurajn tagojn poste, la 10-an de novembro, kun la ĉeesto de la Konvencio, oni celebris la t. n. “Festo de la Racio” en la pariza katedralo *Notredame*. Du semajnojn poste, la Pariza Komunumo fermis ĉiujn preĝejojn de la ĉefurbo, kaj tio impulsis la kontraŭkristanan kampanjon en la tuta lando. Multenombraj parokejoj, preĝejoj kaj katedraloj estis konvertitaj en “Temploj de la Racio”. Tamen, spite al tio ke grandaj amasoj fervore partoprenis en la kontraŭkatolika kampanjo kaj ke la Eklezio poziciigis kontraŭrevolucie, la senkristaniga procezo estis kondamnita de grandaj figuroj de la Konvencio kaj de la Komitato pri Publika Savo. Sin oponis al tiu politiko ne nur konvencianoj kun ambiguaj pozicioj, kiel Dantono, sed ankaŭ aliaj pli radikalaj, kiel Robespiero. Rezonante sian kritikon pri la procezo

je senkristanigo, Robespiero ne poziciigis pri la defendo de la ekzistado de Dio. Li argumentis ke la ŝtatestoj devas ne alfronti la problemon en la filozofia tereno sed en la politika tereno, kaj kongrue kun tiu ideo, li konsideris ke la privirtaj sentoj de la plej granda parto el la popolo ne estis sufiĉe fortaj por ke oni povus delasi la religian moralon kiu limigas la egoismon. Tamen li ne proponis reveni al la katolikismo. Lia plano estis disvastigi la kulton al la Suprema Ento, la sanktan karakteron de la virto kaj aliajn konceptojn de politika moralo bazitaj sur la ideo de la senmorteco de la animo. Fakte,

tiu propono savis la bazajn ideojn de la religio sed sen ĉi ties tradicia kaj senutila folkloro kaj la reacia karaktero de la ĝistiam katolikismo kiu estis rolinta dum kelkaj jarcentoj kiel ideologia aparato de la feŭdisma sistemo.

Alia simbolo, ĉi-foje ikonografia, de la Revolucio estis la figuro de Marianne aŭ Marie-Anne, t. e. la prezentado de bildo de virino kun frigia ĉapo simbolante la Liberecon kaj la Respublikon. La revoluciuloj adoptis tiun figuron por simboli la ŝanĝon je politika reĝimo, sed ĉefe tial ke ĝi substrekas la simbolismon de “patrujo-patrino”, la nutranta patrino kiu protektas la gefilojn de la Respubliko. Ĉiukaze, la karaktero de simbolo de la Revolucio kaj la Respubliko de tiu bildo estis agnoskita tiel de la revoluciuloj kiel ankaŭ, eĉ se ironie, de la kontraŭrevoluciuloj.



La etapo plej freneza de la Revolucio

La printempo de la jaro 1794 (dua jaro de la Respublika erao) estis la plej ĥaosa kaj freneza de la Franca Revolucio. Fakte, estis tiam kiam komenciĝis la involucio aŭ regreso de la revolucia procezo, aŭ kiam estiĝis la kondiĉoj por ke tiu regreso okazu post ne multe da tempo. Ĉar eĉ la frenezaj disvolviĝoj havas ian internan logikon, ni penas ekspliki kiel oni alvenis al la nekomprenebla situacio en kiun falis la revolucia procezo, kaj ni vidos ke, reale, la rezultinta situacio ne tiel estas nekomprenebla, sed rekta kaj logika sekvo de la antaŭaĵoj kiujn ni studis per la antaŭaj ĉapitroj.

Lenino esprimas, per lia mallonga teksto pri *La dualeca povo* (redaktita tuj post la rusa revolucio de februaro 1917) ke:

La problemo de ĉiu revolucio estas la problemo de la povo de la Ŝtato. Ne komprenante ĉi tion, ne eblas konscie interveni en la revolucion, kaj eĉ malpli gvidi ĝin.

Temante pri la situacioj de duala aŭ duobla povo, Lenino aldonis ke ili estas kondamnitaj resti provizoraj, eventualaj... Kaj ĝuste tio okazis kelkfoje dum la Franca Revolucio. Estis multaj politikaj ŝanĝoj dum malmultjara periodo. Ĉiuj ĉi politikaj ŝanĝoj okazis ĝuste pro tio ke estis malstabla ekvilibro inter la diversaj povoj aperintaj je la krizo de la Malnova Reĝimo. Kaj menciindas ke la decida faktoro en la venko en tiuj pov-bataloj estis la mobilizoj de la popoloj, la senkulotuloj, kaj ankaŭ ke estis perforto en ĉiuj ĉi mobilizoj.

La problemo en la printempo de 1794 estis ke tiam konkretiĝis kaj pligraviĝis la kontraŭdira rilato inter la senkulotuloj kaj la jakobenoj. Se inter septembro kaj decembro de 1793 la kunfluo inter la senkulotuloj kaj la jakobena gvido ŝajnis esti totala, la distanco inter ambaŭ fortoj evidentiĝis en rilato kun la procezo je senkristanigo. Sed krome estis inter ili serio da malakordoj kaj kontraŭdiroj. La povo de la senkulotuloj atingis sian kulminon dum la periodo post la forpelo de la ĝirondistoj, kaj eĉ pli post la en-

treveno de la politiko je Teroro en septembro de 1793, ĝis la printempo de 1794. Ekde tiam la afero komencis ŝanĝiĝi.

Sed, kiu estis la esenco de la kontraŭdiro inter ambaŭ kolektivoj? Pro sia propra naturo, la povo estas ne-dividebla. La jakobenoj, samkiel antaŭe la ĝirondistoj, pli antaŭe la liberalistoj de 1789, kaj pli antaŭe la aristokratoj, havis sian propran politikan programon kaj la volon apliki ĝin. Al la popoloj senkulotuloj mankis ia programo, ilia celo kaj kapablo estis nur rifuzi kaj detruigi alies programojn kiam ili perceptis ties nekonvenecon por iliaj interesoj. En la pov-bataloj ekde julio de 1789 la popoloj rolis kiel arbitracia forto kiu levis al la povo iun forton detruante la antaŭan pov-rolanton. Tiele okazis kelkfoje:

- Per la alsalto al la fortreso de la Bastilo, kio devigis la reĝon agnoski kaj respekti la konstituciigan karakteron de la Ĝenerala Statoj.
- Per la mobilizo por devigi la reĝan familion translokiĝi el Versajlo al Parizo, kio plifortigis la pozicion de la Konstitucia Asembleo kontraŭ la intrigoj de la Kortego.
- Per la atakoj al la Palaco de la Tulerio en 1792 altrudante la eksigon de la reĝo.
- Per la ribelo, en la sama jaro, por anstataŭigi la Leĝo-faran Asembleon per la Konvencio.
- Per la premo por altrudi la kreadon de Eksterordinara Tribunalo en aŭgusto de 1792.
- Per la masakroj de septembro de 1792 kio atingis la radikaliĝon de la Konvencio kontraŭ la internaj malamikoj de la revolucio kaj ebligis la dominadon de la Asembleo far la ĝirondistoj.
- Per la mobilizo de la 4-a de majo de 1793 por altrudi al la Konvencio la fikson de la prezoj de la greno, sed rifuzante la fikson de la salajroj.
- Per la ofensivo de la 15-a de tiu monato kiu okazigis la falon de la ĝirondistoj.
- Per la altrudo al la Konvencio de la politiko de Teroro, eĉ kontraŭ la kriterio de la Komitato pri Publika Savo.

Nu, la popolaj amasoj de la urbo estis la fakta povo dum la Asembleoj, Konvencio kaj ĉi ties komitatoj estante la laŭleĝaj povoj de formala vidpunkto, neniam povis plene efektiviĝi ĝin. Sed oni devas prikonsideri la fakton ke, de vidpunkto de la tiamaj ideoj pri la afero, la altrudoj de la popolamasaj mobilizoj al la Leĝo-dona Asembleo kaj al la Konvencio ne estis tute eksterleĝaj. Laŭ la nuntempaj kriterioj tiuj premoj de la amasoj sur la Parlamento estas konsiderataj kvazaŭ puĉo, sed en la epoko de la Franca Revolucio la afero estis malsama. La Konstitucio agnoskis la rajton de la popolo ribeli kontraŭ maljustaj leĝoj. Ne povis esti alie por Konstitucio kiu eblis ĝuste dank' al la popola ribelo de la 14-a de julio 1789 kaj la alsalto al la Bastilo. Krome, la faligo de la ĝirondista povo kaj establo de la Konvencio eblis dank' al la mobilizo de la popolaj amasoj de Parizo kaj ties premo sur la Asembleo. Ĝuste, la nomo mem "Konvencio" estis prenita el la usona modelo de la konvencioj de la partioj en kiuj intervenas, por la elektado de la kandidatoj, la popolaj bazoj de la partioj. Do, surbaze de tiu ideo, en la revolucia Francio de la jaroj 1790 al 1794, ŝajnis normale ke amasoj da ĉagrenitaj viroj kaj virinoj interrompu la parlamentajn sesiojn kaj aliru al la tribuno de la Asembleo por manifestacii tie kaj esprimi ilian malkontenton kaj postulojn. Foje la membroj de la Konvencio devis eliri el la ties sesio-salono por kunsidi aliloke dum la parizaj senkulotuloj restis tie mitinge. En iuj okazoj, la plej elokventaj konvencianoj, kiel Danton, manovris por trankviligi la amasojn kaj prokrasti ties postulojn. Cele senartikigi la popolan povon iam la Asembleo disponis la limigon de la nombro da kunvenoj de la urbaj sekcioj kie la senkulotuloj kaj aliaj aktivuloj planadis kaj interakordadis ilian agadon.

Sed tiu situacio iom-post-iom generis sentojn de rifuzo de la membroj de la Konvencio al tiaj popolaj entrudoj, kaj malkonfidon de la malaltaj klasoj de la socio rilate al ĉiuj deputitoj. Tio komplikiĝis kun la alpreno de la politiko pri la Teroro, kiu estis rezulto de la popola premo, kaj la procezo de la senkristanigo, kiu estis iniciato de la plej radikalaj senkulotuloj. Dum la lastaj monatoj de 1793 la senkulotuloj kontrolis la sekciojn, la klubojn kaj la revoluciajn komitatojn de la urbodomoj samkiel kelkajn batalalionojn de la nacia gvardio, ĉefe la Pariza Komunumo. La minaco de la ekstera kaj interna opozicio al la revolucia procezo igis ke la jakobena gvido de la Konvencio konsentis apliki la disponojn postultitajn de tiuj popolaj sekcioj. Tiaj disponoj, ja, ne estis la plej prudentaj: ekde la strato oni povas faligi registaron, eĉ reĝimon, sed oni ne povas regi la landon. Ĝuste, iu pripensas de Robespiero tekstis: ***Eblas defaligi iun tronon perforte, sed nur la saĝo kapablas fondi iun respublikon.*** La Konvencio komencis reagi ekde la decembro de 1793, kiam la kontraŭ-revoluciaj movadoj estis venkitaj. Tiam la Konvencio kuraĝis institucii la revolucian registaron anstataŭigante la aŭtonomecon kiun ĝis tiam ĝuis la lokaj aŭtoritatoj per iu politiko decidata por la tuta nacio.

Pludaŭris la Teroro, sed instituciigita kaj gvidata ekde la centro; tio signifis la finon de la anarkio, sed ankaŭ la komenciĝon de la fino de la popola iniciativo. Tiel la armeoj kiel la regantaroj de la departementoj estis firme kontrolataj de la Komitato pri Publika Savo, kiu estis iu organo de la Konvencio. La Pariza Komunumo perdis grandparton el ĝia povo, kaj la senkulotuloj riskis eklipsi favore al la jakobenoj. En januaro de 1794 la Konvencio iome mildigis la religian persekutadon. Oni agnoskis la kultoliberon kaj la persekutado aldirektiĝis nur al la reakcia pastraro. La ofensivo kontraŭ la organizita movado de la senkulotuloj jam estis konkretiĝinte per la persekutado al la plej radikala el ĝiaj sekcioj, tiu de la "rabiuloj" kies lidero estis Jacques Roux. Ĉi tiu sin memmortigis en februaro de 1794 en la prizono kie li troviĝis atendante sian alkondukon al la gilotino. Se Marat estus ankoraŭ vivanta, tre eble li estus gilotinita kadre de la persekutado al la ***enragés*** (rabiuloj) aŭ de tiu kiu sekvis poste kontraŭ la ***cordeliers***, franciskanoj. Ĉi tiuj estis alia radikala organizita grupo de la senkulotuloj kaj prenis tiun nomon tial ke ili komence kunvenadis en iu monaĥejo konfiskita al la franciskana ordeno.

Nu, kiam evidentiĝis la volo de la konvencia Komitato pri Publika Savo komandita de Robespiero limigi la povon de la popolaj organizoj, la senkulotuloj ne rezignaciis; ili estis al kutimigitaj interveni en ĉiuj gravaj okazaĵoj de la Revolucio kaj havis konscion pri sia graveco. Krome la sperto montris al ili ke la sinsekvaj Asembleoj formitaj ekde 1789 fine agadis ne laŭ la intereso de la malaltaj klasoj de la socio sed de la posedantoj, kaj la tiama Konvencio ne estis escepto tiurilate. Do, ili pretiĝis por kroma alsalto al la povo. La 12 de ventozo (2-a de marto de 1794), la franciskanaj lideroj Jean-Baptiste Carrier, Jacques-René Hébert kaj Charles-Philippe Ronsin, kiu tiam komandadis la revolucian armeon de Parizo, faris alvokon por nova insurekcio. Du tagojn poste Hébert atakis Robespieron pervorte. La jakobena lidero prenis la iniciativon cele senkapigi la popolamasan movadon. La 23-an de ventozo (12-a de marto), la menciitaj Hébert kaj Ronsin, krom Antoine-François Momoro kaj François-Nicolas Vincent, gravaj personuloj de la ***cordelier***-movado, estis arestitaj subakuze je partopreno en fremda komploto. Por igi pli verŝajna la akuzon oni arestis samtempe du fremdulojn sen ia ajn rilato kun la parizaj aferoj kaj du sensignifajn bankistojn. Ĉiuj ili estis ekzekutitaj per la gilotino la 24-an de marto kune kun aliaj suspektinduloj kiel la edzino de la generalo Quétineau kaj Michel de Laumur, guberniestro de Pondichéry. En la Konvencio, nur Danton kuraĝis sin oponi al la rigora politiko de la Komitato pri Publika Savo komandata de Robespiero. Danton, kontraŭa al la Teroro, estis indulgema eĉ kun la rabiuloj kaj la franciskanoj. Li komprenis ke la eliminado de la lideroj de tiuj grupoj estis anonco de pli ĝenerala elpurigo. La akuzo kontraŭ Hébert, la distribuado de nutraĵoj en Parizo faritaj tiumomente kaj la senorda dis-ŝiro de la senkapigita revolucia armeo de la urbo,

la 27-an de marto, rezultis efikaj. La senkulotuloj ne moviĝis. La krizo estis superita kaj la Komitato pri Publika Savo akiris grandan prestiĝon ene de la Konvencio. La ĉefgvidanto de tiu komitato, Robespiero, restis kiel la fakta kontrolanto de la povo de la ŝtataj institucioj generitaj de la Revolucio.

Tiu nova politika situacio rezultinta el la printempaj eventoj en Parizo kreis novan povon tiel frenezan kiel malstabilan. La persona povo hazarde atingita de Robespiero igis aperi ĉe ĉi tiu jakobena lidero karakterajn ecojn pri kies ekzisto neniu, eĉ ne li mem, suspektis. Tiu 36-jara homo estis akirinte, dum lia intensa politika vivo, famon je brila menso kaj nekoruptebla animo. La raporto pri la lastaj monatoj de lia vivo atestas ke lia klarmenso kaj lia nekoruptebl-eco krizis ekde marto de 1794. La esploro de lia tenebra animo pli estas tasko de psikiatro ol de historiisto. Se oni provu fari ion de tiu flanko, ŝajnas neeviteble menciiti la absolutan mankon je seksa, amora vivo de homo kiu, tamen, havis tre intensan politikan vivon. Oni konas nenian am-aferton, nek heterosekscan, nek sam-sekscan de Robespiero. Ŝajnas ke li havis ankaŭ kelkajn pri-sanajn problemojn kiuj senkapabligis lin por aliaj manieroj de viv-ĝuado. Eble pro tio li intense direktis sian atenton, sian kapablon kaj sian laboron al la politika vivo kaj konkrete al la revolucia procezo kiu estiĝis ekde 1789. En tiu kunteksto, sendube li perceptis sin mem kiel la virta politikisto kies idealon li predikadis, sed ricevante nenian alian kontenton ol tiu de liaj politikaj atingoj, kiam tiuj atingoj konkretiĝis en la akiro de povo, li, eble senkonscie, falis en la trompon klopodi la konservadon kaj pliigon de tiu povo eĉ per la plej kondamnindaj faroj. Oni kalkulas ke dum la jara periodo antaŭ la morto de Robespiero estis mortkondamnitaj ne malpli ol 42.000 personoj: el la ekstrema maldekstraro, moderaj revoluciuloj, kontraŭrevoluciuloj, monarkiistoj, aristokratoj klerikoj, federaciistoj, kapitalistoj, spekulaciistoj, ribeluloj, perfiduloj, ĉiutipaj adversuloj... Laŭ la prietika teorio kiun li elaboris por pravigi la politikon pri Teroro de la Revolucio kaj la sian propran, decas perforti kontraŭ la malamikoj, kaj ĉiuj menciitaj hom-grupoj estis iam malamikoj de la Revolucio, laŭ lia vidpunkto, kaj do, personaj malamikoj liaj. Akirinte la absolutan povon en marto de 1794, Robespiero daŭre parolademis pri politika virto, sed evidentis ke tiam li agadis nur laŭ siaj propraj politikaj interesoj. Atestas pri tio la kontraŭdiro ke li samtempe ekstermadis la ĉefajn liderojn de la senkulotuloj, pro tio ke ili postuladis la daŭrigon de la Teroro, kaj la indulgemajn, kiel Danton kaj ĉi ties sekvantoj, kiuj deziris meti finon al la Teroro. Ja, en la nokto de la 9-a al la 10-a de ĝerminalo (29-a al la 30-a de marto), Danton, Desmoulins kaj Lacroix estis arestitaj, je granda surprizo de la Konvencio. Al ili oni aldonis alitipajn personojn kun la celo ŝajnigi la aferon kiel sufokado de komploto. Inter ili estis la abato d'Espagnac, konata spekulaciisto, la monakiisto Dillon, la jakobena Westermann pro ĉi ties fiasko batalante kontraŭ la vendeanoj, la prokuratoro de la Pariza Komunumo,

Chaumette, kaj eĉ iu membro de la Komitato pri Publika Savo, Hérault de Séchelles. Ili estis gilotinitaj la 16-an de ĝerminalo (5-an de aprilo).

Kvankam Danton, male ol Robespiero, ne estis tute senkulpa en kio rilatas al koruptiĝo, la lasta operacio de Robespiero aspektis kiel vera puĉo kontraŭ la revoluciaj institucioj mem kiujn oni pretendis esti defendante. De tiam ĉiuj konvencianoj sin sentis subminace de la senbara povo de freneza tirano. Robespiero restis tiam kiel la sola lidero kaj referaĵo de la Revolucio, kaj de tiam li kondukis aŭtokrate. Li, detruinte la plejaltan stabon de la *cordeliers* (franciskanoj) metis finon al la premo de la popolamasoj sur la Konvencio. Tiusence oni estus povinte reveni al la burĝa kurso de la Revolucio, interrompita en aŭgusto de 1792, sed ankaŭ tio ne estis la plano de Robespiero. Per la gilotinado de Danton kaj ĉi ties indulgemuloj, la jakobena lidero montris ke li daŭre volis aplikadi la Teroron por atingi siajn politikajn celojn, kiuj neniu ĝuste scias en kio konsistis. Per liaj diskursoj, li daŭre teoriadis pri *la amo al la patrujo kaj ĉi ties leĝoj kaj la prefero de la publika intereso sur ĉiuj partikularaj interesoj*. Sed surbaze de tiel ambigua programo, oni povus kondamni al la gilotino ĉiun ajn civitanon, ankaŭ lin mem, kio fine fakte okazis. Tial ke tiam daŭris ankoraŭ la milito kontraŭ la eksteraj malamikoj, la registaro estis milita, t. e. la situacio pravigis ĉiujn eksterordinarajn disponojn. La Komitato pri Publika Savo, kiu tiam estis malpliigita al 11 membroj, estis la esenca organo. Ĝi kontroladis la 12 ekzekutivajn komisionojn kiuj anstataŭis la ministrojn kaj rekte faradis leĝojn. Daŭre ekzistis la Pariza Komunumo sed tiam ĝia nura rolo estis la dissendo de la ordonoj de la Komitato pri Publika Savo. La popolaj societoj malaperis en florealo kaj prerialo (majo-junio de 1794). En la departementoj estis naciaj agentoj kun rekta korespondado kun la Komitato pri Publika Savo firme kontrolata de Robespiero. Ĉi tiu konsiderinda plifortigo de la centra povo far la revoluciaj institucioj estis ambaustranĉa armilo: se unuflanke ĝi trankviligis la burĝaron nuligante la minacon de la senkulotuloj, samtempe ĝi maltrankviligis en la Konvencio la deputitojn de la modera tendenco kiuj, post la du lastaj elpurigoj, restis klara plimulto, kvankam ankoraŭ silenta dum la printempo.

Kiu ajn estus la politika idealo de Robespiero, ĝi, ja, tute ne rilatis al sociaj konkeraĵoj favore al la plej malaltaj klasoj de la socio. Al la ekzekutado de Hébert kaj la sekva detruado de kelkaj organoj de la popola povo oni aldonis ian flekseblecon de la leĝoj de la Teroro ligitaj al la ekonomio pri la fiksado de maksimumaj prezoj. La nova jakobena Komunumo finplenumis la ekonomian ŝanĝon altrudante fiksadon de maksimuma salajro kiun ne eblis apliki dum la Komunumo estis estrata de la grupo de Hébert. La aplikado de salajraj skaloj signifis malpliigon de pli ol 50 procento el la enspezoj de la pariza popolo. Sed la diferencoj inter la senkulotuloj kaj la jakobena gvidantaro ne rilatis nur al tujaj ekonomiaj interesoj. Krom la drasta falo de la enspezoj de la laborist-

aro, kontribuis malbonigi la rilaton inter ambaŭ fortoj la kreskiĝanta paralizigo de la aktivado de la urb-sekciaj organizaĵoj kaj la perdo je fakta politika povo de la popolamasoj. Al tio oni devas aldoni ankaŭ la opozicion kiun oni estigis, kaj ne nur inter la senkulotuloj, pro la alpreno de la kulto al la Plejsupera Ento kiel alternativo al la kampanjo je senkristanigo. Plej danĝera por la jakobena povo estis la sentoj kaj la timoj kiujn la politiko de Robespiero estis vekante en la sino mem de la Konvencio. Tie ekkonkretiĝis opozicio al la disponoj de la Komitato pri Publika Savo. La leĝo de la 22-a de prediero (la 10-a de junio), iniciatita de la grupo de Robespiero, modifis la juĝan proceduron kiun devus respekti la Revolucian Tribunalon. Tiu nova leĝo ne nur senigis al la akuzitoj, en kelkaj cirkonstancoj, je la rajto al la defendo, sed ankaŭ nuligis la parlamentan imunecon. La tiam “Granda Teroro”, kiu kondamnis al mort-puno 1.300 el la 2.600 personoj kiuj estis entute ekzekutitaj per la gilotino, estis rekta rezulto de tiu leĝo. Iamaniere manifestiĝis la kontraŭdiroj de la Komitato de Publika Savo estrata de Robespiero kun aliaj organoj de la Konvencio kiel la Komitato pri Ĝenerala Sekureco. Ĉi lasta kontribuis al la senkreditigo de la alia lasante senenterige la viktimojn de la akcelita ekzekutado per la gilotino, favorante la ĝeneralan naŭziĝon pri la ekzekutoj. Sed la problemoj por la robespierianoj aperis ankaŭ ene de la Komitato pri Publika Savo mem. La jakobenoj Robespiero, Saint-Just kaj Couthon devis alfrontiĝi, unuflanke, al tiuj kiuj deziris ne tiel insisti pri ideologiaj konceptoj kaj agadi pli pragmatike, kaj aliflanke, al la “teroristoj” enirintaj en la Komitaton post la eventoj de septembro de la antaŭa jaro. Paradoxse, la venko de la armeo de la Respubliko en Fleurs, la 8-a de mesidoro (26-a de junio), kontribuis al la izoligo de la jakobenoj. Tiu milita venko liberigis la francan teritorion el la fremda interveno kaj denove metis la Respublikon en situacio de ofensivo. La malpliigo de la ekstera minaco kaj la neebleco de nova popola insurekcio igis ke la jakobena regado rezultis netolerebla por la burĝaro mem kiu tiom da profito eltiris el ties kelkmonata regado. La burĝ-klaso estis akceptinta, siamomente, la jakobenan Teroron kaj la kreskiĝantan povon de la “pasivaj” civitanoj kiel elteneblan suferiĝon antaŭ la ebleco ke la invado de la fremdaj armeoj alkondukus al la restarigo de la absolutismo.

Dum la monato julio pligrandiĝadis la opono kontraŭ la jakobenoj gvidata ĉefe de la konvencia Komitato pri Sekureco. Robespiero ne sciis kiel alfronti tiun situacion nekompreneblan por li, kaj de tiam li decidis ne ĉeesti la kunsidojn de la Komitato pri Publika Savo, kio alportis plian konfuzon al la konvenciaj sektoroj kiuj sentis timon kaj malkonfidon pri li. La 4-an kaj 5-an de termidoro oni intencis solvi la rompiĝon inter ambaŭ komitatoj sed Robespiero rifuzis partopreni en tiu repaciĝo kaj decidis transigi la problemon al plensesio de la Konvencio. La 18-an de termidoro (26-a de julio), li prononcis sian lastan diskurson antaŭ la Asembleo. Li denunciis ian konspiron kontraŭ la libereco far iu krima sektoro ekzist-

anta en la sino de la Konvencio, en la Komitato pri Sekureco kaj en la Komitato pri Publika Savo mem. Laŭ li, por senartikigi tiun *ligon da friponuloj kiuj bataladis kontraŭ la publika virto* oni devus puni la perfidulojn, renovigi la komitatojn, subordigi ilin al la plejsupera aŭtoritato de la Konvencio. Evidentas ke li celis apogi sian personan aŭtoritaton sur kolektivaj pli ampleksaj ol la *petits comités* kies intrigajn aranĝojn li ne kapablis kontroli, kaj preferis apelacii al la konvenciaj plensesioj, la popolo... pli sensivaj al lia retoriko. Sed farante tiel ambiguan minacon li grave eraris; ĉiuj konvencianoj sin sentis minacitaj. Je la fino de lia diskurso, li diris: *Ankoraŭ ne estis alveninta la tempo kiam la bonaj homoj povu senpune servi la patrujon: la defendantoj de la patrujo estos proskribitaj dum regus la hordo da friponoj.* Rezultas neeble kompreni kion signifas la “politika virto” de la “bonaj homoj” por homo kiel li, kiu sufokis la revolucian procezon de akirado de sociaj rajtoj kaj perfidis la praktikadon de la demokratiaj rajtoj konkeritaj de la Revolucio.

Ĉiukaze alvenis la horo de la finiĝo de la “Teroro de la Virto”, per la falo de la homo kiu elpensis tian strangan koncepton. Ĉiuj konvencianoj, escepte la jakobenoj, decidis kunagadi por sin liberigi de tiel nekomprenebla kaj nekontrolebla homo. Sekvintmatene la Konvencio ne permesis paroli al li kaj al Saint-Just. Kiam ili eniris en la salonon, la deputitoj kriadis al ili: *For la tirano!* Unuanime la konvencianoj aprobis akuz-dekreton kontraŭ Robespiero, Saint-Just kaj pluraj aliaj gravaj jakobenoj meze de granda tumulto. Oni arestis la akuzitojn sed en la urbo la jakobenoj havis ioman kontrolon sur kelkaj povorganoj kiel la Nacia Gvardio, estrata de la jakobeno Hanriot, kaj la Pariza Komunumo. La reago de tiuj sektoroj ebligis liberigi la arestitojn, kiuj poste, pretaj rezisti, kunvenis kun siaj partianoj en la *Hôtel de la Ville* (la pariza Urbodomo), antaŭ la Placo de la Grève kaj la sidejo de Komunumo. La urbaj sekcioj sur kiuj la jakobenoj havis ioman influon sendis al tiu loko 3.000 armitajn homojn kun kelkaj kanoj, sed mankis al ili efika gvido kaj evidentiĝis ke la apogo al la jakobenoj ne estis, en la popolaj sektoroj, tiel amasa kiel tiu kiu ariĝis ĉirkaŭ la rabiuloj kaj la franciskanoj en antaŭaj mobilizoj. Dum la nokto la sekciaj fortoj ariĝitaj apud la Urbodomo iom-postiom dispeliĝis kaj kiam je la 2-a horo matene de la 10-a de termidoro (28 de julio) eniris en la Placon iu kolono de armitaj fortoj lojalaj al la Konvencio estis nenia rezisto. Iuj el la jakobenaj lideroj sin mortigis kiam oni intencis aresti ilin. Robespiero havis mazelan vundon, oni ne scias ĉu rezulte de la pafado de la atakantoj aŭ farita de li mem intencante sin mortigi. Tiutage mem, Robespiero, Saint-Just kaj aliaj 19 gravaj jakobenoj estis gilotinitaj. Sekvinttage oni faris la samon al iu grupo da 71 gvidantoj de la Pariza Komunumo ligitaj al Robespiero. Temis pri la plej multenombra grupo gilotinita dum unu sola tago ekde la komenciĝo de la revolucio. Tiele kulminis la plej freneza etapo de la Revolucio dum kiu ekstermadis, unuj al la aliaj, la ĉefaj revoluciaj fortoj.



Malfluso de la revolucia procezo

Temante pri la politika situacio en Francio post julio de la jaro 1794, ĉu oni povas daŭre paroli pri “revolucio”? Ja, de tiam komenciĝis retroiro rilate al la sociaj rajtoj akiritaj de la popolo en 1793 kaj registritaj en la tiujara Konstitucio. Sed neniel estis restarigo de la situacio ekzistinta ĝis la jaro 1789. La nobelaro ne reakiris ĝian antaŭan povon kaj posedaĵojn. Venkis en tiu procezo la burĝklaso. La jakobena Konvencio de la vintro kaj la printempo de 1794 tre damaĝis la popolan povon per la senkapigo de la lideroj de la plej radikalaj organizaĵoj de la movado de la senkulotuloj. Sed kvankam la supervivantaj *cordeliers*, aŭ hebertistoj kunlaboris kun la ceteraj konspirantoj en la falo de Robespiero, la malapero de la jakobena povo efikis malfavore por ili kaj la ceteraj popolaj organizaĵoj samkiel por la interesoj de la malaltaj klasoj de la socio. Tio estas, la jakobena frakcio en la Konvencio kaj la ŝtata povo ĝenerale ne estis anstataŭita de alia pli radikala. Kvankam ne tute ĉesis tiam, la granda amasmovado kiu impulsis la revolucion ĝis tiam eniris en veran retroiron. Tamen decas ke ni pristudu ankaŭ ĉi tiun procezon de malfluso de la revolucio ĉar ankaŭ, kaj ĉefe, el tiu tipaj fiaskoj oni povas eltiri instruon, kaj jen ĉi tiu estas la vera celo de ĉiu prihistoria studo. Krome, ni vidos en sekva ĉapitro –temante pri la Konspiro de la Egaluloj– ke ankaŭ la tiamaj popolaj amasoj, ĉefaj protagonistoj de la revolucio, lernis lecionon el la soroj kaj soboj de la revolucia procezo.

Nu, ĝenerale la historiistoj konsideras la falon de la jakobenoj kiel la ĉarnira punkto de la Franca Revolucio. Ekde julio de 1794, la procezo regresas kaj reiras al la vojo de la revolucio de kaj por la burĝaro laŭ la skemo profilita inter 1789 kaj 1791. Unuflanke, oni reprenis la politikon de repaciĝo: oni liberigis la politikajn arestitojn de la 2-a jaro de la Respubliko kaj revenis al la Asembleo 75 iamaj ĝirondistoj. Aliflanke, spite al la laŭleĝa abolo de la Teroro, oni entreprenis tion kio estis konata kiel la

“Blanka Teroro”. Neleĝa Teroro realigata de la profitantoj de la nova “Respubliko de proprietoj”. La vera klasa revenĝo estis entreprenita ĉefe de alt- kaj mez-burĝaro. En Parizo efektivigis la subpremadon junularaj bandoj de mezklasuloj kiuj nomis sin mem “ora junularo”. Ili enrompadis en la popolajn kvartalojn kaj batadis laboristojn kaj ĉiujn ajn kiuj estis ligitaj al la senkulotuloj aŭ la jakobenoj. Per la samaj metodoj ili alprenis la povon de la urbaj sekcioj, ekde kie ili lanĉis veran ĉasadon de la revoluciuloj. La popolo nomis tiujn elegante vestitajn kaj parfumitajn junulojn *muscardins*, laŭlitere “mosko-odoraj”, kun la signifo de “dandaĉoj”. La estro de tiuj ne-leĝaj bandoj estis, ĝuste, iu iama “teroristo” (Louis-Marie Stanislas Fréron). Dum la jakobenismo li tre insistis pliprofundigi en la Teroron kaj poste li batalis apud siaj antikvaj malamikoj. Ekster Parizo la subpremo estis multe pli feroĉa, ĉefe en la departementoj kiujn la Konvencio kaj ĉi ties armeoj estis rekonkerinte per sango kaj fajro. Oni amase murdis prizonulojn en la malliberejoj aŭ arestitojn survoje al la prizonoj, kaj oni realigis ekzekutojn per subakvigado en riveroj, kaj ĉiujtipaj aliaj metodoj.

Estis renversigitaj ankaŭ la leĝaj dispozicioj kiuj fikslimis la prezojn de la necesaj nutraĵoj kaj pliampleksigis la politikan partoprenon de la popolo. En la ekonomia tereno, la reveno al la principoj de la liberalismo okazigis veran ĥaoson kiu draste damaĝis la vivkondiĉojn de plejparto el la loĝantaro. Tiuj kiuj devis alfronti la senprecedencan inflacion per fiksitaj enspezoj, neeviteble falis en mizeron. La prezoj plialtiĝadis senĉese. La nutraj-porcioj kiuj ekde la 2-a jaro de la Respubliko estis garantiitaj por la plej malriĉaj civitanoj, estis kelkfoje malgrandigataj laŭ kvanto kiu ne garantiis minimuman nutradon. Paralele, la salajroj draste falis. Samtempe akceliĝis la pliriĉiĝo de la “novaj riĉuloj”. Tiuj kiuj estis aĉetintaj terojn kaj bienojn de la Eklezio, de la nacio aŭ de la elmigrintoj kaj devis pagadi po-kvoto la valo-

ron de la aĉetoj, la senvaloriĝo de la revolucia papermono signifis likvidi siajn ŝuldojn per ridinda monsumo. Simila retroiro okazis en la politika tereno. Eĉ antaŭ tiam, kiam la politika dekstren-turno ne estis respegulita en iu nova Konstitucio, la demokratiaj rajtoj malaperis el la ĉiutaga vivo. La malkaŝa subpremado, kvankam ne oficiale akceptita de la registaro, estis sekvita de la fermo de la kluboj. En novembro, la jakobena klubo estis devige fermita. Iomete poste okazis la samo al la ĵus formita klubo de la nov-hebertistoj, kiuj povis konstati ke la komploto kiun ili estis apogintaj sin turnis kontraŭ ili. Al ĉi tiu klubo apartenis Jean-François Varlet, iama rabiulo (*enragé*), kaj Grachus Babeuf. La Pariza Komunumo estis abolita kaj oni anstataŭigis la 48 sekciajn asembleojn per nur 12 dikstriktaj komitatoj. Ties socia komponado ŝanĝiĝis, kaj tiuj kiuj estis antaŭe delokitaj per la radikala elturniĝo denove okupis postenojn. Oni nuligis la dispozicion pagi al la ĉeestantoj de la kunsidoj kaj ĉi-ties frekvencoj estis malgrandigitaj de du ĉiusemajne al unu ĉiu deka tago. La termidoranoj krome ekagadis kontraŭ la simboloj de la jakobena respubliko: la postrestaĵoj de Marat estis demetitaj el la Panteono kaj oni detruis la bustojn de la “amiko de la popolo”.

Kiel reago kontraŭ la katastrofa situacio en kiun oni estis droniginta la francan popolon, la senkulotuloj realigis tiujn kiuj estis la lastaj grandaj insurekcioj de la revolucia periodo. La 12-a de ĝerminalo de la 3-a jaro de la Respubliko (1-a de aprilo de 1795), viroj kaj virinoj de la plej malriĉaj distriktoj de Parizo alsaltis pano-vendejojn kaj marŝadis direkte al la konvenciejo. Kvankam ili tre estis malsataj, iliaj postuloj temis ne nur pri pano. Ili petadis ankaŭ la restarigon de la Konstitucio de 1793 kaj la liberigon de la enkarcerigitaj patriotoj. Sed la reago de la reĝimo estis pli rapida. Naciaj gvardioj kaj *muscardins* estis koncentritaj en la konvenciejo kaj, per ilia minacanta ĉeesto devigis la senkulotulojn disiĝi. Tuj oni deklaris Parizon en sieĝo-stato kaj oni pliintensigis la raziojn en la popolajn kvartalojn por senarmigi kaj aresti ties enloĝantojn. Spite al ĉio-ĉi, la 20-an de majo de tiu sama jaro, la senkulotuloj efektivigis novan insurekcion: tiu de la 1-a de prerialo de la 3-a jaro. Kunvokita pere de iu manifesto titolita *Insurekcio de la Popolo por atingi Panon kaj rekonkeri siajn Rajtojn*, la ribelo montris tiun kombinon de tujaj priekonomiaj kaj politikaj sloganoj kiuj karakterizis la insurekciojn ekde julio de 1789. La slogano *Pano kaj la Konstitucio de 1793!* resumis tiun duoblan aspekton. Ĉi tiu insurekcio estis pli forta ol tiu de ĝerminalo. Batalionoj de la distriktoj kaj de la sekcioj de la urba periferio alsaltis la Asembleejon kaj postulis ke oni aŭskultu iliajn petojn. Tamen, la manko je decidemo pri kion oni farus poste, permesis al la termidoranoj reagi kaj alvenigi siajn proprajn batalionojn kaj elpeli la ribelintojn el la salono. Dum kelkaj horoj, la senkulotuloj sukcesis teni

la kontrolon de la legenda kvartalo *Saint-Antoine*. Sed sen gvidantaj lideroj kaj sen iu programo kiu kontemplus ĉiujn problemojn de la momento, fine ili akceptis la “paŭzon” oferitan de la konvencianoj kaj retiriĝis hejmen. Dum la nokto, 20-mil homoj senditaj de la Konvencio invadis la kvartalon. La subpremado kiu sekvis al ĉi tiu lasta batal-tago de la senkulotuloj estis la definitiva bato por la popola kaj radikala movado kiu ĝis tiam estis la ĉefrolanto de la Franca Revolucio. Iu militista komitato procesis 149 personojn; 36 el ili estis mort-kondamnitaj, aliaj estis ekzilitaj aŭ enprizonigitaj por multaj jaroj. La 14 deputitoj de la «Montaro» kiuj estis apogintaj la petojn de la insurekciantoj estis arestitaj kaj 6 el ili ekzekutitaj. Per la aresto de 1200 personoj kaj la senarmigo de kromaj 1700, la senkulotuloj ĉesis ekzisti liel politika kaj militista forto. Per iu dekreto de la 24-a de prerialo (12-a de junio) oni proskribis la vorton “revoluciulo” kaj la 5-an de termidoro (23-a de junio), la tagon kiam oni prezentis la projekton de nova Konstitucio, oni decidis la detruadon de la sidejo de la jakobenoj. La mosko-odoruloj pludaŭrigis la revenĝan agresadon kontraŭ la jakobenoj kaj senkulotuloj, sed baldaŭ evidentiĝis ke ili estis danĝero ankaŭ por la Asembleo ĉar ilia politika tendenco estis ne liberala sed monarkisma. Ili komencis persekutadi la aktorinojn kiuj estis partoprenintaj en la Festo de la Racio en 1793. En kelkaj departementoj, subgvide de la reakcia klerikaro oni persekutadis ankaŭ la burĝulojn kiuj estis aĉetintaj la konfiskitajn bienojn de la Eklezio kaj la nobelaro.

La 8-an de junio estis mortinta en la pariza fortreso de la templ-kavaliroj la juna filo de la reĝo Ludoviko la 16-a. Sekve, en Verono, la grafo de Provenco, frato de tiu reĝo, sin proklamis reĝo de Francio kun la nomo Ludoviko la 18-a, respektante la titolon je Ludoviko la 17-a por la ĵus forpasinta kaj neniam reĝinta princo. Li pretendis restarigi la absolutisman monarkion. Laŭ lia deklaro, *oni devus restarigi la regad-tipon kiu estis dum jarcentoj la gloro de Francio kaj la delico de la francoj*. Sed en la militaj frontoj la situacio daŭre estis malfavora por la monarkistoj. La anglaj trupoj konsistantaj el pli ol 4.000 homoj komanditaj de la admiralo Warren estis blokigitaj de la respublikana generalo Lazare Hoche, en julio de 1795, en Carnac. Belgio kaj Nederlando estis rekonkeritaj de Francio far la norda armeo. La trupoj de la generaloj Lazare Hoche, François Séverin Marceau kaj Jean-Étienne Championnet alvenis ĝis la linio de la Rejno-rivero. Unu nederlanda floto de 14 ŝipoj kaj 850 kanonoj estis kaptita kun ĝia admiralo kaj la tuta ŝipanaro en Tesel-insulo far eskadrono de husaroj komandita de la leŭtenant-kolonelo Louis Joseph Lahure. Ankaŭ en la printempo de 1795 la hispanaj trupoj estis forpelitaj el la franca teritorio far la armeo de la Respubliko kiuj krome invadis poste Hispanion tra Katalunio kaj Eŭskio. Post tio, Hispanio subskribis pacan interakordon kun la fran-

ca Respubliko. Same faris aliaj landoj de la kontraŭ-revolucia koalicio. Aŭstrio kaj Prusio restis for de tiu procezo, sed tamen ili ne povis pluteni la ofensivon kontraŭ la Franca Respubliko.

En tiu 3-a jaro de la Respubliko oni ellaboris novan Konstitucion. Ĝi estis aprobita la 22-an de aŭgusto de 1795. Ĝia celo estis defendi la proprieton, la posedaĵon de la riĉuloj. Oni nuligis, do, la jakobenan tekston de 1793. La rajtoj de la homoj kaj la civitanoj, laŭ la nova konstitucia teksto, estis, same kiel en 1791: libereco, egaleco, sekureco kaj proprieteco. Sed evidentis ke la posed-rajto rangis pli ol la egal-eco ĉar tiu konstitucio establis laŭ-censan voĉdonadon, tio estas, la rajto partopreni en la politika voĉdonado dependis de posedado de difinita kvanto da bienoj aŭ rento. Laŭ tiu sistemo nur ok procento da personoj de la franca loĝantaro rajtis voĉdoni por elekti la deputitojn de la Asembleo. La Asembleo, male ol la antaŭaj, estis duĉambra, laŭ la angla modelo: iu konsilantaro konsistanta el 500 membroj, aĝante almenaŭ 30 jarojn, rajtis iniciati la leĝojn, kaj iu Senato de 250 deputitoj pli aĝaj ol 40 jaroj, kiuj rajtis voĉdonadi. La regantaro estis iu Direktoraro konsistanta el kvin membroj, elektitaj, far la senatanoj, por kvin jaroj, el iu listo proponita de Kvincenta Konsilantaro, renovigante unu el la kvin ĉiujare. La termidoranoj de la Konvencio prave timis ke la nova balotado alportu amason da moderaj deputitoj al la Asembleo, do ili elpensis manovron kiu provokis kroman krizon. La Konvencio decidis ke du trionoj el la nov-elektotoj devus aparteni al ĝia tiama membraro. Ĉi tiu dispozicio estis aprobita far iu tutlanda referendumo en kiu, tamen, estis eksterordinare malgranda partopreno.

Tio ruinigis la esperon de la monarkistoj pri la ŝanĝoj kiujn la Konstitucio povus alporti por ilia celo. Ja, post la fiasko de la fremdaj fortoj de la koalicio, la monarkistoj metis sian esperon sur la pribalota procezo por renversi la ŝanĝojn faritajn post 1789. Do, kiam ili vidis fermita la vojon al la politika povo pro maĥinacio de la tiama plimulto de la Asembleo, ili kromanfoje alkuris, kiel sola elir-vojo, al la perforta agado. Kaj kromanfoje estis Parizo la scenejo de la decidaj okazaĵoj. La *muscardins*, kiuj tiam estis nomitaj “nigraj korvoj” mobiliziĝis por efektiviĝi perfortan premon sur la Konvencio. Sed dume tiu Asembleo devis alfronti aliflankan kaj samtempan oponon de la respublikanaj kaj popolaj fortoj malcontentaj pro la derivado de la politika kaj socia situacio. Kaptita inter ambaŭ fajroj, la Konvencio abĵuris tiel de la antikvaj teroristoj kiel de la novaj monarkistoj. En septembro okazis kelkaj tumultoj en Parizo kaj aliaj kontraŭrevoluciaj incidentoj en Ĉartro kaj Dreux. La 3-an de oktobro okazis ribelo de sep parizaj sekcioj kontrolitaj de la monarkistaj “nigraj korvoj”. Por alfronti tiun situacion la Konvencio haste formis tri batalionojn da senkulotuloj elirintaj el la suburboj kaj la prizonoj, kiujn oni nomis “patriotoj

de la jaro 1789”, subgvide de la generalo Jean-François Berruyer. Sed ne sufiĉis 1.500 homoj por alfronti 25.000 kontraŭrevoluciajn aktivulojn. Restis nur la armeo. Iu eksterordinara komitato, formita kun Paul Barras kaj Philippe-Antoine Merlin de Douai, metis sian esperon sur la 4.000 homoj de la ĉef-generalo de la interna armeo, Jacques de Menou, sed ĉi tiu emis intertrakti kaj konformiĝi kun la monarkistoj. Barras sin direktis, do, al ĉiuj generaloj kiuj tiam troviĝis en Parizo: Guillaume Marie-Anne Brune, Jean-François Carteaux, Pierre Antoine Dupont kaj Napoléon Bonaparte. Ĉi lasta, pere de la kanonoj de lia subulo Achille Murat, la 13-an de vendemiero (5-a de oktobro de 1795) sufokis la ribelon. La monarkistoj estis kanon-bombarditaj ĝis la ŝtuparo de la preĝejo de Sankta Roĥo kie ili serĉis rifuĝejon.

La popola movado jam estis frakasita en perialo, la monarkista movado ĵus estis detruita en vendemiero: en ambaŭ kazoj, la Konvencio kaj la Respubliko estis savitaj de la armeo. La generalo *Vendemiero*, kiel tiam estis konata Bonaparte, estis, sendube, la ĉefa beneficulo de la operacio... En tiaj cirkonstancoj, dubindas ĉu la Konvencio transdonas al la Direktoraro ian vere firman situacion, ĉar, se la novaj institucioj povas fakte funkcii, la ekonomia situacio daŭre estas katastrofa. La termidoranoj havis en la Revolucio ian vere nedezirindan kaj malbrilan rolon: transiran taskon. Inter du nerepacigeblaj kaj minacantaj opozicioj, kiuj respegulis la interklasajn kontraŭdirojn de la lando, la popola radikalismo kiu postulis pliprofundigi en la socialisman enhavon de la Revolucio kaj la monarkistoj kiuj emis reveni al la feŭdismo, la alvoko al la armeo, konstituis fortan solvon por malforta reĝimo, enkondukis ian novan danĝeron. Tamen oni devas agnoski kelkajn meritojn de tiu reĝimo: ĝi sukcesis plifirmigi la naturajn limojn de la franca teritorio. En la socia tereno oni akcelis la vendadon de la nacia bienoj, po malgrandaj parceloj akireblaj de la kamparanoj, pageblaj per *assignats*, la elvalora paper-mono de la Revolucio. La aĉetantoj estis ĉefe kamparanoj, ĉu etproprietuloj aŭ burĝuloj de la urboj; la popolanoj de la vilaĝoj kaj la kampar-laboristoj restis for de tiu merkato. Sendube la plej rimarkinda atingo de la termidoranoj estis en la eduk-sistemo, kvankam la baza instruado ne restis senpaga kaj deviga kiel volis la deputitoj de la «Montaro». La duagrada instruado estis asignita al centraj lernejoj altkvalitaj, en kiuj, krom la klasikajn lingvojn, oni komencis instrui ankaŭ sciencojn kaj vivantajn lingvojn. La supera instruado estis asignita al altlernejoj kiel la Kolegio de Francio, la Muzeo de la Artoj, la Politeknika Lernejo kaj la Normala Supera Lernejo, samkiel specialaj lernejoj kiel la Konservatorio de Artoj kaj Oficoj, kaj la Lernejoj pri Sano de Parizo, Strasburgo kaj Montpeliero. La politika etapo de la Konvencio kaj ĉi ties anstataŭo far la novaj institucioj okazis la 26-an de oktobro de 1795.

Direktorado kaj la Konspiro de la Egaluloj



La sinsekvaj malvenkoj de la popolo evidentigis la immanentajn limojn de la burĝaro kaj de la programo, eĉ se radikala, de la burĝa revolucio. Krom la pliampleksigo de la politikaj rajtoj, de la publika instruado, de la “kariero malfermita al la talento” en la publika administracio, la bazo de tiu tuta moderna ŝtato, eĉ sub ties respublika formo, daŭre estis la privata proprieto. La komenciĝanta disvolviĝo de la kapitalismo povus igi verŝajna por la plej radikalaj jakobenoj kiel Robespiero kaj por la senkulotuloj la horizonton de iu respubliko kie reĝus la egaleco kaj la virto bazita sur socio de etroprietuloj. En tia kadro, la proprietraĵo de la plej demokratia kaj popola etapo estis interpretita kiel la rajto disponi je la frukto de la propra laboro. Sed la interna dinamiko de socio de privataj produktistoj nepre kondukas al etendiĝo de kapitalista socio, kie la privata proprieto ne baziĝas sur la propra laboro sed sur la ekspluatado de salajrita laboro. Estas pro tio ke kvankam ili kapablis fundamenti la neceson de revolucia kaj terora diktaturo, la jakobenoj ne kaptis la nerezisteblan tendencon de la kapitalismo. Ankaŭ ne la senkulotuloj, kun siaj drastaj postuloj, reprezentis alternativon kapablan superi la naskiĝantan kapitalismon. El la analizado de tiu sperto ŝprucis la programo de la Egaluloj. Malsimile ol la antaŭaj plebaj movadoj, ĉi tiu atakis la fundamenton de la nova socio: la privatan proprieton.

Ni jam vidis ke post malmulte da tempo la radikaluloj kiuj sin oponis, de maldekstre, al la jakobenismo, komencis denunci la reakcian karakteron de la nova regantaro. La sperto vivi en iu “respubliko de riĉuloj”, kun la blanka Teroro kaj la malsato senpune plenregantaj, devigis multajn el la iamaj fervoraj kontraŭ-robepieranoj rekonsideri la sperton de la 2-a jaro de la Respubliko. Unu el la homoj kiuj sintezis tiujn ŝanĝojn estis Grachus Babeuf. Li naskiĝis en Pikardio, kaj ĝis la jaro 1789 li sufiĉe bone vivadis farante burokratan demarŝadon de feŭdecaj interesoj. La Revolucio impulsis lin ŝanĝi sian viv- kaj pens-

manieron, kio pruvas ke neniu naskiĝas estante revoluciulo. Post la operacio de Termidoro, kiun li apogis, la artikoloj kiujn li publikigis en sia ĵurnalo ĉesis dediĉiĝi al la kritikado de la Teroro por centriĝi akre denunci kaj kondamni la termidoranojn. Pro tio, lia ĵurnalo estis fermata kaj oni ordonis aresti lin. Tamen li sukcesis liberiĝi el prizoniĝo kaj plu daŭris publikigante ĵurnalon kiu tiam titoliĝis *Tribunuso de la Popolo*. Kiam, komence de 1795, li estis fine kaptita, komenciĝis por li ia profunda sperto de politika formiĝo kaj difiniĝo. En la prizono de Arras interkonatiĝis kelkaj revoluciuloj kiuj poste dediĉiĝis al la organizado de la t. n. «Konspiro de la Egaluloj». Iliaj ĝistiamaj historioj estis malsamaj, estis tiel eksteroristoj kiel jakobenoj. Inter ĉiuj ili komenciĝis maturiĝi la kritiko al la privata proprieto kun la formulado de la komunismo kiel solvo de la ĉefaj problemoj de la moderna socio. Babeuf kaj liaj kunuloj estis liberigitaj post la fiasko de la ribelo de la monarkistoj kiu estis rapide sufokita per kanon-pafado far Napoleono. Tiam estis la momento de la aprobo de la Konstitucio de la 3-a jaro de la Respubliko kiu establis la Ekzekutivan Povon de la Direktoraro.

Rezulte de la balotado laŭ la nova Konstitucio, kiu okazis senpasje kaj en kiu voĉdonis nur unu miliono da francoj, la triono el la Asembleo kiu estis elektita estis klare monarkisma. La ceteraj du trionoj, laŭ konstitucia dispozicio, estis membroj de la Konvencio. Sed ankaŭ inter ili abundis la partianoj de monarkio. Tiurilate oni devas klarigi ke en la tiama kunteksto la termino “monarkismo” ne nepre signifis partiano de la restarigo de la absolutisma monarkio de la Malnova Reĝimo. Verdire, pli abundis, ene kaj for de la Asembleoj, la homoj kiuj, kiel la ĝirondistoj, deziris reĝan ŝtatestron sed konservante la politikajn atingojn de la Revolucio, t. e. konstitucia monarkio. Ĉi tiu situacio estus ebliginta la kronadon de la pretendanto Ludoviko la 18-a se ĉi tiu estus pli prudenta kaj malpli necedema. Li daŭre insistadis reĝadi laŭ malnova stilo de la absolutismaj monar-

ĥioj. Kaj, ja, la politika situacio de Francio, eĉ post la elturniĝo de Termidoro kaj la aprobo de la nova Konstitucio, ne eltenus tian restarigon. La reĝimo de la Direktoraro, elirinta el la krizo de 1794-1795, estis febla kaj malstabila, kiel atestis la okazintaĵoj de la du sekvintaj jaroj, sed la kolapso de la absolutisma reĝimo estis definitiva, kiel atestis la historio de la du jarcentoj pasintaj de tiam.

En la novaj Asembleoj de 1795 estis 511 antikvaj konvencianoj, inter ili 158 reĝ-mortigintoj, t. e. tiuj kiuj voĉdonis favore al la ekzekutado de Ludoviko la 16-a komence de 1793. Estis ankaŭ pentintaj eksteroristoj, kaj partoprenintoj en la faligo de Robespiero. La Asembleoj elektis la kvin membrojn de la Diktektoraro. Unu el la elektitoj estis Louis-Marie de La Révère-Lepeaux, antikva ĝirondisto kontraŭinto de la Teroro sed ankaŭ de la nobeloj kaj la pastroj; en la Direktoraro estis asignitaj al li la respondecon pri Publika Instruado kaj Manufakturado. Alia direktoro estis Jean-François Reubell, deputito de la «Montaro» en la etapo de la Konvencio; en la Direktoraro li okupiĝis pri Financo kaj Justico. La tria estis Lazare Carnot, kiu estis membro de la Komitato pri Publika Savo dum la Konvencio; li okupiĝis pri Milito. Ankaŭ Louis-François Letourneur estis membro de tiu konvencia Komitato, kaj en la Direktoraro li okupiĝis pri Maraferoj. Kaj fine, Paul Barras, diboĉulo kaj koruptema, tre ligita al la aferoj de la 19-a de termidoro kaj 13-a de vendemiero. Li okupiĝis pri la respondecoj de Polico kaj Internaj Aferoj. De tiu posteno li tre devis okupiĝi pri la agado de la Egaluloj aŭ komunistoj de Babeuf.

Kiel sciante, la kontraŭstaro de tiu grupo al la nova Konstitucio rilatis al ĉi ties konceptado pri la privata proprieto kaj la sociaj rajtoj de la civitanoj. Ni jam notis ke tiu dokumento tre detale difinis la karakteron de la proprieteco, la abolon de la universala voĉdonado, la dependecon de la politikaj rajtoj de la ekonomia situacio de la personoj, la altrudon de la duĉambra Asembleo... al kio oni devas aldoni la nuligon de la rajto pri insurekcio. Estis klara la signifo de la esprimo “respubliko de proprietoj”. Temante pri tiuj konstitucia ŝanĝoj, Babeuf asertis:

Laŭ ĉi tiu Konstitucio, tiuj kiuj ne havas bienajn posedaĵojn kaj tiuj kiuj ne scipovas skribi, tio estas, la plej granda parto el la franca nacio, ne plu ĝuos la rajton voĉdoni en la publikaj asembleoj; nur la riĉuloj kaj la kleruloj konstituos la nacion.

Krome li aldonis:

La revolucio ne finiĝis, ĉar la riĉuloj alpropruigas al si ĉiujn viv-bonaĵojn kaj regadas ekskluzivisme, dum la malriĉaj laboristoj, kiel veraj sklavoj, langvoras en mizero kaj gravas nenio en la ŝtato.

La liberigitaj kaj aliaj kunuloj formis la tiel nomatan “Socio de la Panteono”. La grupo ricevis tiun nomon pro la loko kie ili kunvenadis. La ĵurnalo de Babeuf fariĝis de tiam la presorgano de la organizaĵo. Baldaŭ venis al ili persekutado; en februaro de

1796, la Direktoraro malpermesis la ĵurnalon, fermis la lokon de la kunvenoj kaj ordonis malfondi la societon. Akompanis ĉiujn-ĉi dispoziciojn ia laŭsistema kampanjo de senkreditigo de la panteistoj argumentante ke ili estis submaskaj monarkistoj kiuj pere de eskremismaj sloganoj reale agadis por senkreditigi la Respublikon kaj ebenigi la vojon al absolutisma restarigo. Devigitaj labori kaŝite, en aprilo de 1796, la grupo de Babeuf kreis la Sekretan Komitaton kiu fariĝis fama sub la nomo de «Sekreta Direktoraro». Ĝia celo estis prepari insurekcian agadon kiu kondukus al la konkero de la politika povo. Ĝiaj membroj estis: Babeuf, Robert François Debon, Philippe Buonarroti, Felix Lepeletier kaj Sylvan Maréchal. La Sekreta Direktoraro intensege laboradis cele altiri alligatecon por la kaŭzo de la Egaluloj. Iuj alte taksis la gravecon de la propagando kaj agitado ĉefe konsiderante ke ili estis tre malgranda kolektivo por organizi insurekcian amasmovadon. Preskaŭ ĉiutage ili surgluadis afiŝojn kaj dissendadis flugfoliojn per kiuj ili kritikadis la situacion kaj eksplikadis en kio konsistis la doktrino de la egaleco. Tial ke la subpremado entreprenita de la Direktoraro malebligis la publikajn kunvenojn, ili organizadis kunsidojn de malgrandaj grupoj en la loĝejoj kaj aliaj privataj lokoj. Ĉiuj membroj de la originala kerno havis la taskon agitati ene de diversaj sektoroj, inter ili la armeo kaj la polico. En la Manifesto de la Egaluloj aperas frazoj kiel ĉi-jenaj:

Leĝo-farantoj, regantoj, riĉaj proprietoj, aŭskultu! (...) Ni postulas ekde nun vivi kaj morti egalaj, same kiel ni naskiĝis egalaj. Ni postulas realan egalecon aŭ morton; tion ni volas... En iu vera socio devas ekzisti nek riĉuloj nek malriĉuloj.

La teksto de tiu Manifesto estis verkita de Maréchal. Ĝi klare montras la teoriajn konkludojn kiujn tiuj revoluciuloj de la 18-a jarcento eliris el la Franca Revolucio malpli ol dek jarojn post ĝia komenciĝo. La Manifesto asertis ke la franca popolo estis vivinta dum dek-kvin jarcentoj en sklaveco:

De nememoreblaj tempoj oni hipokrite ripetadis ke la homoj estas egalaj; de nememoreblaj tempoj la plej malnobliga kaj la plej monstra malegaleco senĉese subpremadis la homan specon (...) la egaleco estis nenio alia ol iu bela kaj sterila jura fikcio.

Sed unuafoje, daŭre asertis la Manifesto, multaj komencas nun decide formuli meti finon al tiu stato de la afero. Kaj tiel kiel la popolo estis forbalainta reĝojn kaj la pastrojn, same faros pri la novaj tiranoj de la proprieto kaj la riĉeco. Kontraste al la formulado de la rabiuloj (*enragés*) de 1793, la Manifesto de la Egaluloj ne atribuas la radikon de la problemoj al la troigo de ia laŭleĝa uzado de la privata propraĵo; ankaŭ ne proponas kiel solvo la disdividon de la posedaĵoj inter kiel eble plej alta nombro da individuoj, kiel faris la jakobenoj. ***Ni proponas ion pli subliman kaj pli egalecan: la komunan bonon; la komunecon de havaĵo.*** Enkadrigita en la kanonoj de

la tiuepoka utopismo, la aŭtoro de la Manifesto prezentis la atingon de tia komuna propraĵo kaj de la kolektiva ĝuo de ties fruktoj kiel ia “reveno” al situacio de origina egaleco. Fine, la dokumento faris kortuŝan alvokon al la agado: ***Franca Popolo! Malfermu viajn okulojn kaj vian koron al la plena feliĉo. Agnosku kaj proklamu kun ni la “Respublikon de la Egaluloj”.***

Anstataŭ tiun tekston, la Sekreta Direktoraro aprobis alian pli koncizan dokumenton kies redaktadon oni atribuas al Babeuf. Ĝia enhavo estis en la sama linio kiel la la antaŭa. Ĝi komencis dirante ke la naturo asignis al ĉiu homo saman rajton ĝui ĉiujn bonaĵojn, samkiel altrudis al ĉiu homoj la devigon labori: ***Neniu rajtas eviti la laboron sen fari krimon (...)*** ***Neniu, sen fari krimon, rajtas alproprigi al si ekskluzivmaniere la produktaĵojn de la tero aŭ de la industrio.*** El ĉi tiuj principoj, oni konkludis la celon de la revolucio: detruu la malegalecon kaj establi la komunan feliĉon kaj bonstaton por ĉiuj. Kontraŭante la tezon de la reĝimo de termidoro, la Franca Revolucio ne finiĝis sed havis antaŭ si ian grandan farendan taskon. La diferenco inter la Manifesto kaj la dokumento de la Sekreta Direktoraro temis pri iuj difinoj de la politika konjunkturo. En la dokumento de la Direktoraro oni agnoskis la leĝecon de la Konstitucio de 1793. Male, la povoj elirinta el la Konstitucio de la 3-a jaro (1795) estis deklaritaj eksterleĝaj kaj kontraŭrevoluciaj. Siaflanke, la Manifesto eĉ agnoskinte la valoron de la Konstitucio de 1793 kiel unu paŝo al iu reala egaleco, notis ke ĉi tiu ne sukcesis atingi la komunan feliĉon spite al tio ke ĝin deklaris sia celo. La kialoj de tiu diferenco estas komprenebla: tiam la defendo de la Konstitucio de 1793 permesis unuigi ĉiujn revoluciulojn pretajn batali kontraŭ la Direktoraro samtempe ke ĝi alprenis la politikan celon de la senkulotuloj en ĉi-ties batalo kontraŭ la termidoranoj. Fakte, post peniga diskutado, oni sukcesis kunflui en la programo de la insurekcio kun iu komitato de “montaranoj” pretaj batali kontraŭ la Direktoraro, kvankam kun malpli da konscio kaj kohero rilate al la dispozicioj pri egaleco. El ĉi tiu unuiĝo ŝprucis la Insurekcia Komitato de Publika Savo.

En la unuaj semajnoj de majo de 1796, la Insurekcia Komitato de Publika Savo taksis ke estis la konvena momento por agadi. Oni redaktis la Insurekcian Akton per kiu oni precize difinis la celojn de la movado kaj informis pri tio kion ĉiu revolucia civitano devus fari. Ĉiuj kiuj estus favoraj al la insurekcio devus mobiliziĝi (sen atendi ke faru la samon la najbaraj sekcioj) kaj sin identigi per difinitaj afiŝoj kaj rubandoj. Poste ili devus sin prezenti kun siaj armoj kaj atakiloj en la centraj lokoj de siaj distriktoj kaj meti sin sub la komando de la patriotoj elektitaj de la Insurekcia Komitato. Simile detale oni fiksis la lokojn kiujn oni devus okupi kaj defendi. Oni determinis ankaŭ la provizaĵojn kiujn oni devus disdoni inter la patriotoj. La programo de la Insurekcia Komi-

tato kontemplis ankaŭ la eblecon de mobilizado de la malamikaj fortoj. Tiurilate la antaŭvidita reago estis: ***ĉiu kontraŭstaro estos perforte nuligata.*** La Komitato komandus la insurekcion sed la posta tasko de revolucia plifirmiĝo estus asignita al iu Nacia Asembleo konstituita de la demokratoj de ĉiu departementoj de la lando kaj elektita de la popolo. Inter aliaj taskoj, tiu Asembleo havus la komision plibonigi la Konstitucion de 1793. Oni esperis ke la insurekcio kalkulus kun 17-mil aktivuloj, multaj el ili el la armeo kaj la polico, krom la mobilizado de la senkulotuloj de la ĉefurbo.

Sed antaŭ la efektivigo de tiu programo, la tuta plano estis frakasita. Unu spiono de la termidora Direktoraro estis ene de la Insurekcia Komitato. La 21-an de florealo de la 4-a jaro (la 10-an de majo de 1796), la ĉefluderoj estis arestitaj. Dum la sekvintaj tagoj kaj monatoj, la aktivuloj kiuj ne troviĝis en malliberejo intencis liberigi siajn kunulojn dufoje. La Direktoraro profitis la okazon kaj igis aresti centojn da movadanojn kies identeco estis tiam malkovrita; trideko da ili estis ekzekutitaj kaj la cetero estis ekzilitaj aŭ restis en prizono. La juĝo al la naŭ ĉefaj lideroj de la Konspiro de la Egaluloj estis kelkfoje prokrastita kaj komenciĝis unu jaron post la arestado de la akuzitoj. Ilia konduto estis mirinda. Babeuf prezentis sian defendon dum kvar tagoj. Alprenante la tutan respondecon pri la insurekcio, li subtenis ĉi ties pravigon. Diversmaniere li intencis prui ke la privata proprieteco estas la origino kaj la kaŭzo de ĉiuj malbonaĵoj kaj malfeliĉo sur la Tero. Darthé per ia konciza pledado eksterordinaire honesta rifuzis paroli tial ke li ne agnoskis la legitimecon de la tribunalo kiu juĝadis lin. Kiel kutime okazas en tiutipaj procesoj, la verdikto jam estis decidita antaŭ la komenco de la juĝo. Babeuf kaj Darthé estis kondamnitaj al morto. Kiam oni prononcis la verdikton, ili intencis sin mortigi perponarde sed spit’ al tio ke ili okazigis al si gravajn vundojn, ili estis “savitaj” de la gvardianoj. Dum la nokto antaŭ la ekzekutado Babeuf skribis al sia familio kortuŝan leteron plenan je kuraĝo kaj konvinko:

Ho, amikoj! Kiel korŝiraj estas ĉi tiuj pripensoj ĉi-momente!... Morti pro la patrujo, lasi familion, filojn, amatan edzinon, estus io pli eltenebla se mi ne vidus la definitive perdon de la libereco kaj ĉio apartenanta al la sinceraj respublikanoj en la plej terura proskribo. Ha! Miaj amataj filoj. Kio atendos al vi? Mi ne povas eviti la plej intensan emociion. Vi ne kredu, tamen, ke mi bedaŭras esti memoferinta min por la plej bona kaŭzo; eĉ se ĉiuj miaj klopodoj estis vanaj por ĝin savi. Mi plenumis mian devon.

Gracchus Babeuf estis ekzekutita la 28-an de majo de 1797. Lia familio povis ĉeesti la momenton dank’ al la ekonomia helpo de lia amiko Félix Lepeletier kiu ebligis al ili la vojaĝon.

La tragedio de Babeuf, laŭ esprimo de la Komunista Manifesto, samkiel ĉiuj el la *unuaj provoj de la proletaro rekte pliprofundigi en siaj propraj klasaj intereso*, dum tempo de ĝenerala ekscitiĝo, dum periodo de renverso de la feŭda socio, neeviteble fiaskis pro la subevoluinta stato de la proletaro kaj pro manko de la materialaj kondiĉoj de ĝia liberigo, kiuj ja nur estos la produkto de la burĝa epoko.

Fine de la 18-a jarcento la burĝaro estis la klaso alvokita superregi. La proletaro troviĝis je la komenciĝo de sia procezo je konstituiĝo. Ni memoru ke laŭnombre la kamparanoj daŭre estis plejparto el la franca loĝantaro.

Kiam okazis la ekzekutado de la lideroj de la Konspiro de la Egaluloj jam estis okazinta la balotado por la renovigo de la Asembleoj, en kiu estis plimulto da partianoj de la monarkio. Dum la antaŭaj monatoj la Direktoraro, krom la konspiro de la komunistoj devis alfronti ankaŭ la premojn de la monarkistoj por la restarigo de la trono. Tiu politika solvo havis tiam grandan eblecon efektiviĝi kaj dum la somero kaj la aŭtuno de 1797 pliintensiĝis la aktivado de la partianoj de la reĝo eĉ ene de la pov-aparato mem de la Respubliko. Sed la afero ne konkretiĝis ĉar estis grava kontraŭdiro, ne nur politika sed ankaŭ klasa kontraŭdiro, inter la diversaj sociaj sektoroj pretaj akcepti novan reĝon. Ja, ne eblis interakordigi la postulojn de la aristokrataro kiu deziris reveni al la absolutisma monarkio de la Malnova Reĝimo kaj la burĝaro kiu konsentus nur konstitucian monarkion. Tio ebligis ke pludaŭris, eĉ se nefirme, la reĝimo de la Direktoraro. Sed la sola apogo de ĉi tiu institucio kontraŭ la kreskanta politika forto de la monark-istoj estis la armeo. Fakte, nur dank' al la armeo povis la Direktoraro alfronti la minacon de tiam tuj okazonta monarkisma ribelo en Parizo en septembro de 1797. La plej fama el la tiamaj generaloj estis Bonaparte, kiu troviĝis en Italio batalante kontraŭ la eksteraj malamikoj de la Franca Respubliko. En septembro de 1797 estis elektita la dua Direktoraro. Lazare Hoche estis anstataŭita far Pierre François Charles Augereau, iu generalo. Tio atestas pri la graveco kiun la armestroj estis akirante en la politika vivo de la mortanta Respubliko. La dua Direktoraro iome sukcesis en la ekonomia tereno. Menciindas ke 1798 okazis en Parizo la unua *Nacia Ekspozicio* de francaj produktaĵoj. Sed en la politika tereno la reĝimo fariĝis pli diktatoreca. En la balotado de 1798 oni nuligis arbitre la balotan rezulton de multaj lokoj por malebligi venkon de la nov-jakobenoj.

Krom la internaj problemoj kaj kontraŭdiroj de la franca loĝantaro, persistis ankaŭ la milita interfrontiĝo kun la eksteraj malamikoj de la Respubliko, ĉefe kun Anglio, kiu estis la plej danĝera el ili. En tiu kunteksto pli kaj pli fariĝis grava la politika rolo de la militistoj, inter kiuj elstaris Bonaparte; ĉiu damaĝo de la aŭtoritato de la reĝimo de la Direktoraro nepre tradukiĝis en plialtiĝo de la prestiĝo de tiu generalo. Post lia sukcesa kampanjo en Italio oni

asignis al li la mision konkeri Egiptujon cele uzi tiun teritorion kiel bazon por damaĝi la anglajn interesojn en Hindujo. Interesis al la Direktoraro ankaŭ malproksimigi el Francio tiun generalon kiu pli kaj pli estis fariĝinta danĝera por la Respubliko. La ekspedicio komenciĝis bone. Sen la kono de la angla eskadro Napoleono sukcesis enŝipigi 54.000 soldatojn. La admiralo Nelson pensis ke la celo estis invadi Anglujon kaj tial li blokigis la gibraltaran malkolon. Tio permesis al la franca eskadro libere navigi tra la Mediteraneo kaj konkeri Malto-insulon. Tie ili kaptis 1.200 kanonojn kaj 30.000 fusilojn. Alveninte al Egiptujo la franca armeo venkis la egiptajn trupojn en la fama batalo de la Piramidoj. Sed tiam finiĝis la favora situacio por la francoj; la angloj detruis la eskadron de Bonaparte kaj ĉi ties armeo restis blokigita en Egiptujo, kaj intencinte iradi orienten, ĝi ne povis preterpasi la urbon Jaffa.

Dume en Eŭropo daŭris la milito de la potencoj kontraŭ la franca Respubliko. La francaj trupoj estis venkitaj en kelkaj lokoj kaj denove devis retroiri antaŭ la forta ofensivo de la aliancanoj. Estiĝis situacio simila al tiu de 1793 sed ĉi-foje oni evitis entrepreni dispoziciojn kiuj povus favori la plifortiĝon de la jakobenoj. Fakte tiam estis okazanta en la lando ia mobilizo de la jakobenoj, kies politika pozicio estis plifortiĝinta en la antaŭa balotado, kaj tuj aperis ankaŭ kontraŭ-jakobena reago far la reakciularo. Intencante alfronti ambaŭ internajn opoziciojn, en la somero de la jaro 1799 la Direktoraro estis regante diktatorece. Tiam Bonaparte estis reveninte al Francio kvankam lia armeo restis en Egiptujo. Kun la komplaceco de kelkaj gravaj politikistoj de la teridora reĝimo: Siéyès, Barras, Tallérand, Fouché... Bonaparte entreprenis politikan operacion kiu fakte signifis la komenciĝon de la akiro de persona politika povo kaj la ekfinaĝo de la formala demokratia povo de la institucioj de la Respubliko.

Resume, la Direktoraro, tiama politika instrumento de la burĝaro, estis febla kaj malstabila reĝimo. Sed tio solviĝis per la starigo de la napoleona imperio post la mallonga transira etapo de la Konsulato. La tuta procezo favoris la klasajn interesojn de la burĝaro kaj tial ĝi ĝuis la apogon de tiu soci-klaso. Tiu procezo, kies studo pli apartenas al la historio de la imperio de Napoleono ol al la historio de la Revolucio, estis senhora kulmino ne inda de tiel glora Revolucio. Krome okazis la paradokso ke Napoleono, krom definitiva entombigisto de la Respubliko kaj likvidinto de la politikaj atingoj de la Revolucio, estis ankaŭ la lasta defendanto de la sociaj atingoj de tiu Revolucio, la interesoj de la burĝaro. La tuta etapo de la Konsulato kaj la Imperio estis senĉesa batalado kontraŭ la fremdaj potencoj kaj la internaj malamikoj de la Revolucio kiuj celis restarigi la absolutisman monarkion. Do, iamaniere, la periodo inter la jaroj 1799 kaj 1815, kiu meritas apartan raportadon, povas esti enkalkulita en la historio de la Revolucio.



Protagonistoj de la Revolucio


Esenca protagonisto de ĉiu revolucio estas la popol-amasoj. Ankaŭ la kontraŭ-revolucio estas afero de grandaj hom-kolektivoj. Sed la amasoj povas fari nenion utilan sen la gvido de la lideroj samkiel ĉi tiuj estas tute senutilaj sen la apogo de la amasoj.

Nia raporto pri la Franca Revolucio sufiĉe pritraktis la agadon de la diversaj revoluciaj grupoj: senkulotuloj, jakobenoj, ĝirondistoj, *enragés*, *cordeliers*... Nun ni direktas nian atenton al kelkaj personoj kiuj havis personan distingiĝon dum la revolucia procezo. Kompreneble tiutipaj listoj ĉiam restas ne-kompletaj. Ni diru, tamen, ke ni okupiĝas ĉi tie nur pri tiuj homoj kiuj, iamaniere, kontribuis al la revolucia procezo eĉ se iam, en la eventualaĵoj kaj elturniĝoj de revolucio ene de la Revolucio, havis kontraŭdiran teniĝon.



Gracchus Babeuf (1760-1797)

Li estas konsiderata la unua revolucia socialisto. Antaŭ la Revolucio, lia okupo estis demarŝadi aferojn de la feŭd-sinjoroj. Lia penso evoluis dum la Revolucio, en kiu li plene partoprenis. En la termidora etapo li lideris la t. n. "Konspiro de la Egaluloj". Tiun projekton li maturigis kiam li estis enkarcerite en Arras somere de 1795. Post lia liberigo, en 1796, estis malpermesita la Panteono-Klubo, ĉefa debatloko de liaj ideoj. Lia kaj siaj kunbatalantoj kreis organizon por varbado kaj agitado de revoluciuloj, ankaŭ inter la militistoj. Por denunco, li estis arestita kaj oni juĝis lin. Li estis kondamnita kaj ekzekutita kune kun aliaj sekvantoj.



Jean Sylvain Bailly (1736-1793)

Li estis la unua urbestro de Parizo kaj la unua prezidento de la Nacia Asembleo. Antaŭ la Revolucio li estis membro de la Akademio pri Sciencoj kaj verkis kelkajn librojn pri astronomio kaj historio. En la Ĝeneralaj Statoj en 1789, kiel prezidento de la Asembleo, li gvidis la reziston kontraŭ la politiko de la reĝo kaj estis la iniciatinto de la ĵuro de la korto de la pilk-ludo. Post la kaptado de Bastilo li estis elektita urbestro de Parizo. En tiu rolo, en 1791 li ordonis la masakron de la Marsa Kampo. En novembro de tiu jaro li rezignis je ĉiuj politikaj postenoj kaj retiriĝis al Nanto. En 1793, dum la radikaligo de la Revolucio li estis arestita kaj poste gilotinita en la sama loko de la masakro de la Marsa Kampo.



Jacques Nicolas Billaud-Varenne (1756-1819)


Li estis membro de la Klubo de la Jakobenoj kaj deputito de la Konvencio. Estis lia la ideo de la revolucia kalendaro por anstataŭi la Gregorian. Ekde septembro de 1793 li apartenis al la Komitato pri Publika Savo kaj igis ke la Konvencio aprobu la principojn de la revolucia regantaro. Li estis afina al la senkulotuloj kaj politike proksima al Robespiero en ĉi ties kontraŭfrontiĝo al Hébert kaj Danton. Tamen li troviĝis poste en la konspiro kontraŭ Robespiero. Li estis deportita al Gujano en 1795 far la termidora reĝimo. Poste Napoleono amnestiis lin sed li ne revenis al Francio sed restis en Haitio ĝis sia morto en 1819.




Antoine-Pierre Barnave (1761-1793)
Advokato ekde 1783, li estis elektita deputito de la Tria Stato en la Ĝeneraj Statoj de 1789, kie li distingigis pro sia elokvento. En la Konstitucio-fara Asembleo li poziciigis, de maldekstre, kontraŭ La-Fayette kaj Mirabeau. Li prezidis la Asembleon en oktobro de 1790. Pro malakordo pri diversaj aferoj, li apartigis el la Klubo de la Jakobenoj inter kies fondintoj li estis. Post la arestado de la reĝa familio en Varennes, Barnave estis iu el tiuj kiuj akompanis ĝin revene al Parizo. De tiam li havis sekretan korespondadon kun la reĝino kaj konspiris favore al la monarkio. Kiam oni malkovris tion oni arestis kaj gilotinis lin.



Pierre Riel de Beurnonville (1752-1821)
Unue li estis destinita al eklezia kariero sed li preferis fariĝi militisto. En 1790 li komandis la Nacian Gvardion en sia departemento de **Longchamp**. En 1792 li partoprenis kun la marŝalo Luckner en la kampanjo de la Nordo, kaj kun Dumoriez en la kupto de **Menin** kaj **Courtrai**. En 1797 li estis ĉefkomandanto de la norda armeo. Li estis favora al la puĉo de la 18-a de Brumero de Napoleono. Poste li plenumis influan rolojn en la napoleona imperio. Same lerte li manovris por ĉesi apogi la imperiestron kaj profite instaligi en la reĝimo de la borbona Restaŭrado.




Jacques Pierre Brissot (1754-1793)
Verkisto kaj politikisto gvidanto de la ĝirondistoj. Antaŭ la Revolucio li perĝajnis sian vivon kiel advokato, verkisto kaj ĵurnalisto. Pro unu pamfleto kontraŭ la reĝino li estis enkarcerigita en la Bastilo en 1784. Poste li rolis kiel sekretario de la duko de Orleans kaj vojaĝis al Usono kaj Belgio. En Francio en 1789 li eldonis ĵurnalo kaj pledis por la abolo de la sklaveco. Post la fuĝo de la reĝo li postulis la proklamadon de la Respubliko. Anoj de la Leĝdona Asembleo kaj de la Konvencio, li fine kontraŭfrontis Robespieron kaj estis viktimo de la persekutado kontraŭ la ĝirondistoj. Li estis ekzekutita per la gilotino en oktobro de 1793.




Georges Couthon (1755-1794)
Li iĝis advokato kaj ekde 1791 li laboris en Parizo kiel reprezentanto de la Leĝo-fara Asembleo de la Revolucio. En 1792 li estis membro de la Konvencio, kie li voĉdonis favore al la kondamno de la reĝo kaj poste de la ĝirondistoj. Aliancano de Robespiero kaj Saint-Just en la Komisiono pri Publika Savo, apogis ilin en la kondamno al Hébert kaj Danton kaj la akceptigo de la leĝoj kiuj senkatenigis regadon de la teroro. Tiutempe liaj piedoj paralizigis pro iu malsano kaj li estis ligita al rulseĝo. En julio de 1794 grupo de kontraŭstarantoj arestis kaj senkapigis Couthon-on kun ĉiuj ceteraj partianoj de Robespiero.



Pierre-Gaspard Chaumette (1763-1794)
Li alvenis al Parizo en 1790 kaj iĝis ĵurnalisto. En 1792 li estis deputito de la Pariza Komunumo, li fondis gravan revolucionan movadon kaj iĝis peranto de la popolo, la senkulotuloj, kun Hébert. Li agadis favore al la demokratio kaj postulis kontrolon de la elektitoj. Li pledis por la malapero de la monarkio kaj atakis la nobelaron kaj la pastraron (kaj inverse) kaj defendis la malkristanigon de la socio; li estis unu el la ĉefaj defendantoj de la anstataŭigo de la katolikaj ceremonioj per la **kulto al la Racio**. Dum la Teroro li akiris siajn kritikojn. Subinflue de Robespiero li estis arestita la 23an de marto 1794 kaj ekzekutita la 24an.



Jean Baptiste Carrier (1756-1794)
Li estis edukita en la jezuita lernejo de sia naskiĝurbo **Yvetot**, en Aŭvernjo. Post labori en advokatejo en Parizo, komence de la revolucio li fariĝis membro de la Nacia Gvardio kaj de la Klubo de la Jakobenoj. Li voĉdonis por la ekzekutado de la reĝo. En 1792 li estis vicprezidento de la Konvencio kaj distingigis pro furioza persekutado de la malamikoj, ĉefe la pastraro. Plenumante revolucionajn misiojn en Normandio li kondukis sufiĉe modere, sed poste en Nanto li agadis kruele, pro tio oni supozas ke la militaj eventoj frenezigis lin. En la Konvencio en 1794 li atakis Robespieron, sed poste en novembro de tiu jaro li estis juĝita kaj mort-kondamnita.



Jean-Marie Collot d'Herbois (1750-1796)
Aktoro kaj revoluciulo. Dum la Revolucio li apartenis al la Klubo de la Jakobenoj. En 1793 li prezidis la Nacian Konvencion kaj partoprenis en la Komitato pri Publika Savo. Li apogis la mort-kondamnon al Ludoviko la 16-a kaj la kontraŭstaro al la ĝirondistoj. Dum la milito li translokiĝis al Liono kune kun Fouché kaj plenumis tie sangan subpremadon kontraŭ la enloĝantoj de tiu urbo. Poste li plenumis misiojn en aliaj lokoj: Nico, Nièvre, Loiret... Li kontribuis decid-maniere al la faligo de Robespiero la 9-an de Termidoro. En 1795 li estis deportita al Gujano, kie li mortis.



Georges Jacques Danton (1759-1794)
Advokato, ĉe la Franca Revolucio li ĵetis sin en la politikon kaj fondis en 1790 kune kun Desmoullins kaj Marat la Klubon de la Franciskanoj (*Cordeliers*). Kiel ministro pri justico Danton estis tre atakita far la ĝirondistoj en la Konvencio ĉar ili taksis lin danĝera radikalulo. Fine li unuigis kun la radikalaj montaruloj por forpeli la ĝirondistojn (junio 1793). Ekde aprilo 1793 li prezidis la Komitaton de Publika Savo, en kiu poste anstataŭis lin Robespiero. En 1794 Danton intencis malpliakrigi la Teroron kaj la subpremadon en la interno de la ŝtato. Laŭ instigo de Robespiero oni arestis kaj akuzis lin antaŭ la Revolucia Tribunalo kaj ekzekutis lin per la gilotino la 5-an de aprilo de 1794.



Camille Desmoullins (1760-1794)
Juristo laŭprofesie, li pasie kontribuis al la revolucia sento per tekstoj publikigitaj en 1788 kaj 1789. Dum la Revolucio, pere de artikoloj, diskursoj kaj la eldonado de ĵurnalo li diskonigis sian jakobenan ideologion kontraŭ la ĝirondistoj. Komence li estis tre influita de Robespiero sed poste li alproksimiĝis al Danton, kiu nomumis lin ĝenerala sekretario de la ministrejo pri Justico. Dum la epoko de la Teroro li montriĝis kontraŭa al la agado de la jakobenoj. Tial li estis inkludita en la proceson kontraŭ Danton kaj ekzekutita kun ĉi tiu kaj aliaj partianoj la 5-an de aprilo de 1794.



Charles F. Dumouriez (1739-1823)
Militisto, li dumtempe rolis kiel membro de la Sekreta Servo de Ludoviko la 15-a kaj kiel diplomato. Sed okaze de iu fiasko en Polujo li estis enkarcerigita en la Bastilo dum ses monatoj kaj poste ekzilita en Kaeno ĝis la ekregado de Ludoviko la 16-a. Komence de la Revolucio li estis Kampmarŝalo kaj aliĝis al la jakobenoj. Serve de la Revolucio li atingis kelkajn venkojn en la milito kontraŭ la fremdaj potencoj. Suferinte iun malvenkon kaj timante punon far la Konvencio li intencis ribeli kontraŭ la revolucia povo sed fiaskinte en tiu celo li fuĝis al Aŭstrio. De tiam li restis ekzilita ĝis sia morto el 1823.



Joseph de La Fayette (1757-1834)
Militisto kaj aristokrato. Li famiĝis pro sia interveno en la milito favore al la usona revolucio en 1777-1779. En Francio li ludis politikajn rolojn antaŭ, dum kaj post la Revolucio, ĝis 1830. En la Ĝeneralaj Stato en 1789 li estis deputito de la nobelaro, tamen li alprenis teniĝon favoran la Konstitucio kaj dum la Revolucio li apartenis al la Klubo de la *Feuillants*, moderuloj loĝalaj al la reĝo. Dum la milito li estis kaptita de la aŭstrianoj kaj revenis al Francio post la napoleona puĉo de Brumero. Post plua vojaĝo al Usono, li denove intervenis en la franca politiko post la revolucio de 1830.




Joseph Fouché (1759-1820)
Li estis religiulo kaj kiam komenciĝis la Revolucio li arde apogis ĝin kaj aliĝis al la Klubo de la jakobenoj. Lia plej aktiva partopreno komenciĝis en 1792 kun la evoluo al pli radikalaj pozicioj. Li estis membro de la Konvencio kaj de la Komitato pri Publika Instruado. Li apogis la ekzekutadon de Ludoviko la 16-a. Dum la Teroro li aplikis tiun politikon en Liono. Li partoprenis en la komploto de Termidoro kontraŭ Robespiero. Enkarcerigita en 1795, poste li gajnis la konfidon de la Direktoraro kaj de tiam rolis kiel policista ministro antaŭ kaj post la puĉo de Napoleono, kiun li favoris. Kun suboj kaj soroj en lia politika kariero dum la Imperio kaj la restarigita monarkio, fine li mortis ekzilita.



Joseph-Ignace Guillotin (1738-1814)
 Inventisto de gilotino, tre uzata por mort-punojn dum la Franca Revolucio. Profesoro de literaturo, li decidis studi por iĝi kuracisto. En 1789 li estis deputito de Parizo en la Konstitucia Asembleo. Li estis kontraŭ mortpuno; lia inventaĵo celis iĝi ĝin pli humana kaj malpli doloriga ol la antaŭaj metodoj sed li esperis ke ĝi estus unua paŝo por la nuligo de tia puno. Laŭ legendo, mortis per gilotino eĉ li mem, sed fakte la kaŭzo de lia morto estis ŝultro trafita de furunkoj, kaj krome tio okazis en 1814, preskaŭ ja la finiĝo de la Napoleona Imperio.



François Hanriot (1761-1794)
 Franca lidero kaj urba oratoro de la Franca Revolucio. Li naskiĝis en malriĉa familio kaj ekde 1789 li tre aktive engaĝiĝis en la revolucia agado kaj estis unu el la ĉefaj lideroj de la senkulotuloj, kun kiuj aktive intervenis en la popola insurekcio de aŭgusto de 1792 kaj en la masakroj de septembro de tiu jaro. En 1793 li ege kontribuis al la faligo de la ĝirondistoj. De tiam li komandis iun sektion de la Nacia Gvardio de Parizo. En la komploto de la 10-a de Termidoro kontraŭ Robespiero li estis arestita kaj poste gilotinita.




Jacques René Hébert (1757-1794)
 Ĵurnalisto kaj politikisto, li fondis en 1790 *Le Père Duchesne*, la gazeto de la revoluciaj radikaluloj. Li partoprenis en la faligo de la monarkio en 1792 kaj rolis kiel publika akuzisto de la ĝirondistoj en 1793. Kun siaj partianoj la hebertistoj (Chaumette, Chabot, Collot d'Herbois kaj aliaj) li ege influis en la Klubo de la franciskanoj (*Cordeliers*) kaj en la Pariza Komunumo. Li estis instiganto de la aplikado de la Teroro. Robespiero, kies "moderecon" li estis denunciinta, igis aresti ilin kaj la Konvencio dekretis ilian pergilotinan ekzekutadon.



François Christophe Kellerman (1735-1820)
 Militisto, en 1788 li estis jam kampmarŝalo. En 1789 li aliĝis al la kaŭzo de la Revolucio kaj oni asignis al li la komandon de la armeo en Alzaco. Kune kun Dumouriez li atingis venkon kontraŭ la aŭstroj en Vamly en 1792. Post malakordoj kun la Konvencio, dum la Teroro li estis arestita, sed post la falo de Robespiero reakiris sian rangon en la armeo kaj operaciis en la itala fronto kie poste li estis anstataŭita de Bonaparto. En 1804 li retiriĝis kaj Napoleono aljuĝis al li la titolon de *Duko de Valmy*. En 1814 li apogis la eksigon de la imperiestro kaj la restarigon de la Borbona dinastio.



Guillaume de Malesherbes (1721-1794)
 Franca advokato kaj politikisto, membro de la tribunalo pri Justico. Rolante kiel direktoro de la oficejo pri cenzurado, li permesis la publikigadon de la Enciklopedio de Diderot kaj aliaj verkoj kritikaj kun la politika sistemo. En 1775, estante ministro de Ludoviko la 16-a, li intencis, vane, profundan reformon de la ekonomio kaj la institucioj. Kiam mankis al li la reĝa apogo, li demisiis en 1776. En 1792, dum la Franca Revolucio, li estis defenda advokato de la monarko. Senvintjare, dum la Teroro, li estis deklarita kontraŭrevoluciulo kaj pergilotine ekzekutita.



Jean-Paul Marat (1743-1793)
 Kuracisto, kaj ĵurnalisto dum la Revolucio. Li naskiĝis en modesta familio kaj studis medicinon. Li pasie propagandis pri la Revolucio jam dekomence per sia ĵurnalo *L'Ami de Peuple*. Oni konsideris lin la ĉefa respondeculo de la septembraj masakroj, sed nun pli multaj historiistoj malpligrandigas lian rolon. Li estis elektita membro de la Konvencio kaj de la Pariza Komunumo kun la opo de la ĝirondistoj. Li apogis la ekzekutadon de la reĝo kaj la persekutadon al la ĝirondistoj. Lia murdo fare de Charlotte Corday igis lin martiro de la Revolucio. Li estis entombigita en la Panteono de Parizo.



Honoré G. Mirabeau (1749-1791)
 Revoluciulo, verkisto, diplomato... Li iĝis la unua simbolo de la parlamenta oratoreco en Francio. Spite al tio ke li estis enkarcerigita kaj al liaj multaj skandaloj, li estis deputito por la antaŭrevolucia Parlamento kaj por la Ĝeneralaj Statoj reprezentante la Trian Staton. Post 1789 li estis partiano de konstitucia monarkio kaj sekrete konsilis la fuĝon de la reĝo. Du tagojn post lia morto, la 4-an de aprilo de 1791, la Asembleo dekretis ke liaj postrestaĵoj estu la unuaj en la Panteono, sed estis retiritaj el tie post la malkovro de la fera ŝranko kun lia sekreta korespondado kun la reĝo.



Théroigne de Méricourt (1762-1817)
 Ŝi naskiĝis en Lieĝo kaj dumtempe loĝis en Londono laborante kiel servistino. Bella kaj klera, ŝi intervenis en la Revolucio jam dekomence partoprenante en la kaptado de la Bastilo svingante glavon komandante virinan grupon. En Parizo ŝi kreis salonon kiu fakte estis revolucia klubo. Post plua interveno en la revoluciaj eventoj, en oktobro de 1790 ŝi revenis al Lieĝo, kie ŝi estis arestita far la aŭstroj kaj restis en malliberejo dum pli ol unu jaro. Reveninte al Parizo fine de 1791 ŝi reigis sian revolucion kaj feministan aktivadon. Fine de 1792 ŝi komencis senti rifuzon al la tiam kreskanta perforto de la jakobenoj. Elreviĝinta pri la revolucia derivo, ŝi frenezigiĝis kaj pasis la lastajn jarojn de sia vivo en frenezulejo.



Jean Joseph Mounier (1758-1806)
 Advokato. Li estis deputito de la Tria Stato por la Ĝeneralaj Statoj en 1789, kie li proponis la juron de la pilk-luda korto. En la Konstitucia Asembleo li estis inter la promociantoj de la **Deklaracio de la Rajtoj de la Homo kaj la Civitano**. Li emis konstitucian monarkion kaj tial li sin oponis al la plimulto el la Konstitucia Asembleo. Malkontenta pri la evoluo de la revolucio li ekziliĝis al Svisio en 1790 kaj revenis en la epoko de la Napoleona Imperio, 1801. Ekde 1802 ĝis sia morto, en 1806 li rolis kiel prefekto de la departemento de *Ille-et-Vilaine*.



Napoleon Bonaparte (1769-1821)
 Naskiĝinta en Korsik-insulo, li faris militistan karieron serve de Francio unue sub la reĝo Ludoviko la 16-a kaj poste favore al la revolucia reĝimo. Kiam tiu reĝimo krizis post la komploto de Termidoro, la politika graveco de la juna generalo Bonaparte pligrandiĝis laŭgrade ke ĉi tiu pli kaj pli fariĝis esenca defendanto de la Direktoraro. Li sciis profiti tiun situacion por preni la povon kaj evoluigi la respublikan reĝimon al Imperio kiun li regis ekde 1804 al 1815 sur la fono de senĉesa militado kontraŭ preskaŭ tuta Eŭropo. Post lia definitiva fiasko de Waterloo li estis kaptita de la angloj kaj ekzilita en la insulo Sankta Elena, kie li mortis.



Marie-Olympe de Gouges (1748-1793)
 Verkistino, aŭtorino de la **Deklaracio pri Inaj kaj Civitaninaj Rajtoj**, ŝi multe verkis favore al civitaj kaj politikaj rajtoj de inoj kaj al abolo de sklaveco. Ŝiaj proponoj kongruis kun ideoj de la ĝirondistoj kaj aliĝis al ĉi ties klubo. Ŝi kontraŭstaris la mortopunon por Ludoviko la 16-a kaj eĉ proponis sin kiel helpantino por defendi la reĝon. En 1793, Olympe atakis la responsulojn pri la masakroj de septembro 1792. Ŝi estis vokita antaŭ tribunalon du tagojn post ekzekuto de la ĝirondistoj. Ŝi defendis sin lerte kaj inteligente sed estis kondamnita al morto.



Ludoviko Filipo de Orleans (1747-1793)
 Kuzo de la reĝo Ludoviko la 16-a, jam antaŭ la Revolucio li kondukis malamikece al la dinastio. Ekde la Ĝeneralaj Statoj kaj la Leĝo-dona Asembleo, kie li membris, li ĉiam apogis ĉiujn revolucionajn elpaŝojn kaj la ĉefajn liderojn de la jakobenoj: Robespiero kaj Marat. Kiam la revoluciuloj radikaligiĝis la duko de Orleans daŭre apogis ilin. Tial ke la nobelaj titoloj estis abolitaj, la duko alprenis la nomon "Filipo Egaleco". Li estis deputito ankaŭ en la Konvencio kaj eĉ apogis la mortpunon por lia kuzo la reĝo. Lia bona rilato kun la revoluciuloj finiĝis kiam unu el lia filoj, oficiro en la armeo de Dumouriez sekvis ĉi tiun en ties ribelo kaj dizerto. Li estis gilotinita en novembro de 1793.



Jérôme Pétion (1756-1794)
Advokato ekde 1778, membro de la Ĝeneralaj Statoj en 1789, li iĝis unu el jakobenaj lideroj en la Konstitucia Asembleo. Post la fuĝo de la reĝa familio en 1791 li estis unu el la deputitoj kiuj rekondukis la fuĝintojn al Parizo. Urbestro de Parizo post Bailly, li ne kapablis eviti la kontraŭreĝan agadon de 1792. Deputito de la Konvencio, li prezidis ĝin ekde septembro de 1792. Aliancano de la ĝirondistoj, li kontraŭis Robespieron kaj estis forpelita el la Konvencio en junio de 1793. Li intencis ribeligi Normandion kontraŭ la Konvencio sed fiaskis. Fuĝinto kaj persekutita, li sin pendumis en la arbaro de Catolé en junio de 1794



Maximilien de Robespierre (1758-1794)
Advokato. Lin influis la ideoj de la filozofoj de la 18-a jarcento. Membro de la Jakobena Klubo, li favoris kompletan demokration, sed unue subtenis la konstitucian monarĥion. Li partoprenis en la verkado de la **Deklaracio de la Homaj kaj la Civitanaj Rajtoj** kaj la konstitucio de 1791. En 1792 li iĝis respublikano, kaj partoprenis en la Pariza Komunumo. En julio 1793 li eniris en la Komitato de Publika Savo, kaj laŭ sia propra esprimo, starigis demokration bazitan sur virto kaj teroro. Li iĝas defakte kvazaŭ diktatoro, kaj respondecis pri la mortigo de multaj personoj, eĉ revoluciuloj, kaj promociis la kulton al la "Supera Ento". Li kreis tiom da timoj ĉirkaŭ lin, ke kelkaj homoj, ektimis esti sia-vice gilotinotaj, kaj aranĝis komploton kontraŭ li. Tiel, li mem estis arestita la 27an de julio 1794 kaj senkapigita la sekvintan tagon.




Marie-Jeanne Roland (1754-1793)
Inteligenta kaj klera ino, simpatianta la respublikon, ŝi aktive partoprenis en la revolucio, same kiel sia edzo Jean-Marie Roland, membro de la Konvencio kaj ministro pri Internaj Aferoj. La problemoj de la geparo komenciĝis kiam ŝia edzo dediĉiĝis denunci la ekscesojn de la radikaluloj en 1792. Ŝia domo estis kunvenloko de la jakobenoj en junio de 1793. Dum kvin monatoj ŝi restis arestita en diversaj prizonoj. Fine ŝi estis gilotinita en novembro de 1793. Ŝia edzo memmortigis sin du tagojn poste.



Jacques Roux (1752-1794)
Pastro, li estis inter la unuaj klerikoj kiuj akceptis la Civilan Statuson de la Klerikaro. Li estis lidero de la **enragés**, radikala grupo de la senkulotuloj; lia partopreno en la Revolucio komenciĝis printempe de 1792 kiam li, per liaj verkoj, atakis la akaparistojn okaze de la krizo pro la malabundo de nutraĵoj. Li pledis ankaŭ por la ekzekutado de la reĝo. Lia agresemo kontraŭ la burĝaro altiris al li la kondamnon far plejparto el la Konvencio, eĉ la jakobenoj. Oni arestis lin en septembro de 1793. La 10-an de februaro de 1794 li memmortigis sin en la prizono kie li estis pasinta la antaŭajn kvin monatojn.



Louis de Saint-Just (1716-1777)
Li partoprenis en la Revolucio jam de komence en Parizo sed poste li atingis la rangon de kolonelo de la Nacia Gvardio en Blérancourt. Radikala revoluciulo, li partoprenis en la revenigo de la reĝa familio al Parizo post ĝia fuĝo. Li estis iu el la personoj plej proksimaj al Robespiero. Li ne sukcesis esti elektita membro de la Leĝo-fara Asembleo en 1791 sed jes ja por la Konvencio en 1792. Li tre pledis por la ekzekutado de la monarko en la proceso al ĉi tiu. Ekde la Komitato pri Publika Savo li agadis senkompatate kontraŭ la ĝirondistoj. Same kruela li kondukis kiel komisaro en la armeo de la Rejno kaj en la proceso al la sekvantoj Herbert kaj Danton. Li akompanis Robespieron en ĉi ties falo kaj ekzekutado.



Emmanuel-Joseph Sieyès (1748-1836)
Kleriko kaj akademiano, li estis unu el la teoriistoj de la konstitucioj de la Revolucio kaj la Imperio. Li verkis gravajn eseojn pri politikaj aferoj. En la Ĝeneralaj Statoj, estante pastro, li preferis reprezenti la Trian Staton. Ne estante brila oratoro, li havis tamen egan influon kaj kunlaboris en la redaktado de la **Deklaracio de la rajtoj de la Homo kaj la Civitanoj**. Li same partoprenis en ĉiuj asembleoj kaj Konstitucioj kaj en la Teroro. Li lerte manovris en ĉiuj politikaj ŝanĝoj de tiu periodo. Poste li estis unu el la membroj de la Direktoraro kaj ankaŭ tiam li lerte manovris ebligante la promocion de Napoleon. Post roli kiel konsulo kun Bonaparte li ebligis la starigon de la Imperio, sed poste retiriĝis el la politika aktivado kaj post la Restaŭrado oni ekzilis lin al Bruselo. Reveninte en 1830, li mortis en 1836.

Legante pri la Franca Revolucio



Malmultaj historiaj eventoj vekas tiom da intereso kiom la Franca Revolucio. La historia kaj la literatura verkaro tre okupiĝis pri tiu temo, kaj ne nur en la nuna epoko sed jam de pli frue post ĝia okazado. Por tion konstati sufiĉas trarigardi Interretan. Se pere de iu el la serĉiloj de la reto oni konsultas “**Revolución Francesa libros**” aŭ “**Li-vres Révolution française**” aŭ “**French Revolution books**” aŭ “**Libri Rivoluzione francese**” aŭ “**Revolution Französisch Bücher**” aŭ alilingve, aperas multenombraj referencoj, recenzoj, raportoj, anoncoj... de libroj pri tiu temo en la koncerna lingvo laŭ la konsulto. Sed ne konsultu “**Franca Revolucio libroj**”. Kiel esperantistoj ni devas honti pro tio ke pri tiu temo, kaj pri multaj aliaj aferoj, ne estas materialo en la internacia lingvo. Se veras tiu aserto kiu diras ke tio kio ne estas en la reto ne ekzistas, ŝajnas ke nia modesta raporto publikigata en ĉi tiu revuo estas la plej ampleksa teksto pri la Franca Revolucio en la Esperanta lingvo. Krom ĝi, pri tiu temo en la monda reto troveblas nur iuj koncizaj priskriboj en Vikipedio kaj malmulte pli.

Do, se ni deziras aliri al la ĉefverkoj kaj historiaj tekstoj pri la francaj eventoj inter 1789 kaj 1794 ni devas elturniĝi al alilingvaj materialoj. Kaj tion ni faras nun; la recenzoj kaj informo kiun ni povas provizi nun, devige estas pri materialo originale verkitaj en ne-Esperantaj lingvoj kaj tradukitaj al iuj aliaj lingvoj escepte Esperanto. Kompreneble, nia trarigardo al tiu materialo devas esti tre parteca; ni ne povas recenzi kvin-dek mil librojn. Ni eĉ ne certas ke tiuj verkoj kiujn ni mencias estas la plej gravaj; cetere, kiamaniete mezuri aŭ taksi la gravecon de la verkoj? Ni preferu referencu, do, tiujn librojn kiuj utilis al ni por la elaborado de nia esperantlingva teksto pri la Franca Revolucio.

Unu el la tekstoj uzitaj de ni estis verkita de la franca historiisto Jean-Pierre Bois kaj eldonita en la jaro 1999. Eĉ se ne ampleksa, tiu teksto bone informas pri la ĉefaj okazintaĵoj de la Revolucio kaj la disvolviĝo de la procezo.

Se profesoro Bois kombinas sian historiistan intereson pri la Franca Revolucio kun aliaj historiaj temoj, Jean-Clément Martin, male, havas specialistan dediĉon al la temo de tiu revolucio kaj apartan atenton al ties parto kiu rilatas kun la ribelo de la Vendée kaj ĉi ties perforta sufokado. Krome li intervenis/as en akademiecajn polemikojn kun aliaj historiistoj pri la interpretado de diversaj aspektoj kaj faktoj de la Revolucio.

Simila estas la kazo de Albert Soboul. Ankaŭ ĉi tiu dediĉis sian tutan prihistorian intereson al la Franca Revolucio, kaj pri ĝi li verkis preskaŭ du-dekon da libroj, el kiuj estis iuj tradukitaj al aliaj lingvoj, inter ili la hispana. Kaj ankaŭ li poziciigis en interpretado de la Revolucio fronte al malsamaj historiistaj pozicioj. Konkrete, li rifuzis la tezon de tiuj historiistoj kiuj emas malgrandigi la gravecon de la la Franca Revolucio enkadrigante ĝin en pli ampleksa procezo, kiun ili nomas “Atlantikaj Revolucioj” enfazante la Amerikan (Usonan) Revolucion de la Sendependa Milito de tiu lando. Ne estas nia intenco poziciigi en tiutipaj diskutadoj. La tezoj pri tiaj temoj neniam estas tute veraj kaj ankaŭ ne tute malveraj. La historiaj procezoj kiel la revolucioj estas komplikaj etapoj kies komenciĝo kaj finiĝo estas malfacile kaj nur konvencie fikseblaj.

Alia libro kiu altiris nian atenton estas tiu verkita de Michel Vovelle kaj titolita “**Enkonduko al la historio de la franca Revolucio**” publikigita en la jaro 2000. Vovelle estas historiisto specialigita pri la 17-a kaj 18-a jarcentoj, ĉefe pri la granda revo-

lucio; plejparto el liaj verkoj rilatas el tiu temo. Spite al lia proksimeco al la historia materiismo de marksisma inspiro, lia verkaro de la du lastaj jardekoj kontribuas rehabiliti la historian rolon de la individua protagonisto kiu ĝis tiam estis sub-taksita pro la atento kiun oni adresis al la ekonomiaj kaj sociaj strukturoj.

Menciinda estas ankaŭ la verkaro de Jean Jaurès (1859-1914). Li estis socialista politikisto kaj fondis la ĵurnalon *L'Humanité* en 1904. Oni murdis lin tri tagojn post la komenciĝo de la Unua Mondmilito tial ke li, kiel sincera pacifisto, sin oponis kiel franca parlamentano, al la interveno de sia lando en la tiam komenciĝanta konflikto. Modera socialista komence, li fariĝis pli radikala ekde 1892 subinflue de la tiamaj eventoj de la klasbatalo (striko de Carmaux). Lia verkaro estis diversstema. Pri la afero kiun ni pritraktas nun, li publikigis en 1901 libron titolitan “**Socialista historio de la Franca Revolucio**”, tradukita al deko da lingvoj.


Inter la abunda bibliografio pri la Franca Revolucio, estas libroj kiuj specife atentis pri konkretaj etapoj de la revolucia procezo. Pri la origino de la Revolucio verkis Jean Paul Bertaud, Pierre Goubert, Robert Mandrou, Daniel Mornet, Regine Robin kaj la jam menciita Albert Soboul. Pri la epoko de la Teroro atentis Marc Bouloiseau, Richard Cobb, Robert Roswell Palmer, Paolo Viola kaj ankaŭ Soboul. Pri la Termidora reakcio kaj la Direktoraro temis Claude Mazauriz, Albert Meynier, Isser Woloch... Pri tiu etapo ni volas speciale menci la libron “**La Konspiro de la Egaluloj**” de la ruso Ilya Ehrenburg. Centrita en la persono kaj la vivo de Gracchus Babeuf tiu verko ne estas, strikte, historio aŭ biografio, sed romano, tio estas, historia romano surbaze de la konata informo de la “tribuno de la popolo” kiel Babeuf difinis sin mem.

Alia tipo de libroj pri la Revolucio temas ne pri difinitaj etapoj sed pri konkretaj aspektoj: sociaj, politikaj... Tia estas la kazo de aŭtoroj kiel Jacques Godechot, Gaston Martin, G. Lefebvre, George Rudé kaj la jam menciita Richard Cobb. Pri la klasbatalo okazanta kadre de la revolucia procezo okupiĝis Paul Bois, Florence Gauthier, Georges Lefebvre, Albert Mathiez, Evgenij Viktorovic Tarle kaj A. Soboul.

Aliaj temoj, en rilato kun la Revolucio, specife traktitaj en apartaj verkoj, estis la antaŭrevolucia

situacio kaj ĉi ties kaŭzoj, la ekstera politiko, la armeo, la kontraŭ-revolucio, la religio, la revoluciaj ideoj, la ribelo de la Vendée, la rilato de la framasonaro kun la Revolucio...

Kiel dirite, jam estis historioj pri la Franca Revolucio frue, en la 19-a jarcento, plurajn jardekojn post la finiĝo de la Napoleona Imperio. Unu klasikaĵo el tiutipa verkaro estas tiu de Alexis de Tocqueville (1805-1859). Krom aliaj tekstoj pri aliaj aferoj, pri la Franca Revolucio li verkis tiun titolitan “**La Malnova Reĝimo kaj la Revolucio**” publikigita en 1856. Male ol plejparto en la nuntempa historia literaturo pri la revolucio en lia lando, la teniĝo de Tocqueville pritaksas malfavore la revolucian procezon. Tio estas komprenebla konsiderante lian familian devenon. Li naskiĝis en 1805, en la komenca etapo de la Napoleona Imperio, en la sino de aristokrata ultramonarkisma familio kiu estis perdinta kelkajn



membrojn en la etapo de la Teroro de la Revolucio; fakte, la falo de Robespiero, en 1794, liberigis liajn gepatrojn el la gilotino. Krome li estis edukita en la kontraŭ-revolucia etoso de la epoko de la Borbona Restaŭrado. Konsiderante ĉi ĉion, notindas ke Alexis de Tocqueville, tamen, alprenis kaj akceptis iujn valorojn de la Revolucio. Konkrete, li konsideris ke la avanco al situacio de egaleco inter la homoj estis nehaltigebla kaj aprobis tiun procezon. Do estis en li tiu kontraŭdiro ke, estante subjektive kontraŭa al iuj aspektoj de la Revolucio, tamen lia menso estis kaptita de revoluciaj valoroj

kaj la libereco, la egaleco kaj la frateco. Do, oni povas diri ke li samtempe estis konservema kaj revolucia. Tia kontraŭdira eco de lia karaktero montriĝas en la fakto ke li, sin oponis al la Revolucio de 1848 kiu detronigis la reĝon Ludoviko-Filipon kaj establis la Respublikon, kaj poste sin oponis ankaŭ al la puĉo de Ludoviko Napoleono kiu abolis la Respublikon por starigi la Duan Imperion. Dum la Respubliko li eĉ estis rolinta kiel ministro. Ĉiukaze, lia verko pri la Franca Revolucio estas tre utila materialo por la studemuloj de tiu historia evento.


Simila estas la kazo de Hippolyte Taine (1828-1893), profesoro de retoriko kaj historio. Lia verkaro okupiĝas pri filozofiaj kaj historia temoj. Por la temo kiun ni pritraktas nun estas interesaj jenaj tekstoj liaj: “**Un séjour en France de 1792 à 1795**” kaj la ses-voluma verko: “**Les origines de**

la France contemporaine". Ĉi lasta estas ia severa pritakso de la kaŭzoj kiuj provokis la dekadencan de la franca socio ekde la revolucio de 1789, kiuj, laŭ li, evidentiĝis en la malvenko kiun Francio suferis antaŭ Prusio en 1870. Liaj prikonsideroj pri ĉi tiu afero pli ŝajnas filozofia argumentado ol historia esplorado. Cetere, ankaŭ tiu verkaro estas interesa materialo kaj ne mankas en ĝi pozitiva influo de la Franca Revolucio kaj de la ideoj kiuj generis ĝin. Spit' al ĉiuj fuŝaĵoj de la revolucia procezo, la Revolucio, tamen, ne okazis vane.

La nuntempa historiografio estas pli objektiva en la pritakso de la revoluciaj eventoj. Krome la nuntempaj historiistoj laboras laŭ la kriterioj de la t. n. historia materiismo, t. e. esplorante la homan socion sen aprioraj konceptoj, surbaze de la reale ekzistantaj individuoj kaj la interrilatoj kiujn oni establas inter ili. Tiu marksisma metodo kontraŭas la tezon kiu prezentas la kapitalismon kiel statikan sistemon aŭ rezulton de la natura evoluado de la homa estaĵo. La histori-materiisma esplorado montras la historian, do transiran, karakteron de la disvolviĝo de la homaro. Tia maniero kontempli la historiajn eventojn pritaksante la gravecon de la klasbatalo kiel motoro de la historio estas nun alprenata de preskaŭ ĉiuj historiistoj eĉ se ili mem ne konscias pri tiu fakto kaj ne difinas sin mem kiel marksistoj.

Inter la nuntempaj historiistoj kiuj, jes ja, estas plene konsciaj apliki la marksisman metodon de historia esplorado menciindas la francon Max Gallo. Lia prihistoria produktado estas tre ampleksa sed unu, duvoluma, verko temas pri la Franca Revolucio kvankam kromaj aliaj albordas la temon de la klasbatalo, ekzemple unu el ili titoliĝas "**Spartako kaj la ribelo de la sklavoj**". Ĉi tiu, samkiel aliaj verkoj de la sama aŭtoro, estas historia romano aŭ novelo sur historia fono. La du volumoj de la libro pri la Franca Revolucio titoliĝas "**La peuple et le Roy**" kaj "**Aux armes, citoyens!**". Interesaj kaj legrekomendindaj.

Inter la libroj kiuj ni menciis estas kelkaj kiuj estas romanoj sur la fono de la revolucia epoko. Al ili oni devus aldoni "**Historio de du urboj**", de Charles Dickens, kaj kelkaj romanoj de Honoré de Balzac. Ioman atenton meritas ankaŭ la teatro de la Revolucio, t. e. teatraj verkoj pri la temo kaj/aŭ personoj en rilato kun la revoluciaj okazintaĵoj.



Tiurilate oni devas menciigi unue la teatron kiu jam estis ludita dum la revolucia epoko mem, subvenciita kaj organizita de la revoluciaj aŭtoritatoj de la momento por stimuli la apogon de la loĝantaro al la revolucia procezo. En 1807 iu dekreto de Napoleono limigis la nombron da teatrejoj kaj metis ilin sub la kontrolo de iu oficiala institucio. Poste, dum la 19-a kaj la 20-a jarcentoj ne mankis teatraĵoj kiuj pritraktis la Revolucion de historia vidpunkto. En tiutipaj teatraj verkoj la figuroj de Robespiero kaj Danton estas tre rutina temo.

Krom la bibliografio pri la Revolucio: historio, romanoj, teatraĵoj... ni povas ankaŭ iome trarigardi la filmografion pri la Franca Revolucio. Verdire, pri ĉi tiu temo ne estas multaj filmoj, male ol, ekzemple, pri la vivo kaj Imperio de Napoleono. Aparta kazo estas la dosier-filmoj aŭ dokumentaj filmoj, ĝenerale per televidaj.

El ĉi tiuj la materialo estas pli abunda, ĉefe tiu dissendita per la fama televida programo "Kanalo de Historio". La kvalito de tiuj filmetoj estas tre diversa, iuj estas bonaj kaj objektivaj, aliaj apenaŭ meritas atenton. Estas iuj sufiĉe aprobindaj pri la afero de la morto de Marat.

Pri la vivo de la reĝino Maria Antonieta aperis en la lastaj jaroj du aŭ tre filmoj sufiĉe kvalitaj en kio rilatas al la prezentado de la etoso, vestaro k. s. de la epoko, sed sen profundigo en la problemaro kaj socia situacio de la Malnova Reĝimo kaj la revolucia etapo. Menciindas ke pri tiu reĝino oni faris unu filmon jam en la jaro 1938 sub la reĝisorado de Woodbridge

Strong Van Dyke. Plian meriton, laŭ nia opinio, havas la filmo "**Danton**" direktita de Andrzej Wajda en 1982. La persono de Danton estas enkarnigita en la filmo fare de la fama kin-aktoro Gérard Depardieu. La filmo priskribas la lastajn tagojn de Georges Jacques Danton, lia procezo kaj ekzekutado per la gilotino laŭordone de la aŭtoritata kaj dogmema Robespiero en septembro de 1793. Pri la sama temo de la morto de Danton jam ekzistis kelkaj aliaj filmoj, ĉiuj bazitaj sur la kvar-akta teatra dramo titolita "**Dantons Tod**" (**La morto de Danton**) verkita de la germano Georg Büchner en 1835. Unu el tiuj filmaj versioj de la teatraĵo estis filmita en Hispanio en 1972. La direktoro estis Alberto González Vergel kaj la persono de Danton estis enkarnigita de la kin-aktoro Javier Loyola.



Kronologio de la Franca Revolucio

Jaro 1788

8-a de aŭgusto

La reĝo Ludoviko la 16-a kunvokas la Ĝeneralajn Statojn por majo de la sekva jaro. La kampanjo de agitado kaj propagando etendiĝas tra la tuta lando.

Jaro 1789

30-a de aprilo

Kreado de la *Societo de Amikoj de la Konstitucio* en Versajlo. Ĝi iĝos poste la *Klubo de la Jakobenoj* kiam instaliĝos en Parizo en oktobro.

5-a de majo

Solena malfermo de la Ĝeneralaj Statoj en Versajlo.

17-a de junio

La membroj de la Tria Stato sin konstituas en Nacia Asembleo kiam la aliaj du Statoj (nobelaro kaj klerikaro) rifuzas debati kun ili.

20-a de junio

Ĵuro en la Halo de la Pilk-ludo en Versajlo, la deputitoj de la Nacia Asembleo ĵuras ne disiĝi ĝis kiam ili estus provizintaj Konstitucion por Francio.

9-a de julio

Per la aliĝo de la deputitoj de la Klerika kaj Nobela Statoj al la Nacia Asembleo, ĉi tiu iĝas Konstitucia Asembleo.

11-a de julio

Jacques Necker estas eksigita kiel ministro pri Financoj. La kono de tiu fakto provokas disturbojn sekvinttage en Parizo, instigitajn de Camille Desmoulins.

14-a de julio

Kapto de la Bastilo en Parizo.

16-a de julio

La reĝo revokas la eksigon de Necker, ĉi tiu revenas al la Ministrejo pri Financoj.

4-a kaj 5-a de aŭgusto

Abolo de la feŭdismo, la privilegioj de la nobelaro kaj la klerikaro, aprobita de la Nacia Asembleo.

26-a de aŭgusto

La Nacia Asembleo proklamas la Universalan Deklaracion de la Rajtoj de la Homo kaj de la Civitano.

5-a kaj 6-a de oktobro

Marŝado al Versajlo. Multenombro da parizaj virinoj marŝas al Versajlo plendante pro la malabundo de pano, alsaltas la Reĝan Palacon kaj atingas ke la Reĝa Familio instaliĝu en Parizo.

19-a de oktobro

Translokiĝo de la *Societo de Amikoj de la Konstitucio* al Parizo kaj ĝia instaliĝo en la konvento la Jakob-monaĥoj, pro kio ties membroj estas konataj de tiam kiel "jakobenoj".

21-a de oktobro

Proklamado de la milit-leĝo.
Naciigo de la havaĵo de la katolika klerikaro.

2-a de novembro

Oni aprobas la teritorian organizon de Francio laŭ 83 departementoj anstataŭ ante la antikvajn feŭdajn regionojn.

22-a de decembro

Jaro 1790

27-a de aprilo

Estas fondata en Parizo la *Societo de la rajtoj de la Homo kaj la Civitano*, pli konata kiel *Klubo de la Franciskanoj* (cordeliers).

12-a de julio

La Asembleo aprobas la Civilan Statuson de la Klerikaro.

22-a de julio

La Civila Statuso de la Klerikaro estas sankciita de la reĝo Ludoviko la 16-a.

14-a de julio Festo de la Federacio, en Parizo.
4-a de septembro Definitiva demisio de Jacques Necker kiel ministro pri Financoj.
21-a de oktobro Oni aprobas la trikoloran standardon (blua, blanka kaj ruĝa) kiel nacian flagon de Francio.

Jaro 1791

10-a de marto La papo Paŭlo la 6-a kondamnas la Civilan Statuson de la Klerikaro.
20-a de junio La membroj de la Reĝa Familio intencas fuĝi el lando sed oni malkovras ilin du tagojn poste en Varennes kaj oni devigas ilin reveni al Parizo.
17-a de julio Masakro de la Marsa Kampo.
13-a de septembro La Asembleo aprobas la Konstitucion, kiu establas konstitucian monarkion.
30-a de septembro Finiĝas la tasko de la Konstitucia Asembleo kaj ĉi tiu estas anstataŭata de la nova Leĝodona Asembleo.

Jaro 1792

20-a de aprilo Francio komencas militon kontraŭ la fremdaj potencoj kiuj minacas la Revolucion.
11-a de julio La patrujo subdanĝere!
10-a de aŭgusto Popola insurekcio en Parizo. Alsalto al la Palaco de la Tuilerioj. Oni konstituas la Insurrekcian Komunumon de Parizo. Falas la konstitucia monarkio.
13-a de aŭgusto La Reĝa Familio estas enkarcerigata en la Fortreso de la Templo-kavaliroj.
17-a de aŭgusto Starigado de la unua Revolucia Tribunalo, postulita de M. Robespiero.
21-a de septembro Ludoviko la 16-a estas eksigita kiel reĝo. La Konvencio nuligas la konstitucian monarkion kaj komenciĝas la Respubliko.

Jaro 1793

21-a de januaro Gilotinado de la civitano Ludoviko Capeto, eks-reĝo Ludoviko la 16-a.
1-a de februaro Anglio, Hispanio kaj Nederlando eniras en militon kontraŭ la Franca Respubliko.
31-a de majo Insurekcio de la popolo de Parizo inicas ofensivon por la eksigo de ĝirondistoj.
24-a de junio La Konvencio aprobas la novan Konstitucion.
13-a de julio Marat estas murdata far Charlotte Corday .
27-a de julio Laŭ decido de la Konvencio, Robespiero eniras en la Komitaton pri Publika Savo.
23-a de aŭgusto Amasa rekrutado. La armeo atingas havi unu milionon da soldatoj.
5-a de septembro Komenciĝas la Teroro.
5-a de oktobro Oni aprobas la novan kalendaron de la Respubliko.
10-a de oktobro La registaro deklaras sin revolucia ĝis la milit-fino kaj oni suspendas la Konstitucion.
6-a de novembro Komenciĝas la kampanjo je senkristanigado.

Jaro 1794

4-a de aprilo Estas abolita la sklaveco en la francaj kolonioj.
24-a de marto René Hébert kaj la ceteraj hebertistaj lideroj estas gilotinataj.
5-a de aprilo Danton kaj liaj sekvantoj estas gilotinataj.
10-a de junio La Konvencio aprobas la leĝon kiu startas la grandan Teroron.
27-a de julio Falo de Robespiero. Oni gilotinas lin kaj liajn sekvantojn.
11-a de novembro Oni fermas la Klubon de la Jakobenoj.

Jaro 1795

22-a de aŭgusto Oni aprobas la Konstitucion kiu nuligas la revolucionan reĝimon kaj kreas la Direktoraron.
5-a de oktobro Iu monarkisma ribelo en Parizo estas sufokata de la trupoj subgvide de Bonaparto.
26-a de oktobro Oni nuligas la Nacian Konvencion.

Jaro 1796

10-a de majo La polico arestas la grupon de Babeuf kiu estis preparanta la t. n. “Konspiron de la Egaluloj”.

Jaro 1796

9-a de novembro Puĉo de la 18-a de Brumero de Napoleono Bonaparto kontraŭ la Direktoraro. Komenciĝas la etapo de la Konsulato.
13-a de decembro Oni aprobas la novan Konstitucion kiu establas la reĝimon de la Konsulato. Napoleono, kiel Unua Konsulo, koncentras la politikan povon en siajn manojn.

Terore humore

LE JOUR DE GLOIRE EST ARRIVÉ...
AUX ARMES, CITOYENS...

El kie ci
prenis la strangan ideon
ke hodiaŭ mem kaj ĝuste ĉi-
momente komenciĝas
nova erao?



Civitano Marat,
iu frenezulino prezentiĝis
ĉe porde kriante kaj sving-
ante tranĉilon...

Ho! Tuj
alvoku Davidon,
la pentriston!



Mi ne sciis kion donaci
al Via Reĝa Moŝto, sed ŝajnas ke
Doktoro Gillotin povas sugesti
ion al mi.



Civitaninoj! Oni volas nuligi
la leĝon pri eks-geedziĝ-raĵto. Mobiliz-
iĝu! La patrujo estas subdanĝere!

Mi insistas. Tiuj
popolanoj ŝajnas
esti indignitaj.

